

f. le dantek
la konflikto

El la franca
tradukis
E. Lanti

**alen
dubi**

kaj aliaj artikoloj

En la sama serio de SAT-Broŝurservo

ĉe

Cercle amical esp. agenais

F 47340 LAROQUE

Archdeacon : La mistero de nia surtera ekzisto

Sébastien Faure : La Krimoj de Dio

Leo Polak : Du prelegoj

La racia kaj ateisma budhismo

Han Riner : La Kvina Evangelio

ktp.

kaj jenaj verkoj de **LANTI** :

La laborista esperantismo

Vortoj de Kamarado E. Lanti

El verkoj de Lanti (3 volumoj)

Naciismo

Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio ?

KOREKTENDOJ al "La Konflikto/Dubi"

paĝo/linio (- de malsupre)

74 / 2 Dio, ke kiu vi kredas → je

74/20 kiel ŝiaj najbaroj → kiel ĝiaj najbaroj

78/-14 estas pro io, ke... → tio

101/20 dio...li → Dio... Li

108/1 vian materion → vivan materion

119/-8 tia, kian ni vidas ĝin → kia

129/2 flasaj → falsaj

129/-6 la plej forta → la pli forta

131/-15 ajn ajn → ion ajn

135/-19 senpova kontraŭ nenio → kontraŭ
ĉio

La leganto bonvolu atenti, ke en franca katolikaro la titolo "abato" estas donata ne nur al estroj de abatejoj (ofte egalrangaj kiel episkopoj) sed ankaŭ al ĉiuj pastroj de malalta rango (sub kanoniko).

ANTAŬPAROLO

Le en ĉi tiu verko la aŭtoro jenon diras : "Ekzercado estas bonfara al spirito, same kiel al korpo..., bonega estas ekzercado per trapezo, kvankam tia laboro estas vana. Same, filozofiaj diskutoj kaj verserĉado, se ili estas tute senutilaj, konservas tamen la viglon de nia cerbo."

Tradukante ĉi tiun libron, mi mem ne havis alian celon ol distre ekzerci mian intelekton kaj forgesi pri la frenezaĵoj, kiujn abunde nun faras patriotoj - ĉefe tiuj el la norda hemisfero.

Intence mi ne uzas la vorton homo en ĉi tiu kazo, tial ke la patriotismo estas ĉefe karakterizata per tio, ke ĝi bestigas, sovaĝigas homojn kaj sekve senigas ilin je homeco.

Per ĉi tiu verko elmetiĝas, en relative facila formo interparola, du kontraŭecaj tezoj : la ateisma kaj la deisma. Kvankam la argumentado de la ateisto pli facile trovis mian konsenton ol tiu de la deisto, tamen mi konfesas, ke la unua ne sukcesis liveri tute kontentigan respondon al kelkaj demandoj, pri kiuj mi mem ne malofte cerbumis. Ekzemple, restas al mi tute ne kompreneble, laŭ la materialisma vidpunkto, kiel iam, ie, iel, ial materio aŭ ero de materio povis akiri ekkoncion pri sia propra ekzisto. Sed tio neniel signifas, ke oni devas serĉi klarigon per iu dio, kies ekzisto estas eĉ pli malfacile komprenebla ol la nekompreneblaĵoj, kiuj ĉirkaŭas nin.

Cetere, la teologio mem ne sukcesas liveri per sia dio respondon al multaj demandoj, kiuj neeviteble starigigas antaŭ ĉiu vigla intelekto. La katolika religio havas siajn "misterojn", pri kiuj estas eĉ peko cerbumadi. Rilate al multaj demandoj la sola racia respondo estus : **neniu scias.**

Sed dubo estas sento tro malagrabla por la plejmulto el la homoj ; ili bezonas ian kredon : deistoj kredas je

Dio, ateistoj je **Scienco**, aŭ almenaŭ al scienculoj. Nemaŭ ofte mi konstatis, ke ateistoj ne pli meritas la nomon **liberpensulo** ol la plej ortodoksa kredulo. Tial mi pensis, ke ĉi tiu libro indas troviĝi en la SAT-kolekto, ĉar ĝi liveras bonan ekzemplon de toleremo pri tio, ke deisto kaj ateisto amike interdiskutas dum longaj horoj pri demandoj, al kiuj ili donas ne saman respondon.

Verdire, jam de relative longa tempo, toleremo regas, pli malpli, rilate al la religio. En samaj landoj kaj urboj diversaj kreduloj vivas pace inter si kaj libere kultas al sia aparta diaĵo, aŭ laŭ malsama maniero al la sama dio. Ne ĉiam tiel estis...

Dume stariĝis novaj idoloj : la patrioj, en kies nomo milionoj da homoj estas ĉiam pretaj morti kaj mortigi. Ĉu eblas prave esperi, ke iam la homoj rilatos skeptike al tiu relative moderna kredo : la **naciismo** ? Almenaŭ for de mi estas ia dubo, ke tio estas tre dezirinda.

Mi konsentas, ke homo mortu pro sia kredo aŭ opinio, se ĝi (ĉu li ?) pensas, ke ĝia vivo ne plu estas vivinda en iaj kondiĉoj aŭ cirkonstancoj. Sed absolute mi rifuzas al iu ajn la rajton mortigi en la nomo de "justa", "bona", "sankta" afero.

Oni tamen ne povas dubi pri ĉio. Estas tute certe, ke nun mi sidas ĉe tablo kaj skribas ĉi tiun antaŭparolon. Sed, ĉu ĝi havas ian valoron ? Pri tio la leganto rajtas dubi. Mi mem havas nenian certon tiurilate. Almenaŭ mi scias laŭsperte, ke per tiu pridubinda laboro mi dume forgesas pri la frenezajoj de diversspecaj, diverskoloraj kreduloj...

*

Rilate al la traduko mem, la legantoj bonvolu ankaŭ rilati tolereme al mia kompreno pri gramatiko. Mi havas grandan respekton por la Zamenhofs Fundamento kaj tute konsentas, ke ĝi devas esti netuŝebla, eĉ rilate al "ĝiaj eraroj". Sed tio ne signifas, ke oni devas **laŭlitere** imiti tiun fundamenton de nia lingvo. Miaopinie, nur ĝia spirito estas imitinda ; kaj tiel farante mi montras pli da respekto, admiro al la aŭtoro de esperanto, ol tiuj esperantistoj, kiuj rabenece rilatas al la Zamenhofs verkaro. Krome, mi havas la tre firman konvinkon, pro kiu mi ne volus martiriĝi, nek iun ajn turmenti - ke mi agis pli

esperantece, celante liberigi min, kiel eble, el ĉia influo de naciaj lingvoj, ol se mi havus imitemon por naciaj formoj Zamenhofaj.

Estimata leganto, se, ekzemple, vi ne trovas akuzativan signon, artikolon aŭ sufikson, ĉie, kie "bonaj aŭtoroj" aŭ Zamenhof mem kutimis almeti ilin, kaj se tamen, vi facile komprenas la signifon de l' frazo, nu, komplezu al mi, pensante ke tie mi forlasis intence tiujn gramatikajn elementojn.

Mi celis kiel eble plej senbalaste uzi nian lingvon kaj opinias obeinda nur unu regulon : la **klaro**. Kredeble mia traduko redonas fidele la penson de Le Dantek kaj mi ne timas diri, ke en kelkaj partetoj ĝi eĉ estas pli klare esprimita ol en la originalo mem.

Pri tio vi rajtas dubi, kvankam mi mem ne dubas, ke kelkaj legantoj pensos, ke mi estas pretendema...

Mendoza, en la septembra monato de l' frenez- kaj mensogplena jaro 1939

E. LANTI

S-ro Fabricio Tako kaj abato Ĵozon hazarde interkonatiĝis ĉe la hejmo de komunaj amikoj, kiam ambaŭ studis, ĉe la Sorbono*, pri objektoj tute malsamaj. El tiu unua renkontiĝo naskiĝis simpatio kaj dum tri jaroj la du studentoj havis multe da plezuro ĉe revidiĝo. Abato Ĵozon faris historiajn esplorojn pri la unuaj jarcentoj de l' kristanismo, Fabricio Tako studis la pozitivajn sciencojn kaj staris ankoraŭ ĉe tiu komenca periodo, kiam oni apenaŭ divenas, sub la malfaciloj de l' komencoj, la mirindan rikolton, promesitan al la kuraĝaj serĉantoj. Tial ili interŝanĝis malmulte da ideoj, sed fariĝis tre bonaj kamaradoj kaj plurfoje, kiel bonaj filoj de kamparanoj, ili havis la grandan ĝojon iri kune sur la veran kamparon ebriiĝi per pura aero kaj suno.

Tia amo por la kampoj naskigas multe da amikaj rilatoj inter provincanoj, ekzilitaj en Parizo dum la studtempo.

Poste la hazardoj de l' vivo disigis ilin. Abato Ĵozon estis foririnta al Romo, kie li intencis daŭrigi siajn esplorojn, sed li malsaniĝis kaj kun bedaŭro devis akcepti, kvazaŭ anticipa veteraneco, la postenon de kapelpastro en iu monakejo, kies biblioteko estis sufiĉe bone provizumita.

Male, Fabricio Tako daŭrigis siajn studojn ; de la matematiko li transiris al la fiziko ; poste li sin dediĉis pasiege al la natursciencoj, al kiuj li oferis la reston de sia vivo. Bona natursciencisto havas neeviteble la deziron rigardadi al la diversaj aspektoj de l' mondo : li do vojaĝadis, li vidis homojn, bestojn kaj plantojn el diversaj kaj malproksimaj landoj ; li tre malsaniĝis kaj ĉesis vojaĝadi ; cetere li konvinkiĝis, ke oni povas trovi en sia propra lando sufiĉe da studobjektoj, kiam oni scipovas observadi ĉirkaŭ si, kaj de tiam li penadis akiri komprenon pri la aĵoj, kiujn li vidis, ne celante pri

* Sidejo de la fakultatoj pri literaturo kaj scienco de la Pariza Akademio.

observado de aliaj. Naŭmonata ĉeesto ĉiujare en laboratorioj kaŭzis, ke somere li havis la nekontraŭstareblan deziron revivi la kamparanan vivon kaj fidele li revenis dum la varma sezono al iu malfama loko el Bretonio ; tie li retrovis kun plezuro ĉiam nova la samajn malriĉajn kamparanojn malgajaj, kiuj amis lin kaj kiujn li amis ; li konis iliajn malvirtetojn, kiuj estas komunaj al la loĝantoj el ĉiuj malriĉaj regionoj, kaj li indulgeme ŝatis la kelkajn kvalitojn, kiujn la malriĉo ne malaperigis ĉe tiuj kompatinduloj.

La somero ne ŝajnis longa al li en tiu libere akceptita soleca loko, kie la ĉefaj distroj estis la rikolto de plantoj sur la marbordo kaj la fiŝkaptado ĉirkaŭ la rokoj ĉe la forfluo ; tamen li estis tre kontenta, kiam, en la komenciĝo de l' somero 1900-a, li ricevis jenan leteron :

"Kara sinjoro Tako,

"Mia sanstato devigas min pasigi kelkajn semajnojn ĉe la marbordo bretonia ; nia malnova amiko Z... sciigis al mi, ke tie vi mem estas ĉiusomere. Ĉu mi povus facile instali min en via regiono ? Mi estus tre feliĉa revidi kamaradon el mia junaĝo, post dudekjara disiĝo, kaj la perspektivo pri kelkaj interesaj konversacioj multe mildiĝus la timon, kiun nature naskas ĉe mi tiu vojaĝo al nekonata lando.

Mil bonajn memoraĵojn.
Abato Ĵozon."

Tuj s-ro Tako respondis, ke instaligo estas ebla, li certigis al abato Ĵozon, ke granda estus lia plezuro revidi lin kaj konatigi kun la regiono. Poste, kiam la letero estis forsendita, li havis ian timon.

Kiaj estos tiuj interparoloj, de kiuj la abato esperis plezuron ? En la tempo de ilia komuna junaĝo en Parizo, la du amikoj apenaŭ diskutis ; abato Ĵozon, kiu estis fervora katoliko, provis ja kelkfoje ekatiki la junan Fabricion pro tio, kion li nomis lia indiferento rilate al religio. Ĉiam Fabricio rifuzis partopreni tian diskutadon, klarigante, ke li ne sentas sian intelekton sufiĉe matura por havi pri tiuj demandoj proprajn ideojn ; aliparte, ke liaj malgrandaj studoj sciencaj jam instigis lin al singardemo kontraŭ stereotipaj ideoj, kiujn oni akceptas, ne komprenante ilin.

Tiel, dum la gajaj promenadoj tra kampoj, ili parolis nur pri floroj kaj birdoj, pri artoj kaj poetoj, temoj certe pli konvenaj por junuloj bonsanaj ol disertacioj filozofiaj.

Sed, de post dudek jaroj, s-ro Tako estis akirinta, pri ĝeneralaj demandoj, opiniojn surbazitaj kaj firmaj. Li estis konservinta sian malfidon por stereotipaj formuloj, sed li estis aplikinta siajn sciencajn sciojn al la solvo de kelkaj fundamentaj problemoj, kaj li ne povis kaŝi al si, ke la konkludoj, al kiuj li estis alveninta, ne konformis al tiuj, pri kiuj lia amiko Ĵozon provis montri ties belon. Kaj se la bona abato Ĵozon daŭre tenas sian apostolan fervoron, neeviteble la temoj de interparolado rilatos al objektoj, pri kiuj nenia interkonsento estas ebla.

Tia perspektivo timigis la honestan s-ron Tako, kies naturo estis kvieta kaj malmulte batalema. Li do decidis eviti kiom eble la filozofiecajn diskutojn ; la lingvo kaj la bretoniaj antikvaĵoj cetere liveros sufiĉe da materialo por dumpromenadaj konversacioj kaj eble fiksos la atenton de la abato ĝis tia grado, ke li ne celos pro-religie argumentadi. Tamen, se ne eblos eviti tiajn argumentadojn, s-ro Tako kun rezigno profitos la okazon por analizi la spiriton de honesta kaj sincera homo, kies opinioj estis tute kontraŭaj al tiuj, kiujn li opiniis la sole logikaj.

En tia stato de duontrankvilo li atendis la alvenon de sia malnova kamarado. Iom post iom li tamen havis la ideon pri eblaj diskutoj, kaj, eble ne konfesante tion al si mem, li deziris tiujn konversaciojn, kiujn unue li timis ; li do sin preparis por ilin alfronti, kiam ili okazos, kun la trankvilo, kiu konvenas al homo konvinkita pri la logikeco de sia rezonado.

PRI METODO KAJ ARGUMENTO PER AŬTORITATO

Abato Ĵozon estis tre malgrasa kaj lia vizaĝo surhavis signojn pri longa kaj dolora malsano ; s-ro Tako vidante lin forgesis ĉiujn filozofiecajn zorgojn ; li riproĉis al si tiun specon de instinkta malfido, kiu trudokupis lin dum la antaŭaj tagoj, kaj li penis ne vidigi al sia amiko la malĝojigan impreson, kiun kaŭzis la revido de la malfortiginta kaj malgrasiginta bela junulo iama. Kun granda amemo ili parolis pri la pasinta tempo ; ili elvokis la memoraĵojn plenaj je vivo kaj juno, kaj ili decidis baldaŭ rekomenci, ĉe la bretonia marbordo, la agrablajn promonadojn el la studentaj jaroj.

Post kelkaj horoj, pasigitaj en la instalado de la alveninto, la du amikoj renkontiĝis denove ĉe manĝotablo kaj gaje vespermanĝis. S-ro Tako sciigis sian amikon pri mil detaletoj, rilataj al la lando ; li rakontis kelkajn karakterizajn trajtojn de la kamparana moro kaj abunde parolis kun vera plezuro pri ĉio, kio koncernis tiun tre amatan parton de tero.

Dum finiĝis la manĝado, ruĝa lumo plenigis la ĉambron. La seĝoj estis ŝovitaj al la fenestro. Super la malaltaj insuloj de la marbordo la brilega suno aspektis grandega kaj ĝiaj rebriloj donis al la golfeto nedifineblan koloron ; iom post iom la ruĝega disko entranciĝis ; fine ĝi malaperis, lasante ĉe sia loko lumeton disigintan sur la nuboj kaj reflektitan per la maro.

Silente la du amikoj ĉeestis tiun beleĝan spektaklon.

- La vizado de la sunsubiro malantaŭ la insuloj estas unu el niaj grandaj ĝojoj en ĉi tiu lando. La fenomeno montriĝas laŭ tiom variaj kondiĉoj, ke, ĉiuvespere, ĝi ŝajnas al mi nova ; ĝi havigas al mi piafektan admiron, kiu plu daŭras, en la sereno de l' krepusko, ĝis la horo de l' dormo. Mi esperas, kara abato, ke, se la vetero daŭre estos bela, vi baldaŭ sentos la bonfarajn efikojn de niaj kvietaj vesperoj bretoniaj.

La abato aspektis kvazaŭ li dronus en ekstazo. Fine li diris :

- Neniam ĝis nun mi estis vidinta ion similan ; via

malalta golfeto, disŝutita de rokoj, ne similas al la bordoj de l' Mediteraneo, la sola maro, kiun mi antaŭe vidis ; ŝajnas, ke ĉiuj insuletoj estis intence lokitaj en tiu kvieteta dekoracio por plezurigi la okulojn ĉe la sunsubiro. La diversaj aspektoj de l' mondo mirigas la vojaĝanton, kiu rekonas sub tiom da diversaj aspektoj la harmonian unuecon de l' verko de Dio.

S-ro Tako restis silenta ; li memoris pri la religieca formo de la entuziasmoj de sia amiko dum la iamaj promenadoj kaj li timis, ke la konversacio alprenu formon ne favoran al kvietata digestado dum la paco de l' vespero...

- Mia kara s-ro Fabricio, fine diris la abato, mi ne forgesis pri via indiferento iama rilate religion, sed senripoze mi laboris dum dudek jaroj kaj mi konas vin sufiĉe por scii, ke via laborado estis fruktodona ; tial mi pensas ke via intelekto malfermiĝis al la eternaj veroj kaj ke vi mem konstatis la pravon de l' bela parolo de Bekn* : Supraĵa scienco puŝas nin for de Dio, profunda revenigas nin al Li.

- Bekn, malrapide respondis Fabricio, estis geniulo kaj kun profunde honora sento mi memoras pri li ; sed mi ne emas akcepti ĉiujn liajn pikparolojn kiel neprajn verojn. Cetere, kio estis tiu "profunda scienco", pri kiu li parolas ? Profunda, sendube, por liaj samtempuloj, super kiuj li havis la antaŭenecon, kiu karakterizas la genion ; supraĵa por ni, kiuj hodiaŭ estas riĉaj per la akiroj de l' deknaŭa jarcento. En la tempo, kiam mi havis la plezuron renkonti vin en Parizo, mi, simpla studento, jam posedis pli da sciencaj scioj ol Bekn per sia genio. La lernantoj de niaj liceoj, kiuj konsideras kiel enuetigan kaj penigan taskon lerni la leĝojn de la fiziko kaj kemio, ne supozas, ke en la antaŭa jarcento la plej potencaj intelektoj homaj estus akceptintaj kun granda feliĉo la plej elementajn el la veroj sciencaj, kiuj hodiaŭ plenigas la lernolibrojn de la duagrada instruado.

- Eble, diris la abato, ne estas juste, interpreti via-maniere la vorton "scienco" el la parolo de Bekn, kaj mi povus montri al vi, ke tiu bela penso havas signifon, sendependa de la epokoj ; sed ĉar la hazardo kondukis nin sur la kampon de l' religiaj kredoj, mi ŝatus ekscii, kiu estas via nuna starpunkto ; ambau ni havas

* Bacon.

sentojn, kiuj ebligas, ke ni amike povu diskuti kaj, se vi konvolos klarigi al mi la staton de viaj konvinkoj, eble mi havos la feliĉon montri al vi la malfortan flankon de via rezonado kaj rekonduki vin al la vero.

- Mi rimarkigos al vi, mia kara abato, ke vi iom tro rapidas ; vi malaprobas miajn rezonojn, antaŭ ol vi konas ilin, tial ke vi supozas, ke ili inspiras al mi konkludojn, kontraŭaj al tiuj, kiujn oni instruis al vi ; tio ne estas viaflanke garantio pri senpartieco dum la diskutado ; sed mi avertas vin, ke vi trovos en mi obstinan kontraŭulon : dudekjara studado super la naturo kaj penado por ĝin kompreni havigis al mi firman konvinkon kaj, tial ke mia sola deziro estis eltrovi la veron, mi tute sincere serĉis la kontraŭdirojn, kiujn mia sistemo povus naski. Ŝajnas al mi neverŝajna, ke vi povus dum kelkaj horoj ektrovi en miaj rezonoj malfortajn flankojn, kiujn mi ne estus vidinta dum dudek jaroj.

- Mia kara s-ro Fabricio, respondis la abato, vi certe ne malakceptos la aŭtoritaton de scienculo kiel s-ro Dukloo*. "Kio estas scienca rezonado ? li diras ie. Tute simple ĉi tio : rezonado farita kun la utila timo erari kaj la firma volo eviti ties okazon." Se vi efektive volas ne erari kaj havas la sinceran deziron ekkoni viajn erarojn, vi devus konsenti, ke estas tre utile diskuti pri viaj ideoj kun malsamopiniano.

- Mi certe ne atendis, kun miro diris s-ro Tako, aŭdi vin citi tiun frazon de Dukloo, kaj mi ne kaŝos al vi, ke ĝi tute trankviligas min pri la aspekto, kiun povos montri la diskutado ; mi estis kutimiĝinta, tion mi konfesas, konsideri la religiajn kredojn neakordigeblaj kun la scienca spirito kaj nepre forpuŝanta, en certon plenan je kvieto, la utilan timon erari, al kiu vi aludas. Vi havu tiun utilan timon, kiun mi mem havas kaj certe ni povos interkompreniĝi, ĉar ni ambaŭ havas sanan cerbon kaj kapablas ĝuste taksu la logikecon de dedukto.

Ekzistas elprovitaj veroj, respondis la abato, sed ni ne anticipu, kaj, ĉar ĉi tiu bela vespero invitas nin al filozofia interparolado, mi estus tre kontenta ekscii de vi, kia estas la nuna stato de viaj kredoj, kiu estas tiu **sistemo**, pri kiu vi ĵus parolis.

- Mi timus vin lacigi ĉi tiun vesperon, diris s-ro Tako,

* Duclaux.

per longa klerigado pri tio, kio ŝajnas al mi vera ; la lastan nokton vi pasigis vojaĝe kaj vi sendube bezonas ripozon.

La okuloj de la abato ekbrilis.

- Estu tute trankvila, mia kara s-ro Fabricio, li respondis. Mia korpo estas laca pro la vojaĝo, sed interesa diskutado filozofia estos al mi pli bonefika ol unuhora kuŝado kaj, cetere, mi devas konfesi al vi, ke nun mi ne povus dormi, antaŭ ol ekscii ĝis kia grado vi eraras kaj esti pripensinta la rimedon por vidigi al vi la veron.

La ĝentila s-ro Tako ne povis deteni sin rideti, aŭdante tiun novan malaprobon al sia sistemo ; li tamen ĉiel preparis sin por ekparoli, li purigis al si la nazon, tuis kaj rigardis al sia poŝhorloĝo :

- Ĝus vi memorigis, s-ro abato, li fine diris, pri tio, kion vi nomis mia indiferento rilate al religio dum la tempo, kiam ni ambaŭ estis junaj ; estus preferinde, se vi riproĉus nur pri malemo akcepti stereotipajn formulojn, ĉar la zorgo, kiun mi havas ekde dudek jaroj por akiri opinion pri tiuj ĝeneralaj demandoj pravas, ke ili interesas min. Kiam ni interkonatiĝis, tiam mi tamen konfesas, ke mi ne konsideris kiel tujan eblon por mi ekstrakti la gravajn problemojn, kiujn mi poste studadis ; mi estis nur studento pri eksperimentaj sciencoj kaj mi volis unue studi kion verkis la kleruloj ; mi sincere esperis trovi en tiu studado plenan kontentigon al mia deziro kompreni. Ĝi estas la legado de l' verkoj de Klodio Bernar*...

- Klodio Bernar estis kredulo, kiam li mortis, interrompe diris la abato.

- La legado de l' verkoj de Klodio Bernar, rediris s-ro Tako, kaŭzis mian unuan elreviĝon. Mi estis edukita kun admiro al lia genio kaj, antaŭ ol lin koni, jam mi kutimis konsideri lin kiel giganton. Mi ne kaŝos al vi, cetere, ke mi hodiaŭ lokas lin apud Pasteŭr inter la homoj, kiuj plej laboris por la scienco kaj la homaro.

- Pasteŭr ankaŭ estis spiritualisto kaj mortis kun piaj sentoj, diris abato Ĵozon.

- Pri tio ni reparolos pli poste, respondis Fabricio. Mi nur diris al vi, ke Klodio Bernar kaŭzis al mi elreviĝon : pro tio, ke kun junuleca naivo mi esperis trovi en liaj

* *Claudé Bernard.*

libroj klarigon pri la tuta fiziologio. Mi jam estis leginta multajn el liaj verkoj, ne trovinte respondon al la demandoj, kiujn mi starigis al mi, kaj estis kun reala feliĉo, ke mi dediĉis min al la studado super unu el liaj verkoj, kiuj ŝajnis al mi enhavi ĉiujn verojn, al kiuj mi sopiris ; ĝi estas la volumo titolita : **Esploroj super la fenomenoj de l' vivo komunaj al la animaloj kaj al la vegetaĵoj.**

- Tiun verkon mi ne legis, sed mi scias, ke ĝi havas aŭtoritaton, interrompe diris la abato.

- Ĝuste pro tio mi esperis trovi en ĝi la veron klare esprimita , denove daŭrigis s-ro Tako. Kaj mi ne kapablus eldiri mian ĉagreneton, kiam mi konstatis, ke tiu admirinda libro ŝajnis al mi plena de malklaraĵoj kaj memkontraŭecoj. Kun la modesto, konvena por mia aĝo, mi emis pensi, ke mi ne kapablus kompreni ; ĉiu ja interkonsentis pri tio, ke la enhavo de tiu verko estas mirinde klara ; ĉar ĝi ŝajnis al mi malklara, tio povis nur signifi, ke mi estis stultulo. Facile vi komprenas, kiom ĉagrenita mi estis ĉe tia konstato. Tamen mi ne malkuraĝiĝis kaj persiste legadis la libron de Klodio Bernar; pli ol dek fojojn mi legis ĝin, kaj ju pli mi legadis, des pli mi konvinkiĝis, ke ĝiaj malklaraĵoj kaj memkontraŭecoj estas realaj. Farante tiun konstaton, mi perdis mian unuhelpan fidon en la argumento per aŭtoritato.

- La peraŭtoritata argumento, predikeme diris la abato, estas efike uzata por konvinki la amasojn ; ĝi ne povas esti uzata koncerne al memstare pensanta homo, kiu sentas sin kapabla rezoni kaj pridiskuti la opiniojn de aliaj homoj. Ĉetere, pure homa verko ne povas konsistigi absolutan aŭtoritaton ; la senerareco apartenas nur al la verkoj inspiritaj de Dio.

- Restiŝ al mi por studi la verkoj de aŭtoro, pri kiuj mi estis aŭdinta laŭdojn, diris Fabricio ; mi komencis la legadon de **La Origino de la specoj** de Darŭin*.

- Malĝusta kaj supraĵa spirito, vortigis abato Ĵozon.

- Li ja ne havis edifan morton, rebatis s-ro Tako, sed mi devas konfesi al vi, ke la legado de lia verko kaŭzis al mi profundan admiron. Dum longa tempo tiu libro estis mia intelekta nutraĵo kaj ĝi donis al mi senfinajn ĝojojn ! Mi kredis posedi fine la admiregindan veron kaj

* *Darwin.*

mi ĝuis dum kelkaj semajnoj ian ripozon, ian perfektan feliĉegon, verŝajne similaj al la feliĉo, kiun havigas al vi via kristana kredo. Iom post iom mi komprenis, ke la tiom loga klarigo de Darŭin ne estas kompleta, sed ankoraŭ nun mi ne povas relegi tiun admirindan libron, ne estante kaptita per entuziasmo ; mi estas darŭinano ĉiufoje, kiam mi legas liajn verkojn.

- Vi priskribas al mi fidele, diris ridetante la abato, la falsajn kaj mallongdaŭrajn ĝojojn, kiujn ^{hav}igas la verkoj inspiritaj de la Malamiko de l' homoj. Mi tamen estas feliĉa konstati, ke vi scipovis taksi la malriĉon de tiu nutraĵo, malgraŭ ĝia bongusteco, kaj plezure mi notas la konfesion, ke vi ne estas darŭinano, krom en kelkaj erarhavaj momentoj.

- Mi timas, ke senvole mi erarigis nin : mi ja ne estas darŭinano, tial ke mi kredas, ke la natura selekto ne ĉion klarigas, sed mi estas transformisto tiom konvinkita kiel povis esti tiaj Darŭin kaj Lamark*. Darŭin tiom laboris por la vulgarigo de l' transformista teorio, ke oni faris el la darŭinismo la sinonimon de l' transformismo. Oni tamen povas konsenti pri la aliigo de la specoj, ne kredante, ke la darŭina klarigo estas senmanka.

- Efektive, mi ne ĝuste komprenis, diris la abato, kaj pro tio mi bedaŭras : ĝi estas plia eraro kontraŭbatalenda ; sed dume ni ne pritraktu tiun apartan demandon ; mi aŭskultas kun la plej granda intereso la historion pri via spirito kaj viaj sciencaj konvinkoj.

- Ekvidante, ke la klarigado de Darŭin ne estas tute kontentiga, denove daŭrigis s-ro Tako, mi tute perdis la fidon al la aŭtoritato de l' kleruloj...

- Kaj saĝe vi agis, interrompe diris la abato. Nur la Eklezio ricevis de Dio la senerarecon, kaj la scienculoj povas eltrovi nur akcesorajn erojn da vero. La scienco neniam kontentigos nian animon, kiu avidas la senlimecon.

- Mi do decidis, ridetante daŭrigis s-ro Tako, elprunti de l' kleruloj nur la pozitivajn rezultojn de iliaj eltrovoj ; mi penadis por starigi al mi mem rezoniĝan sintezon el la faktoj science akceptitaj, sekvante laŭlitere tiun malhumilan principon de Kartezo : "Ne atentu pri tio, kion oni antaŭe pensis aŭ skribis, sed prikonsideru nur tion, kio ŝajnas al vi mem evidenta."

* Lamark.

Abato konsente kapsignis.

- Altiris min ĉefe la privivaj fenomenoj kaj mi fervore komencis ilian studadon, kiun mi ne ĉesigis dum dudek jaroj. Mi komencis tiun studon sen ia antaŭjuĝo ; mi sciis nur, ke mi scias nenion kaj mi penadis kompreni...

- Mi tuj haltigas vin, abrupte diris la abato ; vi diras, ke vi ne havis antaŭjuĝon ; sed ne havi antaŭjuĝon, tio estas ia antaŭjuĝo, ĉar per tio vi neas la revelacion, dank'al kiu ni havas pri la naturo de l' vivo scion, kiu sufiĉas al la plej postulemaj spiritoj.

- Bedaŭrinde ĝi ne sufiĉis al la mia, trankvile respondis s-ro Tako ; vi rimarku, ke mi neniel neas la revelacion - mi ne ĉeestis tiun okazon - sed ĝi klarigas al ni la senlimecon, kiun ni ne povas kompreni, per la ekzisto de senlimeca estulo, kiu estas same nekomprenebla. Ĝi klarigas al ni la vivon per la interveno de nemateria principo en la materiaj fenomenoj, kaj mia spirito estas tia, ke ĝi ne povas koncepti tiun intervenon ; mi do ne povas esti kontentigita per klarigo, kiu respondas al mistero per alia same neklarigebla mistero.

- Sendube vi trovis pli bonan klarigon, ironie diris abato Ĵozon.

- Estas ĝuste tiu problemo, kiun mi starigis al mi, respondis Fabricio. Mi kredas, ke inter la privivaj produktoj multaj el ili reduktiĝas al fizikaj kaj kemiaj produktoj ; nu, la fizikaj kaj kemiaj fenomenoj donas al mia spirito realan kontentigon, kvankam mi neniam provis diveni ilian esencon ; mi konas kelkajn fizikajn leĝojn kaj mi konstatas, ke ĉie kaj ĉiam ili aplikiĝas ; tio sufiĉas al mi ; al la metafizikistoj la esploron pri la originaj kaŭzoj.

- Alidire, rimarkigis abato Ĵozon, vi neas la ekziston de Dio prefere ol aliri ĝis la faktoj, kiuj pruvas lian ekziston.

- Mi neas nenion, mia kara s-ro Ĵozon, kaj mi esperas montri tion al vi baldaŭ ; mi nur diris al vi, ke mia spirito tre facile akceptas la fiziko-kemiajn leĝojn kaj ke mi sentas realan kontenton ĉiufoje, kiam mi sukcesas rilatigi al tiuj simplaj kaj ĝeneralaj leĝoj iun privivan fenomenon. Multajn el tiuj fenomenoj eblas tiel rilatigi facile, kaj mia celo, de post dudek jaroj, estis esplori, ĉu **ĉiuj** sammaniere rilatas. Farante tiun esploron, mi havis, vi estu certa pri tio, nenian antaŭjuĝon ;

mi nur volis akiri pri la vivo opinion, kiu estu kontentiga por mia spirito. Mi do havis nenian motivon eviti la mal-facilaĵojn, ĉar, agante tiel, mi trompus nur min mem. Kaj se survoje mi estus haltigata, humile mi konfesus al mi, ke, en la privivaj fenomenoj, ekzistas aferoj, kiujn mia spirito ne povas atingi. Mi do estus akceptinta la ordinaran klarigon, kvankam ĝi ne kontentigas min, t.e. ke mi resignaciis je la rolo nenion klarigi. Sed tio ne okazis, kaj hodiaŭ mi firme kredas, ke nenio, en la privivaj produktoj, staras super fiziko-kemiaj klarigoj.

- Vi do estas materialisto, mia kompatinda amiko, diris la abato, kaj tio vere ĉagrenas min, konsidere vian eminenton ; ĝi estas la Providenco, kiu kondukis min ĉi tien por tiri vin el la eraro, en kiun vi enprofundiĝas rapide ; la bonfaremo de Dio estas senlima, kvankam misteraj estas liaj rimedoj.

- Mi timas, mia kara abato, ke vi devos tre penadi por tiri min el eraro, al kiu kondukis min dudekjara studado prudente pripensita ; sed estu konvinkita, ke mi estos kontenta koni viajn argumentojn ; mi kontraŭparolis min mem tiom, kiom mi povis, kaj mi estos al vi danka, se vi mem kontraŭparolis al mi. Bedaŭrinde, mi timas, ke viaj historiaj studoj ne taŭge preparis vin por diskutado el scienca fako. Cetere, mi konfesos al vi, ke ĉe la komenco de miaj esploroj mi ne kredis, ke plena kompreno super la privivaj fenomenoj estas ebla ; mi memoras, ke mi dediĉis multe da tempo por observi per mikroskopo la vivon de la plej simplaj estaĵoj, de tiuj estaĵoj, kiuj estas nur senforma gelateno kaj kiuj vivas ! Dum pluraj monatoj tiu spektaklo altiris kaj logis min, preskaŭ nenion instruante al mi, kaj ofte mi spertis antaŭ tiuj elementaj fenomenoj kapturigaĵan impreson. Nur iom post iom mi sukcesis kompreni **ĉiujn** privivajn produktojn de la protozooj kaj konstati la fizikajn kaj kemiajn fenomenojn, kiuj klarigas ilin. Mi ne miras, ke vi celante studi senprokraste la homon, kiu estas la plej komplika estaĵo, tuj ricevas tiun kapturigaĵan impreson, kiun mi spertis antaŭ la amebo, kaj ke vi tuj opinias ridinda ĉiun fiziko-kemian provon klarigi la vivon.

- La materialismo estas definitive malaprobata, proklamis la abato ; estas konstatite, ke ĝiaj klarigoj estas nekompletaj...

- Ne estas juste malaprobi teoriojn, ne konante ilin, interrompis s-ro Tako, kaj se nekompletaj teorioj estis elmetataj en epoko, kiam la scienco estis ankoraŭ tro juna, ilia malaprobo ne sekvigas nepre tiun de la sistemoj, pli kaj pli firmaj, kiuj stariĝas sur la novaj eltrovoj de la fiziologio. Eble la spiritualistoj agus saĝe, se ili lernus la sciencojn antaŭ ol deklari, ke la scienco bankrotis.

- La simpla saĝo, rerespondis la abato, sufiĉas por ekvidi, kiom vanaj estas la klarigoj, kiuj neas la superajn principojn, kies evidenton montras nia racio.

- Sekve, simpla saĝo mankas al mi, respondis s-ro Tako kun iomete da malbonhumoro.

- Mi petas al vi pardonon, mia bona amiko, diris la abato ; mi estas tiom mirigita ĉe la konstato, ke homo, kia vi, estas konvinkita materialisto, ke mi ne sufiĉe atentis miajn parolojn. Ĝis nun mi estis renkontinta materialistojn kaj ateistojn inter drinkuloj, kiuj aŭdis en publikaj kunvenoj kelkajn stereotipajn formulojn, sed mi ne pensis, ke la sama mensa difekto povus esti, ĉe inteligenta homo, la rezulto de longaj kaj profundaj pripensoj. Por mi, kiu **scias**, ke la vero estis revelaciita, por mi, kiu konas kaj amas tiun luman veron, estas malfacile kompreni, ke homa animo, plena de sincero kaj bonvolo estas fermita al tio, kio estas evidenta al la plej simplanimaj homoj.

- Tamen, kontraŭdiris Fabricio, ni supozu, ke tiu luma vero ne akordas kun la eltrovoj de la scienco...

- Tio ne eblas, interrompis la abato ; per tio mem, ke ĝi havas dian originon, la revelaciita vero povos tiri el la eltrovoj, kiujn Dio permesos al la homa scienco, kontrolon, kiu igos ĝin pli evidenta ; sed la scienco kaj la religio ne povas konflikti inter si ; la partetoj da scienco, kiuj estas senpere kompreneblaj de l' homo, povos nur harmonie kunfandiĝi en la grandan lumon de l' revelacio.

- Tamen, persiste asertis s-ro Tako, se okazus interkonflikto...

- Ĝi rezultus el eraro de interpretado, memfide respondis abato Ĵozon. Ne ekzistas du malsamaj veroj, kaj se iu scienca eltrovo ŝajnas kontraŭdiri la religion, tio signifas, ke tiu eltrovo estas parte erara ; pli malpli

frue, per la helpo de Dio, la scienculoj ekvidos, ke ilia troa memfido erarigis ilin, kiam ili kredis trovi en la scienco kontraŭdogman argumenton.

- Vian serenon mi admiras, diris s-ro Tako, sed mi konfesas al vi, ke la saman mi havas. Mi kredas pri la scienco, kiel vi mem pri la revelacio, kaj mi estas konvinkita, ke la scienco ektrivos tion, kio estas erara en la dogmaro, al kiu vi atribuas diecan originon. Mi ne diras, ke la scienco donos al vi demonstron pri la neekzisto de Dio ; ĝi demonstros al vi, ke ĉio okazas, kiel se Dio ne ekzistus, kaj tial ke Dio klarigas ĉian misteron, anstataŭigante ĝin per alia pli granda mistero pri sia propra ekzisto, eble vi forlasos tiun nocion, kiun vi ricevis de niaj malkleraj prauloj.

- Mi estas konfuzita per tiom da memfido, redaŭrigis la abato ; permesu al mi nur proponi al vi rimarkigon, kiun mi trovis en libro, antaŭnelonge aperinta (1) : "La racio de la ateistaj vulgarigistoj sin apogas al Kartezo ; ilia scienco, al Njuton* ; ilia metodo, al Bekn. Nu, Njuton skribis : "Dio regas ĉion, ne kiel la animo de l' mondo, sed kiel absoluta suvereno super tio, kio ekzistas. Potenco, Providenco, celaj kaŭzoj, konsistigas la Diecon". Kartezo* skribis : "Se ekzistas homoj, kiuj ne estas sufiĉe konvinkitaj pri la ekzisto de Dio kaj de sia animo, mi volas, ke ili eksci, ke ĉio, pri kio ili kredas esti certaj, kiel, ekzemple, ke ili havas korpon, tio estas malpli certa." Bekn skribis - tion mi ĵus diris al vi : "Supraŝa scienco forpuŝas de la religio, profunda revenigas al ĝi."

- Mi konsideras Kartezon, diris s-ro Tako, kiel la plej grandan geniulon, pri kiu la homaro povas fieri, sed, nek Kartezo, nek Njuton, nek Bekn konis la sciencajn eltrovojn de la 20-a jarcento, kaj, permesu al mi certigi tion al vi plenscie, kio konsistigis la sciencan en la tempo de Kartezo, tio estas, rilate al la hodiaŭa scienco, guto da akvo, kompare al la oceano.

- Ĉar vi ne akceptas tro la malnovan aŭtoritaton de tiuj tri geniuloj, respondis la abato, vi ne forneos almenaŭ tiun de Pasteur, kiu vivis en la 20-a jarcento kaj, tion vi certe konsentos, modeste kontribuis al la antaŭeniro de l' sciencoj en tiu lumanta epoko.

(1) **La Kristaneca Pozitivismo** (pĝ. 12) de Godar.

* *Newton, Descartes.*

- Ĝuste ĉi tie mi havas la n-ron de **La Dusemajno**, kiu recenzas la libron de s-ro Valeri-Rado, diris s-ro Tako, kaj mi scias pri kiuj pecoj vi aludas ; ilin mi markis per signileto kaj, se vi konsentos, mi legos ilin al vi, kvankam verŝajne la katolikaj revuoj tedis vin per ilia ripetado. Dio mia, kioman uzadon oni faris el tiu **Vivo de Pasteŭr** ! Kiom valora kaptaĵo por la spiritualistoj estas la spiritualismo de tiu geniulo !

- Ni tamen relegu ilin, konsentis la abato ; tie troviĝas grandaj veroj, kiujn oni ĉiam aŭdas denove kun profito.

S-ro Tako iris por preni la broŝuron kaj baldaŭ alportis ĝin.

- Jen estas unue, li diris, la parolado ĉe Medicina Akademio. "En ĉiu el ni estas du homoj : la klerulo, kiu nuligis la antaŭjuĝojn, kiu per la observado, la eksperimentado kaj la rezonado volas akiri scion pri la naturo, kaj la sentemulo, la tradiciulo, kiu priploras la morton de siaj infanoj, kiu, ho ve! ne povas pruvi, ke li revidos ilin, sed kiu kredas kaj esperas tion, - kiu **ne volas** morti kiel mortas bakterio, - kiu diras al vi, ke lia interna forto aliĝos. La du kampoj estas malsamaj kaj ve al tiu, kiu volas, en la nekompleta stato de niaj scioj, uzurpe rilatigi ilin inter si."

- Tio estas vigle pensita kaj klare dirita, vortigis la abato ; la du kampoj estas malsamaj ; la eltrovoj de l' scienco ne povas trafi la kredon.

- Pasteŭr asertas per tio, ke li ne **volas** morti tute, respondis s-ro Tako ; multaj personoj tiel pensas kaj **volas** kredi pri la eterna vivo ; tio ne estas demonstro, sed multaj kredoj estas klarigeblaj per tiu deziro. Rilate al tio, ke en ĉiu el ni estas du homoj, tiu metaforo agrable esprimas la interlukton de la heredaĵo kaj de la edukado laŭ larĝa senco. Kaj mi eĉ diros al vi, ke pri tiu dupartiĝo de la personeco, Pasteŭr liveras nerefuteblan pruvon en la peco, kiun ni ĵus legis ; tute certe ne estas la **klerulo**, kiu apriorie apartigas la kampon de la scienco disde tiu de l' kredo ; kaj se ne estas la klerulo, kian valoron ricevas tiu aserto de la fakto, ke Pasteŭr eldiris ĝin ?

- Via rezono estas tre subtila, mia kara s-ro Tako, respondis la abato, sed ni aŭdu plue el tio, kion diris la eminentulo en sia parolado ĉe la kolegio de Arbua.

- Precize tion mi signis sur alia paĝo de **La Dusemajno**; mi vere miras ĉe la konstato, ke la apostoloj de la Eklezio bezonis mal multe da tempo por ekkoni la bonajn pecojn el la paroladoj de tiu kompatinda Pasteŭr. Jen estas, mia kara abato, la petita paragrafo : "Ĉu vi scias, kion postulas plimulto el la liberpensuloj ? Nu, por iuj, la liberon tute ne pensi kaj esti servutigitaj de la malklero ; por aliaj, la liberon malĝuste pensi ; por la ceteraj, la liberon esti superregataj de la instinktaj inspiroj kaj malŝati ĉiun aŭtoritaton kaj ĉiun tradicion".

Ĉi tie s-ro Tako interrompis sian legadon :

- Volonte mi lokus min en la trian kategorion el liberpensuloj, kiuj malŝatas la aŭtoritaton kaj la tradicion, sed mi malfacile povus konsenti al tio, ke miaj rezonoj estas inspiroj de la instinkto ; mi timas, ke la oratoro uzis tie efektan vorton, kiu eble ne estis tute ĝusta.

- Kiel vi mi tion kredas, diris la abato, sed tiu parolado estis destinita por infanoj kaj necesis precipe frapi ilian imagon per fortaj esprimoj, por gardi ilin for de la eraraj teorioj, kiuj ĉie renkontiĝas.

- Tiuj esprimoj estas certe tre fortaj, diris s-ro Tako, kaj li daŭrigis sian legadon : "La libera penso laŭ la Karteza senco, la libero en la penado, la libero en la esplorado, la rajto konkludi pri la evidentajo kaj al ĝi konformigi sian konduton, ho! ni havu kul-ton por tiu libero ; estas ĝi, kiu kreis la plej poluritan kaj plej fekundan parton de la moderna socio ; sed la tiel nomata libera pensado, kiu postulas la rajton konkludi pri io, kion ni ne konas precize, - la libero, kiu signifas materialismon aŭ ateismon, tiun ĉi liberon ni forpeli energie".

- Brave, diris abato Ŝozon.

- Brave, ripetis ridetante s-ro Tako. Se ja liberpensulo postulas la rajton konkludi pri io, kion li ne konas, li estu anatemita ! Sed kion do vi diras pri liberpensulo, kies rezonado baziĝas nur sur vero evidenta, nekontesteb-la, kaj kiu tial konfliktos senvole kun la dogmo ?

- Tio estas neebla, tion mi jam diris al vi, respondis abato Ŝozon.

- Pri tio ni diskutos alian fojon, tial ke jam estas malfrue, redaŭrigis s-ro Tako ; sed ĉar ni parolas pri Pasteŭr, lasu min diri, kiom granda estas mia admiro por liaj eterne famaj eltrovoj ; vi vidos, mia kompatinda amiko, ke la akiraĵoj de tiu spiritualisto donos al la ma-

terialismo neŝanceleblan bazon. Pasteŭr, laŭ kruela ironio, estos la patro de l' scienca materialismo, kaj tio eble estos lia plej granda merito por gloro en la estonto. Sed li naskiĝis en familio el kreduloj, li estis ĉirkaŭita de kreduloj dum sia tuta vivo kaj tiom, kiom mi povis ekscii de unu el miaj amikoj, kiu longe rilatis kun li, neniam li konsentis multe okupiĝi pri demandoj de alta filozofio. Li ne volis morti kaj li timis ĉion, kio pensigis lin pri la morto. Vi do vidas, ke la cititaj paroloj ne indas esti serioze konsiderataj kiel argumentoj per aŭtoritato ; mi pli ŝatas la aŭtoritatecon de liaj sciencaj laboroj kaj mi limigas min per ili.

- Vi estas tro memfida, s-ro Tako, predikeme diris la pastro ; vi mem konsentas, ke ne ekzistis pli granda geniulo ol Pasteŭr, kaj vi ne akceptas la konkludojn, kiujn li mem faris el siaj propraj studoj.

- Se memfido signifas malakcepton al tio, kio ne kontentigas mian logikon, tiukaze mi ja estas riĉa je memfido, respondis s-ro Tako ; jam mi diris tion al vi, mi ne povus esti konvinkata de peraŭtoritata argumento. Cetere, por konsoli min, mi rediras al mi, ke la kredoj de Pasteŭr, li mem tion asertas, neniel rezultis de liaj studoj. Pasteŭr estis spiritualisto per la familio kaj la medio ; liaj filozofiaj ideoj ne evoluis paralele kun liaj eltrovoj ; ili jam estis enplantitaj kaj ne elradikigeblaj, kiam li komencis studi ; cetere, ĝis tiam neniu klerulo ekzistis, kies verkoj povus esti fonto, el kiu la juna Pasteŭr ĉerpis kredon en la priviva determinismo, kiun liaj disĉiploj tiris el liaj eltrovoj. Necesas esti juna kaj havi flekseblan spiriton por povi libere direkti sian kredon ; kiam Pasteŭr eltrovis la purajn kulturojn, li jam estis tro multjara ; li estas laborinta por siaj posteuloj. Vi mem, sinjoroj ekleziuloj, tre bone scias, kiom malfacile estas elradikigi la kredojn plantitajn en la cerbo de infano, kiam ĝi fariĝis plenkreskulo, kaj pro tio la instruadon de la katekismo vi opinias tre grava.

- La katekismo, diris la abato, estas utila afero ; ĝia lernado malebligas, ke la malbonaj semoj enplantiĝu ĉe tiu, kiu estis provizata per ties bonegaj principoj.

- Ni do interkonsentas, rebatis Fabricio. Pasteŭr estis antaŭŝirmita per sia religia edukado kontraŭ la materialistaj konkludoj, kiujn li povus tiri el siaj studoj.

Li estis kredulo, antaŭ ol esti scienculo, kaj lian kredon ne detruis lia scienco. Tio ne malebligas, ke lia giganta verko malfermis al liaj posteuloj horizontojn, kiujn li ne volis vidi.

- Vi prave avertis min, ke vi estas obstina, mia kara s-ro Tako, respondis la abato. Mi vidas, ke vi estas tute ligita al la eraro kaj ĝis grado, kiun mi opiniis home neebla; sed vi eraras kun tiom evidenta sincero, ke Dio kompatos vin. Estu mi, se eble, tiu, kiu montros al vi la lumon !

- Pri tio mi dubos, mia kara abato, diris Fabricio ; sed mi estos certe tre danka al vi pro via penado. Plie tion mi konfesas al vi, estos al mi tre interese observi, ĉe la komenco de l' 20-a jarcento, inteligentan homon, kiu povas tute sincere kontentiĝi per la kristana doktrino. Ni ambaŭ estas reciproka miroobjekto, ni do havos grandan profiton kaj grandan plezuron interparoli ; sed mi tre bedaŭras, ke mi tenis vin veka tiom malfrue ; ni iru enlitigi.

- Ni iru en liton, konsente diris abato Ĵozon, kaj la lumo ekbrilu al vi !

- Amen, diris Fabricio.

LA SUPERSTIĈO KAJ LA GEOLOGIO

Plumanak estas malriĉa vilaĝo el fiŝkaptistoj ; la haveno estas nature fermita per grandegaj rokoj granitaj; ĝi komunikas kun la marmezo nur per mallarĝa trair-ejo kaj tiel donas al la ŝipetoj sekuran ŝirmejon kontraŭ la furiozaj ventegoj. Ĉe la malglata bordo de l' Manika Maro, antaŭ kelkaj jaroj*, malmulte da lokoj estis pli mizeraj ol Plumanak ; malriĉaj pajle kovritaj dometoj kaŝiĝis inter la grizaj rokoj kaj la homoj vivis miksite kun porkoj, kiujn ili grasigis per produktoj el la maro. De kiam la marbordoj estas, dum somero, invaditaj per la amaso el la grandaj urboj, Plumanak spertis la komunan sorton ; tie oni konstruas vilaojn ; kelkaj estas simplaj, la aliaj pretendemaj, sed la dometoj de la tieuloj restas same malriĉaj, same malpuraj, kaj la sterkakvo ankoraŭ fluas laŭ mallarĝaj vojetoj inter la loĝejoj de l' homoj kaj la porkaj sterkamasoj.

El la tuta tiom pentrinda marbordo el Bretonio, neniu pejzaĝo estas pli strangeta. Miloj da gigantaj rokoj rondformaj staras en eksterordinaraj amasoj. Pri ili la imago de l' turistoj trovis figurojn kaj similaĵojn. Jen estas ĉi tie monstra elefanto, sur kies dorso kuŝas, per ia miraklo, en ekvilibro, testudo kun pufa kiraso. Tie, grandega limako ŝajnas manĝi fungojn, kies ĉapeloj povus ŝirmi kelkajn rajdantojn. Pli malproksime, simetria fendo, inter du kolonformaj amasoj el rondaj rokoj, prezentas la breĉon de Rolan**... Ĉiupaŝe la vojaĝanto havas surprizon ; ĝi estas iu nepriskribebbla intermiksiĝo, ia kaoso el grizaj kaj ruĝaj amasoj, kies grandioza tutaj turmentas la spiriton. Oni unue admiras, sed baldaŭ oni suferas, oni sufokiĝas meze de tia spiritkonfuzanta mallogikaĵo, oni deziras kvietan pejzaĝon kun simplaj kaj larĝaj linioj...

S-ro Tako promene gvidis sian amikon inter tiuj naturaj mirindaĵoj ; ĉiumomente abato Ĵozon eldiris

* *Rim. de l' trad. : la aŭtoro skribis en 1901.*

** *France : Roland. Fama kavaliro el la 8-a jarcento, pri kiu legendo rakontas, ke per sia glavo li fendis rokegon, tiel farante breĉon en montaro.*

sian surprizon kaj admiron, sed eksentis fine lacon, pri kiu li ne klare konsciis ; ĝi estis kun efektiva kontentiĝo, ke li alvenis ĉe la bordo de golfeto, el kiu la vido ampleksis larĝan strandon el delikata sablo kaj sufiĉe grandan spacon da trankvila maro.

- Jen estas, diris s-ro Tako, la loko, kie elŝipiĝis nia apostolo Guirek, kiam li venis el Irlando, en ŝtona trogo, por prediki evangelion al la krudaj loĝantoj el Arvor. Cetere vi povas vidi sur tiu roko iun etan konstruon eksterordinaran, kies aĝo estas nekonata kaj kiu enhavas la statuon de l' patrono de la regiono.

- Ĉu tiu Guirek estas aŭtentika sanktulo ? demandis la abato ; mi ne memoras iam esti aŭdinta lian nomon.

- Guirek estas regiona sanktulo, respondis s-ro Tako, kaj la tieuloj pro tio havas por li tiom pli da respekto ; ili ne povus havi tiom da fido al pli diskonata sanktulo, kiu devus aŭskulti tro grandan nombron da piuloj. Ĉi tiu estas ilia propraĵo, kaj ili certe ne volus esti al li malpiaj. Oni rakontis al mi, ke antaŭ kelkaj jaroj la pastro de la paroko surprize forportigis la respektingindan statuon lignan kaj anstataŭigis ĝin per virgino, aĉetita en bonfama magazeno. La indiĝenoj estis malkontentaj kaj necesis restarigi la bone konatan maljunan sanktulon por eviti, ke la Senmakula Gravediĝintino estu malrespektota. Vi vidos, proksimiĝante al la statuo, ke la kulto por tiu bona Guirek ne malfervoriĝis.

Ambaŭ amikoj ekstaris kaj faris kelkajn paŝojn sur la sabla bordo.

- Vidu, mia kara abato, en kia mizera stato estas tiu kompatinda sanktulo ; la tuto de l' statuo estas perfekte konservita kaj bone prizorgita, sed ĉe la loko de l' nazo, restas nur nigra truo, en kiu vi povas vidi plurajn pinglojn.

- Efektive, diris la abato surprizite.

- Vi ne kredu, mi petas, denove parolis s-ro Tako, ke tiu stumpigo al la statuo signas ian ajn malrespekton al la religio ; male, ĝi rezultas de la stranga kulto, kiun nia malklera loĝantaro sentas por tiu bonega Guirek. La junulinoj, kiuj deziras edziniĝi, vizitas la sanktulon kaj mallonge preĝas al li ; kiam la preĝo finiĝis, tiam ili forprenas el sia korsaĵo pinglon kaj ĝin pikas en lian nazon, por ke li ne forgesu la komision ; kaj tion ili faras kun la plej granda respekto.

Abato Ĵozon plenkore ekridis.

- Jen estas ja, li diris, stranga maniero honori la sanktulojn.

- Plimulto de niaj vilaĝoj maraj, redaŭrigis s-ro Tako, havas sian lokan sanktulon ; laŭ la ĝenerala kredo ĉi tiea tia sanktulo venis el Irlando per ŝtona trogo, tial ke por loĝantaro el fiŝkaptistoj ne povas esti pli granda miraklo ol naĝado de granitpeco. Pri la irlanda origino de la unuaj apostoloj, kiuj predikis la evangelion en Bretonio, ĝi estas verŝajna.

- Irlando estis, diris la abato, privilegiita lando malgraŭ sia malproksima kaj izolita situacio ; ĝi ne nur estis frue instruata, sed ĝi provizis bonajn apostolojn, kiuj fondis multajn monakejojn en la kontinenta Eŭropo. Mi ne supozis, li aldonis ĝemetante, ke troviĝas en la katolika Bretonio tiom maldelikataj superstiĉoj kaj ritoj, kiuj memorigas tiom precize la paganan fetiĉismon.

- Mi tre timas, mia kara amiko, respondis Fabricio, ke vi tiurilate multe elreviĝos. Se malaperus el la bretona kredo la neortodoksaj superstiĉoj, tiam de ĝi restus malmulto. Cetere, mi opinias, ke malgranda estas la diferenco inter la farkutimo meti pinglon en la nazon de l' bona Guirek kaj tiu pri leteroj kun mono, adresitaj al sankta Antonio el Paduo.

- Antonio el Paduo, iom seke rebatis la abato, estas sanktulo agnoskita de la Eklezio ; li faris multe da aŭtentikaj mirakloj kaj la kulto al li estas tute prava.

- Verŝajne la loĝantoj el Plumanak facile menciis al vi multajn miraklojn, kaŭzitaĵoj de sankta Guirek. En ĉi tiu lando ankaŭ ne mankas miraklaj ŝtonoj kaj fontanoj, kies reputacio certe estas tre antikva, kies kuracaj efikoj estas multe pli konataj de la indiĝenoj ol la multigo de l' panbuloj aŭ la reviviĝo de Lazaro. Kiam la kristanismo estis enkondukata en Bretonio, tiam ĝi verŝajne koliziis kun tre malkleraj popoloj, ligitaj al siaj lokaj kultoj ; ĝi eble malsukcesus, provante detrui tiujn tradiciajn kredojn ; ĝi preferis anstataŭigi ilin nepercepteble : oni metis la miraklajn fontanojn sub la alpreĝon de l' plej konataj sanktuloj kaj iom post iom, dum la loĝantoj neniel ŝanĝis la superstiĉajn ritojn, la nomo de l' sanktulo forgesigis tiun de l' fontano ; la mirakloj daŭris kiel antaŭe, sed pravigitaj per la ĉesto de statuo de Petro, de Paŭlo aŭ de Nikodemo. Kaj jen tiel Bretonio fariĝis katolika.

- Via maliceta ateismo, diris la abato, emas prezenti sub ridinda aspekto la konkeron super ĉi tiu barbara lando fare de la apostoloj ; la Eklezio registris aŭtentikajn miraklojn, kiuj havas nenion komunan kun la superstiĉaj virtoj, atribuitaj de la antikvuloj al la fontanoj.

- Vespere, kiam ni foriros el Plumanak, respondis s-ro Tako, ni veturos iom deflankiĝe de l' rekta vojo kaj mi montros al vi kapelon, kiu estas tre interesa koncerne la aliĝon de l' paganaj kultoj. En iu kampo troviĝas iu starigita ŝtonego, iu **menhiro**, kiel diras tiuj, kiuj kredas, ke la konstruintoj de megalitaj monumentoj parolis bretone. Ni ne konas daton pri tiuj monumentoj, laŭdire druidaj, sed estas verŝajne, ke ili estas treege antikvaj. La menciita menhiro havas la reputacion doni forton al tiuj, kiuj frotas sian dorson kontraŭ ĝin kaj kiuj poste iras lavi sin ĉe la najbara fontano.

De kiam datiĝas tiu superstiĉo ? En kiu epoko la nomo de l' fama judo Ŝimŝon ligiĝis al ŝtono, donanta forton ? Mi ne scias. Ĉiaokaze estas fakto, ke tiu menhiro nomiĝas la ŝtono de Ŝimŝon. Kaj je kelkmetra distanco de la ŝtono staras kapelo, konstruita fine de la 16-a jarcento. Tiu kapelo entenas lignan statuon, kiu pli malpli prezentas episkopon kaj kiu havas jenan surskribon : **Sankta Ŝimŝon**. Tiel ke la menhiro, patronata de sanktulo, daŭrigas doni forton al tiuj, kiuj venas fronti sin al ĝi.

- Estas bedaŭrinde, diris la abato, ke la alligiteco de l' Bretonoj al la lokaj legendoj devigis la pastraron uzi tiajn artifikaĵojn ; sed se tio ĝenas tian erudiciulon, kia vi, tio estas malgrava rilate al tiuj malkleraj kamparanoj ; ili same fervore adoras Dion en kapelo, kies nomo estas tiu de apokrifa sanktulo ; la gravaĵo estas, ke ĉia eblo pri mirakla interveno estu rilatigata, ĉu rekte aŭ malrekte, al tiu, kiu sola povas fari miraklojn.

- Mi ne riskus aserti, denove parolis Fabricio, ke, en la penso de l' tieaj kamparanoj, sankta Ŝimŝon aŭ sankta Guirek ricevas de Dio sian potencon ; ili verŝajne kredas, ke tiuj respektindaj sanktuloj havas mem la kapablon doni forton aŭ baldaŭigi edziĝojn. Sed la etiketo estas respektita kaj ĉio tio aspektas tre katolika. Se vi scipovus la bretonan lingvon, mia kompatinda amiko, kaj demandus, pri la kredo, tiujn bonajn kristanojn el nia sovaĝa regiono, vi ektrovus, ke la superstiĉo estas abunde miksitita kun la dogmo. Pli kaj pli malaperas la kredo al

la fantomoj kaj al la dumnoktaj lavistinoj, al la ĉareto de l' morto kaj al la malbonaŭgura antaŭsigno de virkoko kikerikanta ĉe luna lumo, sed la liberpensuloj, kiuj neas la ekziston de tiuj teruraj aferaĵoj, estas ĝuste la samaj homoj, kiuj ne plu ĉeestas diservon kaj **mokas** la ridindaĵojn de l' pastro. Iu ajn piulino el la regiono ne konsentus por la tuta oro el la mondo preteriri vespere la lokon nomitan Stank-ar-flam, kie misteraj lavistinoj sonigas ĉe la krepuskiĝo siajn nepalpeblajn batilojn. Mi bone scias, ke en ĉiuj nuntempaj superstiĉoj ekzistas ia malpreciza memoro pri la aferoj de l' kristana doktrino ; ĝenerale estas apud la ŝtonaj krucoj, kiuj staras rande de l' vojo, ke formalaperas la nigraj hundoj kun suspektindaj irmanieroj ; la fantomoj kaj eklumetoj ne plu estas elementaj fortoj de l' tero, sed animoj el la pekpurigejo, kiuj venas peti por preĝoj ; la akvo el la fontano de sankta Devi daŭre kuracas kolikojn, sed tio okazas per la efiko de l' respektinda filo de la sanktulino Nona. Ni vivas meze en la paganismo, mia kara abato, malgraŭ la kruccsignoj kaj la preĝoj. Kaj se vi provus detruĝi ĉiujn tiujn legendojn, respektataj en niaj kamparoj, vi samtempe detruus la kristanecan kredon, kiu al ili estas intime unuiĝinta kaj kiu, esence, estas el la sama klaso.

- Mi antaŭvidis, ke via skeptiko igos vin fari tian konkludon, malbonhumore diris abato Ĵozon ; ĉar vi bone konas la regionon kaj priskribas al mi tiujn bedaŭrindajn tolerojn, kiuj forprenas de la katolika kredo ĝian primitivan puron, mi ne kontraŭdiros pri ili, sed vi troigas, komparante tiujn malŝatindajn superstiĉojn al la religio el lumo kaj vero.

- Fetiĉismo, kiam temas pri la ŝtono de Ŝimŝon aŭ pri la kolikokuraca fontano, religio el lumo kaj vero, kiam temas pri la tibio de sankta Viktoro aŭ pri la groto el Lurd*, murmuris s-ro Tako ; mi ne bone vidas la diferencon. Mi nur volis diri al vi, li daŭrigis pli laŭte, ke la kredo je supernatureco, je mirakloj kaj aliaj analogaj aferoj, ekzistis ĉe la paganoj kaj verŝajne precipe ĉe la antikvaj Bretonoj, kaj ke tiu flanko de la kristana religio estis por ili la plej loga ; oni ŝanĝis la nomon de l' potencoj, kiuj kaŭzas tiujn mirindaĵojn, sed,

* France : Lourdes.

fakte, oni ŝanĝis nur la nomojn, kaj la animstato de iu kamparano nuntempa ne multe diferencas, ŝajnas al mi, de tiu de liaj prauloj el antaŭ dudek jarcentoj.

- Tiele ke, ironie diris la abato, la Dio de l' kristanoj estas nur iu miraklofaranto !

- Ĝi estas, trankvile respondis s-ro Tako, la sola rimedo, kiun vi lasis al li por evidentigi sian ekziston, kaj mi esperas, ke post pripensado vi mem konsentos pri tio ; almenaŭ, ĉiaokaze, ĝi estas la sola flanko, per kiu la malkleraj kamparanoj el ĉi tiuj regionoj povas ricevi ideon pri li : kiam iu fiŝkaptisto, en danĝero meze de uragano, ĵurpromesas al sankta Ivo aŭ al sankta Ana, petante pri kvietigo de la ondoj, kio en tiu momento kontraŭas la naturajn leĝojn, ĉu tio ne estas peti miraklon ?

- La maristo, estante en danĝero, kiu sin turnas al Dio, atestas pri sia kredo, diris la abato, kaj ekzistas multaj ekzemploj pri mirakloj, kiuj rezultis de atesto pri kredo : "Vidu, via kredo savis vin", diris Nia Sinjoro al iu blindulo. Sed dume ni lasu flanke la demandon pri mirakloj. Ĉu la instruo de l' religio kaj la luma solvo, kiun ĝi liveras pri ĉiuj problemoj de l' naturo, estas por vi malgravaĵo ? Kiu, se ne Dio, aŭ libro inspirita de lia saĝo, povis sciigi al la homo, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras, kiu estas la origino de l' mondo kaj de la lumo kaj de ĉio, kio estas bela kaj granda ? Kaj vi ne timas kompari nunan kristanon, instruitan, eĉ en viaj malkleraj kamparoj, pri ĉiuj tiuj eternaj veroj, al mizera pagano tute enprofundiĝinta en mallumo kaj servutigita al la kulto por fontanoj kaj menhiroj !

- Vi kredas, ke la Biblio estas die inspirita, respondis s-ro Tako, laŭ homa atesto, kiu ŝajnas al mi neakceptebla, sed vi ne opinias veraj la miraklojn plenumitajn de la dioj de Homero, la poeziajn metamorfozojn de kulpaj mortemuloj en plantojn aŭ animalojn. Mi konfesas al vi, ke ankaŭ mi ne kredas tion, sed mi ne vidas diferencon, je vidpunkto de la aŭtentiko, inter la Iliado kaj la Biblio. Se la rakonto pri la fonto elŝprucinta sur la monto Horeb laŭ la ordono de Moseo estas de vi konsiderata kiel miraklo, kial rifuzi la saman kvaliton al ĉiuj mirindaĵoj, pri kiuj la greka historio raportas ?

- Mi akceptas la homan ateston, diris la abato, kiam ĝi instruas al mi verŝajnajn aferojn, aferojn kiuj ne

kontraŭas al mia racio kaj kredo ; mi kredas la miraklojn de Dio, sed ne povus atribui la plej etan gravon al la ĵonglaĵoj, kiujn plenumis pli malpli lerte la pastroj de Apolo aŭ de Jupitero.

- Nu, rebatis ridante s-ro Tako, via kredo rezultas de homa atesto, elektita inter multaj aliaj homaj atestoj, kaj estas en la nomo de via kredo, ke via racio malakceptas ĉiujn legendojn, aliaj ol tiuj, pri kiuj apriorie vi akceptis ties aŭtentikon ?

- Ne estas necese fidi al homa atesto, emfazis abato Ĵozon, por trovi en la Biblio nedubindajn signojn de inspiriteco. Ĉiu senantaŭjuĝa spirito senpene ekkonos en tiu respektinda dokumento la ecojn de dia inspiro.

... En tiu momento ambaŭ amikoj laŭiris la marbordon ĉe la rando de la kvieta maro, antaŭ granita insulo proksimume tridek metrojn alta ; ĉe la supro de tiu insulo sur plataĵo el rokoj, kuŝas rondforma ŝtono, bloko, dika je pli ol mil kubaj metroj, metita tien kiel giganta bulo, veninta mi ne scias el kie kaj ekvilibre kuŝanta oni ne scias kiel.

- Jen eble estas, diris s-ro Tako, la plej kurioza el ĉiuj ŝtonoj en la regiono ; oni nomas ĝin **min-kruzet**, kio signifas bretone pendanta ŝtono ; estas certe, ke la ĉi-tieuloj neniam komprenis, kiel tiu giganta peco granita povis esti lokita tiom alte, sur la supro de tiu aglomeraĵo el rokoj.

En mia infanaĝo, volonte mi imagis, ke la maro, kies forto ŝajnis al mi senlima, ĵetis tien, dum iu furioza tago, tiun ŝtonan koloson kaj ke iun alian tagon ĝi povus faligi ĝin ĝis la primitiva nivelo.

- Tiu pendanta ŝtono, malicete diris la abato, donis al vi trafan oportununon por malembarasi vin pri la neneigebla inspiriteco de l' sankta Biblio, sed tiu tuta aranĝo de rondaj rokoj surmetitaj ŝajnas al mi efektive tre kurioza ; nun mi ne insistas kaj petas, ke vi bonvolu instrui al mi, kiel la geologoj klarigas tiujn pitoreskajn kunamasigojn. Cetere mi pensas, ke la klarigo estas la sama pri ĉiuj tiuj amasoj el ŝtonetoj, kaj ke la pendanta ŝtono havas ĉefe kiel apartan karakteron, ke ĝi prezentigis antaŭ niaj okuloj ĉe momento, dum kiu la interparolo fariĝis malfacila.

S-ro Tako ridetis interne.

- Dio, en sia senlima bono, li diris kun gajema tono,

kompatis la homon pro lia tute natura deziro kompreni, kaj li metis en lia trafpoŭvo, en multaj landoj, dokumentojn, kiuj ebligas akiri komprenon pri la aliigoj de l' tero. Se oni zorge esplorfosas la teron, oni tiam legas tie la historion de l' mondo tiom klare, kiom en la sankta Biblio. Ni proksimiĝu al ĉi tiu ne alta krutaĵo, kiun la tajdo batas dum la plenlunaj tagoj, kaj tie ni trovos kion ni bezonas.

Ili malsupreniris sur la sablan bordon. Kion Fabricio nomis krutaĵo, tio ne indus tiun nomon ; ĝi estis nur kruta, kelkmetra niveldiferenco, malsupreniĝa al la sablo de l' marbordo kaj ĉe la supro kronita per la kripole kreskintaj plantoj el la erikejo.

Tiu krutaĵeto ŝajnis formita el granitaj eregoj, kiel la rondaj rokoj el la najbaraĵo, sed sufiĉis froti per la ekstremaĵo de bastono por vidi ĝin forpeciĝanta kaj aliiganta en sablon.

- Jen estas granito, kiu ne liverus bonajn hakeblajn ŝtonojn, diris s-ro Tako, kaj tamen ĝi tute aspektas granite ; sur ĝi estas videblaj, ĉe sia natura loko, la kristaloj el kvarcoj kaj el feldspato ; sed tiu feldspato fariĝis nura argilo, malgraŭ ĝia kristaleca formo, kaj la plej malgranda fraĵo polvigas ĝin.

- Kaj kio kaŭzas, diris la abato, tiun aliigon, tiun putron de l' granito ?

- Jen estas la kulpuloj, diris Fabricio, montrante per la pinto de sia bastono la malfortajn uleksojn kaj la erikojn, kiuj pene vegetis sur la supro de l' krutaĵo. Tiuj nedelikataj plantoj ne bezonas tre riĉan grundon kaj volonte kreskas sur maldika tavolo da planta tero, rezultanta el la putrado de muskoj kaj likenoj ; ili mortas tie, kie ili naskiĝis kaj siavice putras, pliigante per siaj restaĵoj la humon, kiu konsistigos nutraĵon por iliaj infanoj. Tiu tuta planta putrado naskas acidojn, kapablajn ataki la graniton ; la pluvakvo kunportas tiujn detruantajn principojn kaj malrapide penetras en la malsupran ŝtonon ; la rezulton el tio oni vidas en la mizera stato, en kiu nun troviĝas la ŝtono.

- Tio verŝajne okazas tre malrapide, diris la abato.

- Ja, tre malrapide, respondis s-ro Tako, sed senhalte, kaj la rezultoj de tiuj malrapidaj efikoj povas iom post iom fariĝi grandegaj. Nun vidu ĉi tiun lentforman elstar-aĵon el malmola granito, enfiksiĝintan en la krutaĵo. Ĝi

estas bloko, kiu, pro specialaj cirkonstancoj, troviĝis ŝirmata kontraŭ la enpenetro de humaj acidoj, same kiel en la sukerpeco, kiun vi metas en tason da kafo por dolĉigi ĝin, iafoje troviĝas partetoj, protektataj kontraŭ la ĉirkaŭanta likvaĵo kaj kiuj ne tuj solviĝas kiel la ceteraj. Se oni sufiĉe longe skrapus ĉirkaŭ tiu dika elstarajo, ĝi tute liberigus el sia gango el dispeciĝinta granito kaj rezultus roko simila al tiuj, kiuj konsistigas ĉirkaŭe kolosajn kunamasigojn. Cetere la akvofluo plenumos tiun taskon kaj forportos la tutan dispeciĝeman parton de l' krutaĵo por deponi ĝin alie en formo de argilo kaj de sablo ; la sablo, kiun ni piedpremas, ne havas alian originon. Koncerne la privilegiitan elstarajojn, kia estos ĝia sorto ? Je kelkaj paŝoj for de ni, jen estas ĝia kunulo sur la sablaĵo ; la supro de tiu izolita bloko estas ŝirmita kontraŭ la plej altnivelaj tajdoj, tiel ĝi estas invadata de vegetaĵaro ; unue la likenoj, poste la muskoj kaj fine la erikoj tie enplantiĝis kaj, post kelkaj jarcentoj, ĝi estos siavice forportata per la detru-procedo, kiu provizore ĝis nun ne trafis ĝin.

- Ĉio tio estas tre klara, diris abato Ĵozon, kaj mi ekvidetas la formiĝadon de tiu kunamasigo el rondiĝintaj rokoj.

- Tiu procedo laŭ **bulforma diserigo**, kiel nomas ĝin la geologoj, aplikiĝis ĉe la komenco sur grandegan mont-plataĵon, kies alton ni ne konas, sed kiu certe estis pli alta ol la plej supraj rokoj pende kuŝantaj ĉirkaŭ ni. Proporcie kiel la plantaj acidoj diserigis la ŝtonon kaj kiel la senĉesa fluado forportis la produktaĵojn de la diserigo, la blokoj restintaj solidaj malsupreniris per la influo de l' naturaj fortoj, kaj ĉiu el ili haltis tie, kie ĝi povis, trovinte ekvilibron tie, kie ni vidas ĝin hodiaŭ.

- Mi estas tre kontenta, ke mi havis la okazon vidi de proksime tiun kuriozan formacion, tiom malsimilan je tiu de l' kalkaj regionoj, kie mi loĝas, diris la abato.

- Bretonio estas tre malnova lando, denove parolis s-ro Tako. Estas preskaŭ certe, ke tiu loko, kie ni estas, spertis ekde la primara epoko nur fenomenojn de malrapida detruigo, kies ekzemplon mi montris al vi ; ne ekzistas motivo por kredi, ke tiu detruigo estis en la pasinto pli rapida ol ĝi estas nuntempe, kaj oni tiel povas kompreni, ke multaj miloj da jarcentoj estis necesaj por nudigi la rokojn, amasiĝintaj en Plumanak !

Jen ni estas tre malproksimaj, aldonis kun videbla kontento s-ro Tako, de la ses mil jaroj el la hebrea kosmogonio ; vi vidas, ke la pendanta ŝtono ne tiom malproksimigis nin, kiom ŝajnis, de la demando pri la inspiriteco de l' Malnova Testamento, kaj mi ne bedaŭras, ke mi legis al vi en la libro de l' Naturo parton, kiu nepre kontraŭdiras tiun neerarecan dokumenton.

- Ne estis necese, mia kara s-ro Tako, laŭiri tian malrektan vojon por alveni al tia konkludo. La supozita kontraŭeco, kiun vi utiligas kontraŭ la Biblion, jam de longe estas neniigita ; pri tio estas pruvo en la fakto, ke la profesoro pri geologio ĉe la Katolika Instituto facile instruas la teorion de Laplas* kaj la fajrecan originon de l' tero ; li ankaŭ instruas al siaj lernantoj la verŝajnajn daŭrojn de l' geologiaj periodoj, kaj la Eklezio trovas tion tute ĝusta.

- La Eklezio estas certe tre lerta, konsentante akcepti la evidenton, respondis s-ro Tako ; ĝi neis tiom longe, kiom ĝi povis, la akirojn de la geologio, kiel atestas pri tio verkoj, eldonitaj kun ĝia aprobo kaj kiuj ne estas tre malnovaj, sed, kiam fariĝis neeble malakcepti ilin, teologoj elpensis mi ne scias kian klarigon, - ke la ses tagoj el la Genezo reprezentas ne tagojn, sed geologiajn periodojn ! Malgraŭ tio bedaŭrinde montriĝis, ke la ordo de l' ses tagoj neniel akordiĝis kun tio, kion la scienco kategorie instruas !

- Tiu provizora klarigo povas ja esti donita, respondis la abato. Por ni, kiuj havas la certon pri la dia inspiriteco de l' Biblio, iu videbla kontraŭeco inter la scienco kaj la Sankta Skribo tuj igas nin konkludi pri eraro de interpretado ; ni unue pensas, kaj tio estas natura, ke la scienculoj, kun la nura helpo de siaj propraj lumoj, eraris, kiel ofte okazas al ili ; poste, se iliaj asertoj veriĝas, tiam ni diras al ni, ke ni ne ĝuste komprenis la sanktajn tesktojn : ne la Biblio malpravas, sed nur unu el ĝiaj mallertaj komentistoj. Tiel okazis rilate al tiu peco el la Genezo ; en ĝi oni devas vidi superbelan alegorion kaj ne vulgaran esprimon de vero. La unuaj vortoj entenas la lumon el la lumoj : Dio kreis la ĉielon kaj la teron ! La cetero estas nur kadro, en kiun estis lokita tiu brilega

* France : Laplace.

vero, por ke ĝi fariĝu pli facile atingebla de l' homoj. Por instrui al sia popolo la originon de l' mondo, Dio inspiris profeton, sed tiu profeto nature rakontis la aferojn laŭ maniero, kiu ebligis komprenon de la ĉirkaŭantoj ; li staris ĉe la nivelo de l' maldelikata epoko, dum kiu li skribis, kaj pri tio ni havas pruvon en la kortuŝa naivaĵo, ke Dio ripozis la sepan tagon, kvazaŭ Dio, la eterna tutpotenculo, povus esti laca kaj bezoni ripozon !

- Kaj tamen, respondis s-ro Tako, vi daŭre instruas al la infanoj tiun historion, kies eraron vi konfesis ; mi timas, ke al la Biblio oni devas apliki la teorion pri nedisigeblaĵo : la tagon, kiam oni ekvidos, ke ĝi entenas mensogojn, oni tute ne plu kredos ĝin ; do necesas daŭre lernigi mensogojn, intermiksitaĵojn kun veroj, se da ili ĝi enhavas. Vi devigis Galilejondeklari, ke la suno rondiras ĉirkaŭ la tero...

- Ne estas la Eklezio, kiu devigis Galilejon malkonfesi siajn dirojn, vive diris la abato ; la Eklezio estas neerarpova nur en siaj koncilioj kaj en sia Suverena Pontifiko ; oni ne povas atribui al la Eklezio eraron de kelkaj el ĝiaj membroj.

- Nu, hodiaŭ vi malkonfesas tiujn, kiuj iam volis, malgraŭ la astronomoj, ke la tero estu senmova ! Tial ke hodiaŭ vi ne plu povas kontraŭbatali evidentajn, vi ne plu estas sufiĉe fortaj ! Vi preskaŭ demonstrus, ke per konvena interpreto al la Biblio, oni trovas en ĝi mencion pri rotacio de l' tero ! Vi malfacile akceptis la akirojn de la astronomio ; poste vi devis rezigne akcepti tiujn de l' geologio ; mi ne malesperas iam vidi vin akcepti tiujn de l' biologio kaj deklari, ke Moseo estis pioniro de l' darŭinismo !

- Mia kara s-ro Tako, diris serene la abato, la scienco ne povas trafi la kredon ; eble en la Biblio estas asertoj, kiuj ŝajnas kontraŭi al la sciencaj akiraĵoj, sed ili troviĝas nur en la pecoj, kiuj intence estis skribitaj laŭ maniero taŭga por la komprenpovo de l' popolo, al kiu ili estis destinitaj...

- Vere, diris s-ro Tako, jen estas mirinda malvenko : la Eklezio tre dezirus esti trovinta en la scienco pruvon pri la inspireco de l' Sankta Skribo, sed tiu malicega scienco ne maltimis eltrovi ĝuste la malon de tio, kion oni atendis de ĝi ! Kaj vi diris al ĝi : Kial ni havu interrilatojn ?

- Pro konsidero al la malmulte sagacaj amasoj, estus preferinde, diris la abato, ke tiuj kelkaj kontraŭecoj ŝajnaj ne estu dissciigitaj, sed ne kredu, mia kara amiko, ke klera kredulo iam ajn atendis de la scienco eltrovon, kiu firmigus lian kredon.

- Paskal estis, mi pensas, diris s-ro Tako, klera kredulo, se tiaj ekzistis. Tiu geniulo eĉ akiris ian religiecan frenezon pro troa kredo. Kaj tamen li celis trovi en la scienco kredigajn pruvojn : "Kiom la lornoj, li diris, helpis al eltrovo de estaĵoj, kiujn ne konis antaŭe niaj filozofoj ! Oni senhezite ekatakis la Bibliion pro la granda nombro da steloj, dirante : Da ili ekzistas nur mil dudek du, tion ni ja scias"* . Se la astronomio kapablis liveri pravigojn pri la Biblio, mi ne komprenas, kial la eltrovoj, kiujn ĝi faras, kaj kiuj kontraŭas al la Sankta Skribo, estas malgravaj. Kaj se Dio nekomplete instruis la Hebreojn, sciigante al ili, kun kelkaj gravaj veroj, volajn erarojn, kiujn ili pli facile komprenis, kial li estus sciiginta, ke en la ĉielo estas tiom multe da steloj, ĉar tiam ili ne havis teleskopojn por kontroli ! Nu, mia kara abato, mi kredas, ke la Biblio estas la verko de homo, kiu eble superis siajn samtempulojn ; sed li tute simple instruis al ili sian propran teorion pri la mondo, kiu, tion ni vidas hodiaŭ, estis tiu de malklerulo, - kio estis normala en tiu malproksima epoko.

- La dia inspiro estas evidenta en la Biblio, respondis la abato ; eĉ se apud la eternaj veroj, kiujn ĝi entenas, troviĝus krudaj eraroj, kiel vi emas substreki tion, neniu sincerulo povas malkonsenti al ĝia admirinda doktrino superhoman devenon.

- Grandan dankon, sinjoro abato, diris Fabricio ; mi legis la Bibliion kun granda zorgo, kaj en ĝi mi tute ne trovis tiun evidenton, pri kiu vi parolas ; mi konsentos volonte, ke en kelkaj partoj de la verko oni trovas signon pri la genio de ĝia aŭtoro ; homo povas esti genia kaj esti malklera ; sed ankaŭ la Iliado portas la stampon de geniulo.

- Ĉu vere vi kredas, diris la pastro, ke homo povis, per siaj propraj lumoj, ekvidi tiun noblegan veron, ke "Dio kreis la ĉielon kaj la teron" ?

- La kreduloj mem, respondis s-ro Tako, respondas

* France : Pascal, *Pensées* (Pensoj).

vian demandon, kiam ili demonstros la ekziston de Dio per tiu infaneca rezono, ke horloĝo supozigas la ekziston de horloĝisto. Mi ne kredas, ke Moseo konis la horloĝojn, sed li konis la faraĵojn de homoj kaj li sciis, ke ili efektiviĝas nur per ilia laboro. Tute naive li atribuis pli grandan faraĵon al pli granda estulo kaj, tial ke li ne vidis ĝin, li simple supozis, ke ĝi estas nevidebla. Nenion eksterordinaran mi vidas en tio. Sed kiam li estis imaginta tiun nevideblan potenculon, tiam ĉio fariĝis klara por li en la naturo. Kiom oportuna estis tiu bona giganto ! Lia ekzisto klarigis ĉion ; la homo aparte estis lia kreaĵo. Kaj pro tio la biblia kosmologio denove estos kontraŭata de l' scienco.

- Ĉu la scienco demonstros, ke Dio ne kreis la mondon ? diris la abato.

- Ĝi neniel asertas aferon, kiun ĝi ne povus pruvi, respondis Fabricio. Ĉar Dio estas same nekomprenbla kiel la mondo, klarigi la unuan per la dua, tio ne estas doni klarigon. La scienco sekve ignoras frazon, kiu neniel helpas en la studata demando. Eble iun tagon mi klarigos al vi, laŭ kiu maniero oni povas science starigi la demandon pri la originoj de l' senlimeco. Mi diros nur al vi, ke la scienco opinias nekredinda la rakonton de la Biblio pri la homa kreigo aŭ almenaŭ pri ĝia **tuja** kreigo.

- Vi estas parolonta pri la transformisma teorio, interrompis la abato ; sed vi sendube scias, mia kara s-ro Tako, ke la plej eminentaj kleruloj el nia epoko montris la erarecon de tiu doktrino, kiun apogas neniu pozitiva fakto kaj kiu malakordas kun la simpla saĝo kaj la prava fiero de l' homo.

- Mi ne havas tute la saman opinion, respondis Fabricio, male, mi kredas, ke inter la scienculoj, indaj je tia nomo, ne plu troviĝas iu, kiu plenscie kontraŭdiras la ideon pri aliigo de la specoj. Supozeble vi legis librojn, kiuj kontraŭbatalas tiun doktrinon, prefere je tiuj, kiuj simple kaj honeste esprimis ĝin, kaj vi facile konvinkiĝis pri la erareco de malplaĉa teorio.

- Mi konfesas, diris la pastro, ke mi ne legis la verkojn de Darŭin, nek tiujn de Hekel*, sed...

- Ĉar vi ne legis transformismajn librojn, subite

* *Haeckel.*

diris s-ro Tako, mi tuj legigos al vi unu, kaj mi estas certa, ke ĝian valoron vi ne neos. Ĉu vi vidas, apud la marbordo, tiun duonblankan amason sur la sablo ? Ĝi estas balasto forlasita de ŝipo, kiu venis ĉi tien por enŝargi trotuarajn randaĵojn. Ĉar neniu natura belaĵo kapablas deteni la avidon de l' homoj. La granito de niaj admirindaj rokoj estas malmola ŝtono, bonega por la konstruado de ŝtuparoj kaj por angulŝtonoj. La trotuaroj el Parizo, el Bordoza, el Havro kaj el multaj aliaj gravaj urboj estas borderitaj per granito el Bretonio. Plejparto el la loĝantoj de l' marbordo fariĝis ŝtonhakistoj, kaj ĉiuj bordŝipoj el la regiono estas uzataj por transporti la posedaĵojn de nia tero. Ĝi estas unu el tiuj ŝipoj, kiu demetis ĉi tie tiun duonblankan balaston, en kiu ni eble trovos fosiliojn, kiuj nature tute ne ekzistas en nia granita regiono.

Ili proksimiĝis al la ŝtonamaso kaj komencis rompi kelkajn blokojn, frapante iujn kontraŭ aliajn.

- Ofte mi vidis fosiliojn, diris la abato, dum ili faris tiun laboron, kaj tio ne sufiĉis, por ke mi fariĝu transformisto.

- Tial ke vi ne kapablis legi, respondis s-ro Tako. Jen, ĝuste estas bela fragmento de amonito ; ĝi estas la natura muldaĵo je cefalopodo, kies konkio similis, kiel vi vidas, al korno de Hamono*. Ĉu vi ne eksentas respekton por tiu tiom bone konservita relikvo de animalo, kiu vivis antaŭ miloj da jarcentoj ?

- Mi konfesas, respondis la abato, ke mi tuŝas senemocie tiun respektindan ŝtonpecon.

- Sed vi ne dubas, espereble, rimarkigis Fabricio, ke tiu ŝtonpeco estas la muldaĵo de animalo, kiu iam vivis. Mi ne intencas tedi vin, rakontante kiel tiuj muldaĵoj nature produktiĝis en iaj kalkaj grundoj, dum en la sablaj ili malofte konserviĝis. Vi certe scias, ke oni konas per ilia tuta aŭ parta muldaĵo grandan nombron da animalaj aŭ plantaj specoj, kaj ke el la multnombraj specoj, apartenantaj al primaraj kaj sekundaraj grundoj, **neniu** hodiaŭ ekzistas. Kredeble vi ankaŭ scias, ke la geologoj kapablas ekkoni la samtempecon de la sedimentoj per la naturo de la fosilioj, kiujn ili entenas, alidirite, ke iu

* Dio el la antikva Egiptio.

difinita animala aŭ planta formo karakterizas iun difinitan epokon de la historio de l' mondo. Ĉu vi ne vidas, ke tiu tuto da konstatoj, akceptataj hodiaŭ de ĉiu homo, estas nepra pruvo pri la aliigo de la specoj ?

- Tio tute ne ŝajnas al mi evidenta, diris la abato.

- Ĉu vere ? ekscitigante diris s-ro Tako : vi ne estas konvinkita pri la transformiĝo de la specoj, konstatante, unuflanke, ke ĉiuj estaĵoj, kiuj vivis dum la primara aŭ sekundara epoko, tute malaperis, aliparte, ke oni **neniam** trovas en fosilia stato, en la malnovaj tavoloj de l' grundo, unu solan formon el tiuj, kiuj vivas nuntempe ? Vi do devas supozi, ke, laŭ nekomprenebla hazardo, estis konservitaj en fosilia stato nur la specoj, kiuj estis destinitaj por malaperi antaŭ nia epoko ! Kaj kial, kaj kiel estus malaperintaj ĉiuj, kiuj postlasis muldaĵojn ?

- Dio povas esti farinta sinsekvajn kreojn, respondi la abato.

- Ili ne estas menciitaj en la Biblio, diris Fabricio, kaj cetere tiuj sinsekvaj kreoj devus esti akompanitaj de l' detruo de ĉiuj estaĵoj antaŭe ekzistantaj. La Sankta Skribo male konstatas la kontenton de Dio por ĉiu el siaj kreoj : "Kaj Dio vidis, ke tio estas bona". Kiel povus esti, ke la kreinto, laŭ kaprico de trodorlotita infano, amuziĝus, detruante de temp' al tempo ĉiujn vivantaĵojn por krei aliajn, iom malsamaj de la antaŭaj ? Vi konsentu, ke estus treege pli logike akcepti la ideon, ke li kreis **varieblajn** animalojn kaj ke tiel, per lia volo mem, la estuloj, kiujn ni nuntempe konas, estas malsamaj de tiuj, kiujn li naskis en la pasinta tempo sur la supraĵo de l' tero. La evoluo estus unu el la leĝoj truditaj de Dio al la naturo, kiel estas, por vi, tiuj pri la fiziko kaj la kemio.

- Tiu koncepto entenas ja ion noblan, diris la abato ; sed la homo ne rajtas prijuĝi la farojn de l' kreinto ; la agmanieroj de Dio estas misteraj. Cetere, mi diros al vi, mia kara amiko, ke la transformismo ne kontraŭas al la dogmo ; ĝi nur ne simpatias al tiu teorio.

- Admirinda ! ekkriis Fabricio. Jen estas diro, kiun mi memoros kaj kiu estas multvalora ! La transformismo ne ĝuas la simpation de la dogmo, tio signifas, se mi ĝuste komprenas, ke al tiu vero oni rilatas kiel al la eltrovo de Galilejo kaj kiel al la pli freŝdataj eltrovoj de la geologio ; oni neos ilin tiom longe, kiom estos

eble kaj kiam evidente estos akirita, tiam oni havos tempon por prepari honorindan malvenkon, dironte al la scienculoj : La Eklezio neniam neis la transformismon ; kian rilaton havas tiu teorio, tre verŝajne ĝusta cetere, kun la eternaj veroj de nia kredo ? Kaj la dogmo daŭre malantaŭeniros, ĉiam, antaŭ la iompostiomaj akiraĵoj de la scienco, sed malgraŭ tio konservante ĉiam siajn primitivajn aŭtoritaton kaj netuŝeblon ; ĉe ĉiu epoko de la historio pri la mondo oni deklaras, ke la dogmo konsistas nur el veroj konsiderataj kiel ne atingeblaj per la serĉadoj de la esploristoj. Kaj se la scienco, en siaj kontinuaj progresoj, eltrovos novan metodon, kiu minacas parton de tiu jam stumpita dogmo, tiam oni purigos la dogmon, por ke, denove, ĝi fariĝu netraflebla de la scienculoj !

"Materialistoj, miaj fratoj, entuziasme daŭrigis s-ro Tako, kia domaĝo, ke ni ne naskiĝis kelkajn jarcentojn pli malfrue ! Ni povus esti kreduloj, ne ĉesante esti materialistoj kaj ni evitus la inferon. Post kiom da jaroj ni vidos la dogmon, reduktita je ĝiaj definitivaj proporcioj ? **Ĉio okazas** kvazaŭ Dio ne ekzistus, kaj la scienco povante esplori nur tion, kio **okazas**, ne povas trafi Dion. Sekve kedu je Dio, nur tion ni petas al vi, kaj tio neniel kontraŭas al la akiroj de l' fiziko kaj de la biologio."

La abato ridante rigardis al Fabricio.

- Pro Dio, mia kara amiko, li diris, jen bela parolado, kaj mi bedaŭras, ke mi sole aŭdis ĝin. Mirinde vi ekscitas vin mem kaj vi havas tiom grandan fidon en viaj argumentoj, ke vi ne ekvidas la vakuon, kiu restas, se vi forigas Dion el la naturo. Kaj kian intereson povus havi la dogmo, li daŭrigis, ekscitiĝante siavice, pri la aliĝo de malŝatinda polpo aŭ de vermo rampanta en koto ? Ĉu tiaj aliĝoj povas doni klarigon pri la racio de l' homo kaj pri ĝia senmorta animo ?

- La homo, denove parolis s-ro Tako, tre similas al la simio ; tion vi certe ne neos, kaj, same kiel la paleontologoj opinias, ke la ĉevalo kaj la azeno havas komunan praulon pro siaj frapaj similoj, same estas tute nature pensi, ke ankaŭ la homo kaj la simio havas saman devenon.

- La afero tute ne estas pruvita, diris abato Jozon, kaj mi opinias, ke oni multe tro parolis pri tiu supozita eltrovo en Javo al fosilia Pithekanthropo. Sed, eĉ se ĝi estus

pruvita, kio malbona estus en tio ? La Sankta Skribo diras, ke Dio kreis la homon laŭ sia similo ; ĉu vi estas tiom naiva por pensi, ke tio signifas, ke Dio havas nazon, buŝon, du brakojn kaj du krurojn kiel vi kaj mi ? Certe ne, ĉu ne ? Dio donis al la homo senmortan animon, kiu estas parte sam-natura kiel la dia esenco, kaj kiu estas, iel, bildo de la senlimulo. Rilate al la korpa formo, sufiĉas, ke ĝi estu adekvata al la bezonoj de la animo ; la korpo estas nur maldelikata mekanismo kaj sole la animo estas dieca. Se vi nepre volas, ke la homo devenas de l' simio, mi ne ofendiĝetos pro tio, kvankam, mi re-diras, la dogmo ne havas simpation por tia hipotezo. Kaj mi diros al vi nur jenon : Dio, kreinte la animalojn kun la povo variadi, atendis, ke la natura evoluado de la specoj estis produktinta sufiĉe perfektan mekanismon ; kiam tia mekanismo estis efektiviĝinta (kaj, por plezurigi vin, mi forkonsentos, ke tiu mekanismo apartenis al ia simio), Dio donis al ĝi senmortan animon kaj per tio faris homon ; la homo dotita per animo tuj altiĝis same alten super la simioj kaj aliaj animaloj, ĉe kiuj mankas racio, kiel, laŭ la laŭlitera interpreto al la Biblio, ĝi troviĝis super la ŝlimo kaj la polvo, el kiuj ĝia korpo estis origine konsistigita. La animo de l' homo estas el dieca esenco, kaj nenio simila ekzistas ĉe la simioj aŭ la ĉevaloj. Mi konsentos, se vi nepre insistas pri tio, ke la korpo de l' homo parencas tiun de l' gorilo kaj de la ĉimpanzo, sed ĝia animo parencas al Dio, kaj mi estas tiom fiera pro tiu parenceco, ke ĝi malebligus min honti, se estus pruvite, ke mi efektive estas kuzo de la orangutangoj.

- Kaj jen denove la scienculoj tre embarasataj, konkludis s-ro Tako, ĉar ili certe ne povos pruvi, ke vi ne havas animon. Ĉio, kion ili sukcesos fari, tio estos montri estonte, ke en la homo ĉio funkcias kiel se la animo ne ekzistus ; tion kapablos fari baldaŭ la fiziologio laŭ nerefutebla maniero ; mi eĉ povus diri, ke jam ĝi havas tiun kapablon. Sed tio estas tute indiferenta al vi, s-roj dogmemuloj ; tio ne pli ĝenos vin ol la eltrovoj de la astronomio kaj de la geologio. Kiam vi diras, ke Dio kreis la homon laŭ sia similo, tio ne signifas, ke li kreis lian korpon ; la korpo jam ekzistis antaŭe : tre trafe ; kaj kiam oni diras, ke li kreis la mondon, ankaŭ tio estas nur metaforo : li ne kreis la materion de l'

mondo, ĝi jam ekzistis antaŭe, sed la animon de l' mondo, kiu parte estas samnatura kiel lia dieco kaj eterno, kaj kiu ĉefe havas kiel valoregan econ, ke ĝi neniel montriĝas kaj sekve estas ŝirmita kontraŭ la esploroj de l' scienculoj !

- Vi ĉiam havas la vivan kaj mokan spriton, kiu ĝojigis min dum niaj promenadoj de antaŭ dudek jaroj, dirante abato Ĵozon ; neniam mi kredus, ke la sciencaj studoj konservas tiom fidele dum la matura aĝo la ecojn de l' juno.

- La korpa sano igas la animon ĝoja, gaje respondis s-ro Tako ; por ke niaj animoj restu ĝojaj, ni eniru tiun gastejon, kiun ni atingis, kaj ni satigu niajn korpojn per taŭga manĝo ; tiu promenado ĉe la marbordo donis al mia materia korpaĉo viglan apetiton.

LA INTELIGENTO DE LA ANIMALOJ

La hundo de s-ro Tako estis duone pudela kaj duone novtera* ; de la unua raso ĝi heredis ties proverban fidelon, de la dua la senbridan emon por banoj en la maro ; fine ŝajnis, ke ĝi prenis de ambaŭ ĉion, kion ili povas posedi kiel inteligenton kaj subtilon. Musko havis por Fabricio ĵaluzan amon, kiu, nekontesteble, estis la plej profunda el ĝiaj hundaj sentoj ; eĉ ĝia manĝemo estis malpli forta ol ĝia fidelo kaj, kvankam ĝia frandemo estis granda, tamen ofte ĝi rezignis je plej bona nutraĵo por akompani sian mastron en liaj solecaj promenadoj. Cetere pri tio ĝi ricevis kompenson, pri kiu ĝi konsciis ; ne malofte s-ro Tako modifis sian antaŭe aranĝitan vojplanon, ĉesigis komencitan kreskaĵokolektadon, por evitigi al la fidela Musko tro longan marŝadon tra erikejo kun uleksoj, kies pikiloj vundus la piedojn, moligitajn per la marakvo, de tiu nekorektebla amfibio ; ofte li tenis ĝin en siaj brakoj por transiri densejon el interplektitaj rubusarbustoj.

Musko registris en sia memoro ĉiujn tiujn zorgemojn, kaj senlima dankemo aldoniĝis al ĝia unuatempa amemo. Tial, kiom da konfido ekzistis inter la homo kaj la hundo ! Pro longdaŭra kunvivado ili perfekte interkompreniĝis ; la hundo ne nur konis la signifon de granda nombro da kutimaj vortoj, per kiuj la homo donis al ĝi sciigojn, sed la homo ankaŭ sciis deĉifri en ĝiaj apartaj bojoj la esprimon de ĝiaj deziroj kaj bezonoj. "Al li mankas nur la parolo", ofte diris la bona s-ro Tako al la admirantoj de sia malnova amiko. La koncentrita kaj profunda rigardo, per kiu la brava hundo okulfiksis al sia mastro, kiam tiu al ĝi parolis, estis vere notinda. Ĝi ŝajnis diri al li per sia muta lingvo : "Parolu sengene, mi aŭskultas kaj ĉiun cian vorton mi komprenas" ; kaj ĝi efektive komprenis kaj pruvis tion.

S-ro Tako adoptis Muskon, kiam ĝi estis tre juna kaj diligente zorgis pri ĝia edukigo ; neniam li trompis ĝin, kiel ofte faras gepatroj, kiuj sin amuzas per siaj infanoj,

 * France : terre-neuve, angle : Newfoundland, germ. : Neufundländer.

rakontante al ili ridigajn mensogojn. "Se tia faro estas danĝera por la infanoj, li ofte diris, ĝi estas eĉ pli mal-bonefika al la hundoj, kiuj estas malpli inteligentaj ol la infanoj". Kaj li estis prava : se ni volas havi vere agrablajn hejmbestojn, necesas peni por starigo de interkomprenilo, kapabla anstataŭi ilian mankantan paroleblon. Kaj la unua tiucela kondiĉo estas havigi al ili absolutan konfidon ; sed kiom da personoj pensas pri tio ?

Cetere oni ne devas tro alte taksi la virtojn de !' bestoj kaj utiligi ilin, kiel faras iaj poetoj, por hontigi homojn ; ili havas mankojn krom bonaj kvalitoj.

Musko estis mensogulo, sed, pli mallerte tiurilate ol multaj el ni, ĝi ne kapablis senhonte mensogi, verŝajne pro tio, ke ĝi konis la superecon de sia mastro kaj kredis lin kapabla eltrovi la veron en ĉiuj okazoj : la senhonteco ordinare rezultas de la espero, ke nia trompo ne estos eltrovata.

Malgraŭ la tre zorga edukado, kiun ricevis Musko, ĝi tamen malpure manĝis kaj disŝutis pecojn el sia supo ĉirkaŭ la teleron ; sed tiam mankon, diris s-ro Tako, nenia edukado povas forigi, ĉar ĝi rezultas de la aparta strukturo de ĝia buŝo ; estas bone prizorgi hundon, sed oni ne devas esperi senigi ĝin je hundeco.

Pro sia malpuremo Musko manĝis en la kuirejo ; tio tre hontigis ĝin, tial ke tre klare ĝi faris diferencon inter mastroj kaj servistoj ; ĝi sciis, ke la gravaj gastoj estas regalataj en la manĝoĉambro kaj ĝi volus esti traktata kiel gravulo. Tial, tuj kiam ĝi estis englutinta sian supon, ĝi forlasis la kuirejon kaj venis ĉirkaŭ la tablon por peti karesojn kaj frandaĵojn. Kiam okazis, ke ĝi ne estis malsata, tiam ĝi lasis sian porcion netuŝita, sed restis en la kuirejo dum konvena tempo, por ke oni povu kredi, ke ĝi manĝis. Jen unua mensogo ; oni ne haltas sur tia bela vojo !

Pro amo al sia hundo, s-ro Tako volis, ke ĝi estu bone nutrata, kaj tiom longe, kiom Musko ne estis manĝinta sian supon, li ne donis al ĝi kukojn nek sukeron : same kiel pri infanoj, kiujn oni senigas je deserto, kiam ili ne volas manĝi viandon. Estis do komprenite inter la mastro kaj la hundo, ke la rajto al frandaĵoj ekzistas nur, kiam la supo estas manĝita ; sed ofte, profitante la malatenton

de Fabricio, la lerta Musko ricevis deserton, ne estinte demandita.

"Ĉu ci mangiis cian supon?" kutime demandis s-ro Tako, kiam la hundo forlasis la kuirejon. Kaj se fakte la supo estis mangita, tiam la nigra kaj bukklita vosto de la inteligenta besto ekstaris kaj gaje svingiĝis. Se, male, Musko ne estis manginta sian porcion, tiam li reiris, kun mallevita vosto, al la kuirejo, kvazaŭ por plenumi malagrablan devon.

Iafoje, tamen, ĝi kuraĝe riskis levi kaj svingi la voston, eĉ kiam ĝi ne tuŝis sian teleron ; sed ĝia mastro ekkonis per io ĝena kaj suspektinda, ke la respondo estis mensoga : "Ĉu tute certe?" demandis s-ro Tako per grumbla voĉo. Denove la vosto leviĝis, sed malpli senhezite svingiĝis. "Mensogulo!" li aldonis, per pli forta voĉo kaj minacante per fingro. Kaj Musko, kun mallevita vosto, reiris al la kuirejo.

Kiam abato Ĵozon venis en Bretonion, Musko akceptis lin kun sia kutima ĵaluzo : "Ankoraŭ entrudulo, ŝajnis pensi la kompatinda hundo, kiu forprenos la atenton de l' mastro kaj malebligos, ke li zorgu pri mi." Kaj tiu timo praviĝis : dum la ĉiutagaj promenadoj ĉe la marbordo, la filozofiaj interparoladoj tiel absorbis s-ron Tako, ke la brava Musko estis devigita sin distri sola, ĉu per reaj banoj, ĉu per petola kurado sur la plaĝo pele al la mevoj kaj la numenioj. Tamen, ĝia amo al li baldaŭ etendiĝis al la personoj, kiuj ŝajnis havi kun li amikecajn rilatojn, tiel ke, post kelkaj tagoj, li estis alpreninta la kutimon veni saluti abaton Ĵozon, gaje svingante sian voston harriĉan ; la bona abato, kortuŝita per tiaj neprofitemaj elmontroj, karesis ĝin per la mano kaj de tempo al tempo donis al ĝi frandaĵojn.

*

La du amikoj malsupreniris malrapide laŭ la ŝtona vojo de l' plaĝo, en iu bela kaj tro varma tago suna ; ili iris por trovi freŝon sub la ombro de la eta klifo, fronte al la maro, kvieta kiel lago.

- Jen Musko, kiu revenas lamante, diris abato Ĵozon ; verŝajne ĝi vundis sin, saltante sur la ŝtonoj.

La hundo alvenis kun mallevita vosto, pene marŝante per tri piedoj ; ĝi rekte iris al sia mastro kaj etendis al li la vunditan piedon, el kiu Fabricio facile tiris egan

dornon de sovaĝa rozarbedo.

Apenaŭ la operacio estis finita, kiam la gaja besto saltis du-trifoje al sia mastro, kvazaŭ por danki al li, lekis lian manon kaj reiris al la sablaĵo.

- Antaŭe, diris s-ro Tako, mi devis voki ĝin plurfoje, por ke ĝi konfidu al mi sian dornhavan piedon ; ĝi timis, ke mi pliigos ĝian doloron per mallerta faro, sed de kiam ĝi sentis sin sendolorigita per mia interveno, de tiam ĝi venas rekte al mi, tuj kiam vundita ; ofte eĉ, kiam ĝi estas nur tranĉe vundita ĉe la piedo, vundo pri kiu mi estas senhelpa, sufiĉas, ke atente mi rigardu ĝian piedon, por ke ĝi kredu esti kuracita kaj rekomencu gaje kuradi ; ĝi havas grandan fidon en miaj veterinaraj scioj.

La promenantoj sidiĝis ĉe la ombro de l' klifo, sur roko kovrita per likenoj.

- Via sovaĝa golfeto, diris la abato, pensigas min pri beleta frazo de Flober en **Salambo** : "Kaj du keltoj bedaŭris grizajn ŝtonojn, sub pluva ĉielo, ĉe la fundo de golfo kun multaj insuletoj." Hodiaŭ la ĉielo certe ne estas pluva, sed tia ofte ĝi estas, mi pensas, ke la aspekto de ĉi tiu pejzaĝo, disŝutita per ŝtonoj, sendube estas eĉ pli severaspekta kaj pli emocidona, kiam nuboj kaŝas la sunon.

- Plaĉas al mi, dum miaj solecaj promenadoj, respondis s-ro Tako, imagi, ke mi vivas en la epoko de l' konkero super Gallio ; ŝajnas al mi, ke la aspekto de l' golfo notinde ne ŝanĝiĝis jam de du mil jaroj ; la ŝtonoj eble estas pli skrapitaj, la sablo iom pli abunda, sed la superanta karaktero de l' pejzaĝoj en ĉi tiu loko el Bretonio estas la neŝanĝeblo.

- Jen vidu, intermetis la abato, kiel la hundo rigardas al vi ; ĝi ŝajnas tre interesiĝi pri tio, kion vi diras.

- Nu, diris ridante s-ro Tako, estas pro tio, ke ni parolis pri ŝtonoj kaj siliketoj ; tiuj vortoj efikas magie sur Muskon ; ĝia plej granda feliĉo estas iri por elserĉi sur kampoj, en plej malfacile ireblaj lokoj, la ŝtonojn, kiujn tiucele mi de tempo al tempo ĵetas ; Musko havas bonegan flarsenton kaj pro tio fieras ; kiam ĝi ektrovis ŝtonon, vere malfacile rekoneblan, tiam la ek trovinto portas ĝin al mi kun movoj de l' vosto, kiuj indikas ĉe la hundo viglan senton el memestimo. Nu, Musko, ŝtono en la manon! - daŭrigis Fabricio, farante la geston de

almozpetanto.

La hundo aŭdigis ĝojan krion kaj ekkuregis sur la sablaĵo, serĉante ŝtonon, kiun baldaŭ ĝi alportis kaj kvazaŭ vomis en la manon de sia mastro.

- Mi bedaŭras, diris la bona s-ro Tako, esti petinta ŝtonon al Musko en tia sufoka temperaturo ; nun mi ne povas rifuzi ĵeti ĝin kaj ties serĉado kaŭzos al ĝi teruran varmon.

Kaj, tion dirinte, li vigle ĵetis la ŝtonon trans la klifon, al la superelstaranta kampo.

La hundo sage ekkuregis al la vojo, situanta proksimume cent metrojn de tie kaj kiu ebligis ĉirkaŭiri la krutaĵon kaj atingi la kampojn.

- Ĉu vi kredas, demandis la abato, ke ĝi trovos la ŝtonon, post kiam ĝi estos farinta tiom grandan ĉirkaŭiron por iri ĝin serĉi ?

- Mi estas absolute konvinkita, ke jes, respondis Fabricio ; nun ĝi sendube traserĉas sur la kampo, kiu superstaras al ni, svingante la voston kaj flarante al la tero ; baldaŭ ĝi alportos la ŝtonon, krom se, hazarde, mi estus ĝin ĵetinta en lokon, el kiu ĝi ne povus ĝin eltiri, en fendon de roko, ekzemple, kaj tiaokaze ĝi halte restos antaŭ la loko kaj vokos al mi por helpo.

- Kaj per kio viaopinie ĝi rekonos vian ŝtonon inter multaj aliaj ? demandis la abato.

- Certe per ĝiaodoro, diris s-ro Tako, ĉar en la akvo, eĉ la plej klara kaj plej malprofunda, ĝi neniam retrovas la ŝtonojn. Sed kiuodoro gvidas ĝin ? Certe ne estas tiu prenita el la mano, kiu ĵetis la ŝtonon : mi amuziĝis ĵetante al ĝi ŝtonon pere de ŝovelilo, tiele mia mano ne tuŝis la ŝtonon, kaj tamen ĝi perfekte ĝin rekonis. Mi pensas, ke la fortege ĵetita ŝtono akiras per frotado kontraŭ la aero specialajn ecojn, kiuj, dum kelkaj momentoj, sufiĉe distingas ĝin de ĉiu alia ŝtono nemoviginta. Sed jen ĝi revenas kun leviginta vosto.

Efektive, la brava hundo revenis laŭ la sablaĵo kaj baldaŭ ĝi deponis la ŝtoneton ĉe la piedoj de sia mastro.

- Bone, diris s-ro Tako, karesante ĝin per mano, nun kuŝiĝu ĉi tie kaj lasu nin trankvilaj.

- Tia instinkto estas admirinda, rimarkigis la abato.

- Tio pravas tute simple, diris Fabricio, ke la hundoj havas la flarorganon pli akresenta ol ni ; sed la homo

estas tiel sinestima, ke ĝi kredas superi ĉiujn animalojn, kaj miras trovante ĉe hundo aŭ ĉe birdo sentilojn pli delikataj ol la siaj. La homo estas unu el la mambestoj plej malbone dotitaj rilate al flarado.

- La homo, respondis la abato, ne bezonas malvolvigintajn instinktojn kiel la hundoj kaj la simioj, ĝia inteligento, ĝia racio, oportune anstataŭas ilin.

- Facile dirite, intermetis abrupte s-ro Tako. Ĉu vi kredas, ke per sia inteligento kaj sia racio la eskimoj, kiuj surglacie vojaĝas, evitus la lokojn, kie la glacia tavolo estas nesufiĉe dika, se la pli delikataj sentiloj de iliaj fidelaj hundoj ne tirus la glitveturilojn for de l' danĝeraj lokoj ? Multnombraj estas la okazoj, en kiuj la homo estas tre feliĉa, malgraŭ sia fiero, atenti la multvalorajn indikojn, kiujn liveras al ĝi animaloj pli bone naturotitaj.

- Ni ne troigu, diris la abato ; iaj animaloj havas, pri tio oni devas konsenti, tute mirindajn instinktojn, sed nur la homo estas inteligenta kaj saĝa...

- Almenaŭ ĝi havas tian pretendon, interrompis s-ro Tako, kaj ĝi estas certa, ke la hundoj kaj simioj ne kontraŭdiros. Ŝajnas al mi tamen, ke se vi ĵetus ŝtonon al la kampo trans la klifon, kaj se mi intencus iri por ĝin serĉi, mi uzus mian inteligenton por fari tiun serĉadon, gvidante min per miaj okuloj prefere ol per mia nazo, kiu estas ja neperfekta organo. Kiel vi volas, ke mi konsideru kiel instinktan ĉe mia hundo operacion, en kiu mi certe aĝus per la inteligento ? Kaj unue, ĉar vi tiel klare asertas, ke la hundoj havas nur instinkton, kiel vi difinas tiun kapablon ?

- Ne necesas difini vorton, kiu estas memkomprenebla, diris la abato.

- Tre bone, respondis Fabricio. Tiel okazas, ke interdiskutoj fariĝas senfinaj, ĉiu el la kontraŭuloj atribuas al la plej ordinaraj esprimoj tute malsamajn signifojn. Esence, mi kredas, ke, sen plua pripensado, vi nomas instinktajn la aĝojn de animaloj alispecaj ol la homo. Kaj tiam, oni ne plu devas diskuti : la animaloj ne rajtas je inteligento, ĉar tiu vorto estas rezervita al ni ; la animala inteligento nomiĝas instinkto ; tio estas tre simpla kaj sukcesa la artifiko ; post tio estus absurde paroli pri la inteligento de la animaloj.

- Sed ankaŭ la homoj havas instinktojn, kiuj devenas de ilia animala naturo, diris la pastro ; vi do vidas, ke

via moko ne havas seriozan bazon.

- Bonvolu do, rapide respondis s-ro Tako, difini kion vi nomas, ĉe la homo, instinktan agon, kaj ni vidos poste, ĉu reale okazas, ĉe la animaloj, nur agoj el tiu speco. Mi memoras esti iam aŭdinta jenan difinon pri **humuro** : "kio anstataŭas spriton ĉe la rasoj, kiuj ne havas tian econ". La francoj, kiuj donis tiun difinon, rezervis al si la rajton havi humuron kaj ankaŭ spriton, sed la plej spritaj pikparoloj de Marko Tuen (Twain) estis ĉiam nur humuraj. Simile, vi volonte difinus la vorton **instinkto** kiel tion, kio utilas kiel inteligento al la specoj, kiuj ne havas tiun econ ; sed la homo rajtus je la instinkto, kvankam ĝi estas inteligenta.

- Vi tamen ne kuraĝos, mi esperas, similigi la inteligenton de via hundo kun tiu de iu Bosuo (Bossuet) aŭ de ia Paskal.

- Mi ankaŭ ne egaligos vian flarkapablon kun tiu de Musko, aŭ vian senton pri orientiĝo kun tiu de vojaĝaj kolomboj, diris Fabricio ; la hundoj estas hundoj kaj havas ecojn de hundoj, la homoj estas homoj kaj havas ecojn de homoj ; la inteligento de l' homo estas multe pli elvolviĝinta ol tiu de l' hundo, la flarilo de l' hundo estas multe pli elvolviĝinta ol tiu de l' homo ; mi nun asertas, ke ne ekzistas **esenca** diferenco inter la inteligento de l' homo kaj tiu de l' hundo, same kiel ne ekzistas esenca diferenco inter la flarkapablo de tiuj du animalaj specoj.

- Vi argumentas logike, mia kara amiko, diris la abato, **apriore** konsentante pri malesto de ĉiu esenca diferenco inter la homo kaj la hundo, ĉar tio kongruas kun via evoluisma sistemo ; se vi konsentus, ke la homo kaj la simio **esence** diferencas per la inteligento, vi ne povus kompreni, ke simio fariĝis homo sen la faro de Dio ; kaj estas por vi **neceso**, ke vi klarigu ĉion sen la partopreno de Dio !

- Se mi konsentas, ke la animaloj estas, je grado pli malpli alta, dotitaj per inteligento, kiu esence ne diferencas de tiu de l' homo, respondis s-ro Tako, tio okazas nek **apriore** nek pro sistemeco, kiel vi emas kredi, sed sekve de longaj kaj paciencaj observoj. Vi legu la libron de Romanes pri la instinkto kaj inteligento de la animaloj, kaj en ĝi vi trovos priskribon super precizaj faktoj, kiuj nerefuteble pravas, ke la simioj, elefantoj, hundoj,

ktp, ktp., estas inteligentaj. Aŭ, prefere, rigardu ĉirkaŭ vi, vivu en la intimo de hundo, kiel mi faris jam delonge; vi observu ĝiajn ĉiutagajn agojn kaj, ĉiufoje, kiam vi vidos ĝin fari ion interesa, metu vin en ĝian haŭton kaj vidu mem, per kiuj asociadoj de ideoj, per kiuj rezonadoj vi povus plenumi la saman aferon. Mi penis tion fari dum mia kunvivado kun Musko kaj alvenis al la konkludo, ke tiu bona hundo, kvankam ĝi malsuperas mezinteligentan homon rilate racion, tamen ne estas senigita je logiko kaj simpla saĝo.

Vi jam scias, ke ĝi estas mensogulo, kio signas ian inteligenton, kaj ke ĝi tre hontas, kiam oni surprize trovas ĝin pekanta; ĝi tre bone scias pri permesita aŭ malpermesita afero, sed se ĝi obeas la regulon en mia ĉeesto, ĝi ofte fiprofitas mian foreston por malobei, tute same kiel farus homo. Neniam mi batis ĝin, sed mi elmontras mian malkontenton per malbonhumoro, kiam ĝi malbonagis, kiam ĝi, ekzemple, profitis je tio, ke mi atente observas floron, por timigi kelkajn ŝafojn, kiuj sin paŝtas en la erikejoj. Tiam interese estas vidi, kiel malfeliĉa ĝi estas! Ĝi rigardas min kun la vosto inter la kruroj, dum mi ŝajnigas ne rimarki ĝian ĉeeston; ĝi atentigas al ĉiuj miaj movoj, ĝi kaŝobservas, ĉu mi ne favoros ĝin per amikema rigardo kaj, tuj kiam ĝi rimarkas ĝin, ĝi levas la voston kaj sin ĵetas al mi, dankante per gajaj bojoj, ke mi ĉesigis ĝian punon.

- Ĉiuj hundoj milde traktataj agas same, diris la abato. Kardinalo Manning*, respektinda aŭtoritatulo sendube, opinias, komparante la strukturon de l' homo kun tiu de l' simio, ke ekzistas inter ili **unu sola** aro da similoj kaj **kvino** da malsimiloj.

- Nu, ni prikonsideru super tiuj similoj kaj malsimiloj, diris s-ro Tako, interplektante la krurojn laŭ sinteno oportuna por aŭskulti predikon.

- Mi detale konas la temon, ekdiris la abato, tial ke ĝi estas unu el la lastaj, kiujn mi pritraktis antaŭ mia malsano, kaj mi opinias, ke la argumentoj de kardinalo Manning estas tre trafaj kaj samtempe tre solidaj.

"Kompreneble oni trovas la aron da similoj en la formo kaj aranĝo de la ostoj de la skeleto; tamen ekzistas tre evidenta malkontinuo inter la skeleto de l'

* *La Tialoj de mia kredo de Kardinalo Manning, ĉefepiskopo de Vestminster.*

homo kaj tiu de l' simio, kiu plej similas la homon ; nu, neniu ĉenero ĝis nun plenigis tiun malkontinuon." - Ĉu do la Pithekanthropo el Javo ? rimarkigis Fabricio.

- Pri ĝi la scienculoj mem ne interkonsentas, respondis la abato ; cetere, mi cedos al vi, se vi insistas, ke tiu aparta fosilio ŝtopas la mankon, kiu apartigas la homan skeleton de tiu de l' simioj homsimilaj ; tio ja estas negrava, konsidere, ke, kompare al tiu aro da skeletaj similoj, stariĝas kvin aroj da tre rimarkindaj diferencoj.

"La unua aro estas la parolata lingvo. Se oni asertas, ke la balbutado de l' simio simetrias al la homa lingvo, mi respondos, ke la lingvo de l' homo havas iun filozofion, esprimas la personon, la agon, la pasion, la tempon, la rilaton, la kondiĉon, ĉion, kion ni nomas gramatiko. Montru al mi la plej etan signon pri gramatiko ĉe l' simioj!"

La abato ekscitiĝis ; s-ro Tako ridetante aŭskultis, desegnante per sia bastono arabeskojn sur la sablaĵo.

- La dua aro, plue diris la abato, estas la abstrakto-kapablo, kiu verkis gramatikon, ektrovis la principojn de Njuton, kaj inventis la elektran telegrafon.

"La tria aro estas la krea inteligento, per kiu estas produktita la **Odiseo**, la **Dia Komedio**, **Guy Mannering***, la **Moseo** de Mikael-Angelo kaj la **Pastorala Simfonio** de Bethoven.

"La kvara aro estas la moralordono, la juĝkapablo, la saĝo, kiuj levis la nivelon de l' homa vivo, kiuj formis la juron kaj la ordon de l' mondo.

"La kvina aro estas la intima mondo de la morala konscienco, la sento de submetiĝo antaŭ supera Leĝisto kaj Juĝisto, kaj la certo, ke iam ni devos, antaŭ li, konfese raportti pri nia pasinto.

"Tiu kvin aroj de malsimiloj ne estas malpli palpeblaj ol la aro da similoj inter la korpo kaj la ostoj.

"Indukto, kiu fontas el unu sola aro da fenomenoj bagatelaj, kaj kiu preterlasas kvin arojn da fenomenoj plej gravaj, tia indukto estas nek scienca, nek filozofia. Ĝi estas nur ofendo al la filozofio, al la scienco kaj al la saĝo. Sed iuj homoj preferus rezigni je la posedo de

* *Guy Mannering* aŭ *La Astrologo*, romano de Valter Skot (1815)

ĉia inteligento ol agnoski la ekziston de sia kreinto."*

La abato iom patose parolis ; s-ro Tako atente aŭskultis ; en la ombro dormis Musko, indiferenta pri la diskuto, kiu al ĝi rilatis.

- Mi absolute ne deziras tian morton de la inteligento, kviete parolis ree Fabricio, kaj mi ne emas nei la apartajn kapablojn, kiujn mi trovas en mia homa naturo, por konvinki min pri mia simia deveno. Mi asertas nur, ke vi malpravas, neante, ke la animaloj posedas la komencajn elementojn de ĉiuj tiuj kvalitoj, kiujn vi konsideras sufiĉaj por difini netransireblan limon inter la homo kaj la aliaj vivuloj.

- Elpruvu tion, diris la abato, siavice alprenante la sintenon de homo, kiu prepariĝas por aŭskulti.

- Kaj unue, mia kara abato, mi opinias, ke vi estis tre malavara en via nomenklaturu, menciante kvin arojn da malsimiloj, dum vi konsentas nur pri unu aro da similoj. La homo similas al la antropoidaj simioj, ne nur per sia skeleto, sed ankaŭ per siaj muskoloj, sia hepato, siaj renoj, siaj haroj, ktp, ktp, kaj eĉ per sia cerbo, unuvorte, per ĉiuj siaj histoj kaj ĉiuj siaj internaĵoj. Mi ne insistos pri la similoj el la embriologia fako. La homo ja originas de fekundigita ovo, same kiel la gorilo. Juna embrio homa ne povas esti distingita je tiu de hundo ; en pli evoluinta stadio, ĝi restas ankoraŭ tute komparebla kun tiu de simio. Laŭ la embriologio same kiel laŭ la anatomio, la homo estas simio el la klaso de l' Primatoj.

"Kaj tiu aro da similoj, kiujn vi subtaksas hodiaŭ, tial ke ilian ekziston vi ne plu povas nei, forte embarasis, antaŭ tridek jaroj, tiujn, kiuj defendis la aferon, por kiu vi pledas en ĉi tiu momento. Pri tio atestas, ke la fama profesoro Owen, aplaudita de ĉiuj ortodoksuloj, asertis, ke ekzistas esenca malsimilo inter la cerbo de l' homo kaj tiu de l' gorilo ; li neis la ekziston de la eta hipokampo ĉe la homsimilaj simioj, kvankam ties cerbon li eĉ neniam sekcis. Heŭksli, disponante cerbon de gorilo, male konfirmis la ekziston de tiu eta hipokampo kaj skribis al Owen, ke li mem venu por konvinkiĝi pri tio ; tamen, kvankam pruvita kaj kontrolita estis la fakto fare

* La tuta argumentado de la abato estas laŭvorte ĉerpita el la tradukaĵo de la ĵus citita verketo de kardinalo Manning.

de multaj natursciencistoj - cetere tiu pruvo estis poste farita plurfoje kaj hodiaŭ neniu plu parolas pri tiu supozita malsimilo, - Oven, du jarojn poste, dum zoologia kongreso argumentis por pravigi sian antaŭan aserton !

"Verdire mi ne opinias, ke tiu eta hipokampo estas tre grava per si mem ; mi faras al vi tiun rakonton, por montri, ke en via medio ne ĉiam oni rigardis sensignifa tiun unuan aron da similoj inter la korpo de l' homo kaj tiu de l' simioj. Tiu similo, kvankam ĝi ne kontraŭas la dogmon, memkompreneble, ĉar ĝi estas hodiaŭ pruvita, ne povis esti al ĝi tre simpatia, kiel vi tiel elegante diris rilate al la evoluismo, rigardata entute."

- Senmotive vi disputas, diris la abato, ĉar mi jam senkondiĉe konsentis pri la ekzisto de tiuj korpaj similoj.

- Nu bone, respondis s-ro Tako, sed vi klarigis ilin en iu eta aro sensignifa, dum vi faris kvin gravajn arojn per la esencaj malsimiloj ! Fine, mi estos bonhumora ludante, kiel okazas, kiam oni havas multe da atutoj ĉemane.

- Montru tiujn atutojn, diris la abato.

- Viaj dua kaj tria aroj, komencis Fabricio, ne ŝajnas esence malsimili unu de la alia ; plie, ili ŝajnas forte dependi de la unua aro : Homero ja ne povus prikanti la vojaĝon de Uliso, se li ne estus naturdotita per lingvo-kapablo. Sed mi lasas flanke dum momento tiun demandon pri lingvo, kaj mi limigos min al tiuj pri la homaj verkoj, kiuj povus estiĝi sen parola lingvo ; ili ne estas multnombraj, mi certigas al vi.

"Preciza rezonado ne mankas ĉe la animaloj ; se vi havas tempon por iri en Amerikon kaj tie vidi kastorojn, vi konstatos, ke iliaj urboj estas konstruitaj de veraj inĝenieroj, kiuj konas kaj inteligente aplikas la leĝojn de la hidrostato ; tie estas kanaloj, digoj, troplenujoj, deverŝuoj, konstruitaj kun rimarkinda zorgo pri horizonteco kaj diferencoj de nivelo. Por vi tio estas mirinda instinkto ! konsentite ; sed homo ne farus la saman aferon ne rezonante kaj kalkulante.

"Mi ne scias, ĉu animaloj inventis ion analoga al nia elektra telegrafo, kaj pri tio mi rezervas mian opinion, tial ke ni tute ne konas hodiaŭ ĉiujn mirindaĵojn el la animala mondo, sed estas ekzemploj pri animaloj, kiuj akiris komprenon pri mekanikaĵoj, konstruitaj de homoj. Pri tio faras malprofitan sperton la trapĉasistoj, kiuj uzas aparatojn, por kapti etajn mambestojn pro ties

multvalora pelto ; ja glutonoj* scipovas senriske manĝi la logaĵon ; tiuj inteligentaj kaj avidaj animaloj unue igas malebla la funkciadon de l' kaptilo kaj poste manĝas tute sekure la porcion, kiu ne estis al ili destinita. La ĉasistoj vane cerbumas por inventi novsistemajn kaptilojn; ĝis nun ili ne sukcesis eviti la fuŝfarojn de tiuj netoler- eblaj malamikoj.

- La sinkonservemo instigas la animalojn instinkte suspekti la danĝeron, diris la abato.

- Jen vi ŝirmas vin malantaŭ banalaĵo, mia kara amiko, respondis s-ro Tako. Ne antaŭlonge la peltindustrio instigis la homon elpensi la aparatojn, kiujn ili hodiaŭ utiligas, kaj vi certe konsentos, ke la unuan fojon, kiam glutono vidis kaptilon, tio estis nova por ĝi. Nu, kio karakterizas la instinkton, tio estas, ke ĝi estas fiksa kaj ne modifiĝas laŭcirkonstance ; estas do la inteligento de la animalo, kiu scipovis suspekti la danĝeron, kaj ĉefe kontentigi ĝian manĝemon per ia elturniĝo.

- Mi rimarkigos al vi, interrompe diris la abato, ke vi apogas vian argumentadon per difino pri la instinkto, kiun mi ne akceptis. Mi konas tiun faman difinon pri la inteligento, al kiu vi aludas : la eblo profiti je sia sperto. Nu, tio ne estas sufiĉa karakterizo ; kio, miaopinie, distingas la homan inteligenton, tio estas ĝia abstraktokapablo, kaj ankaŭ la tri aroj da fenomenoj, kiujn mi ĵus elnomis. Montru al mi animalon, kiu scipovas diri "tuto estas pli granda ol parto" !

- Kiel ĝi povus tion fari sen parola lingvo, diris ridante s-ro Tako, kaj kiel vi mem povus fari tion, se vi ne kapablas paroli, almenaŭ spirite ; sed post momento ni havos okazon diskuti pri la parolo ; kio pruvas al vi, ke hundo aŭ simio ne havas la abstraktokapablon, pri kiu vi tiel fieras ? La kastoro faras rezonojn, kiuj ŝajnas matematikaj, kiam ĝi konstruas digojn.

- Kiuj ŝajnas ! mokete diris la abato ; sufiĉas al vi malmulto por atribui al tiuj mizeraj dentskrapuloj la genion de Paskal ; kaj tamen vi diros, ke vi ne estas sistemulo kaj ke libere vi konkludas el senpartieca observado super la naturo !

* *Glutono (gulo luscus), fortega animalo, kies longo atingas unu metron ; viandmanĝanta ; vivas en nordaj ĉirkaŭpolusaj regionoj.*

- Ja, ridante diris Fabricio, al mi estas tute memseke atribui al animaloj la rezonojn, kiujn mi devus fari por realigi kion ili faras ; sed vi mem, mia kara amiko, sur kia bazo vi staras por aserti, ke la mutaj animaloj ne havas racion, nek saĝon, nek moralan konsciencon, ktp. ? Vi apogas vin nur sur la fakto, ke ili ne kapablas eldiri tion en belaj paroladoj, ĉar, miasupoze, vi ne kredas je la metempsikozo kaj neniam estis hundo aŭ simio por povi rakonti pri kio okazas en ilia konscienco.

- La simpla saĝo sufiĉe pravas tion al mi, diris la abato.

- Necesas do, ke mi estu senigita je simpla saĝo, respondis s-ro Tako, ĉar tio tute ne ŝajnas al mi evidenta. Mi konstatas, ke mia hundo havas nocion pri tio, kio por ĝi, hundo, estas bono kaj malbono, t.e., pri tio, kion mi permesas aŭ malpermesas al ĝi. Ĉiutage ĝi donas al mi pruvon pri tio ; mi ne pretendas koni, kion ĝi pensas kaj ne elmontras.

- Montru al mi do la artverkojn de simioj kaj hundoj, interrompis la abato.

- Montru al mi tiujn de l' fueĵoj* aŭ de l' negritoj, rebatis Fabricio ; kaj rilate al la domoj de l' kastoroj, al la loĝejoj de l' respublikanaj birdoj, al la ĉeloj de la abeloj, al la nestoj de l' termitoj, vi malkonsentos kvalifi ilin artverkoj, tial ke ili estas verkoj de animaloj ! Vi malkonsentas pri tio, ke formikoj kaj aliaj animaloj, kiuj vivas kunare, havas juron kaj leĝaron kaj, tamen, iliaj socioj povus esti modeloj por ni. Eble vi scias, ke antaŭ nelonge oni eĉ observis, ĉe iaj himenopteroj, strangajn movojn regulajn kaj kune faritajn, kiuj ŝajnis tiel senutilaj, ke oni kredis, ke temis pri ceremonioj de religia kulto !

- Tiel do, la formikoj kredus je Dio ! ekkriis la abato ridegante. Vere, mia kara amiko, vi estas amuza pro via amo al la bestoj : ĉion vi konsentas al ili !

- Kial vi volas, ke mi neu kion mi vidas ? kviete respondis s-ro Tako ; kaj se la formikoj kredas je ia Dio simila al ili, kiel vi volas, ke mi trovu tion eksterordinara ? Vi mem ja kredas ion similan !

- Mia kara amiko, diris la abato kun pli severa tono,

* Fueĵoj, indiĝenoj de la arkipelago "Tero de Fajro" ĉe la suda ekstremo de Suda Ameriko.

mi pensis, ke vi parolas serioze ; estas aferoj, pri kiuj ne estas permesite ŝerci ; estas nura moko vidi ĉe la plej malŝatindaj estuloj el la kreitaro la plej noblajn sentojn de l' homo.

- Neniam pli serioze mi parolis, diris Fabricio ridante. Mi ne havas la intencon pruvi al vi, ke l' formikoj, la kastoroj aŭ la glutonoj estas homoj. La formikoj estas formikoj, la kastoroj estas kastoroj, kaj mi konfesos al vi, ke ŝajne ili neniel profitus ŝanĝante sian naturon kontraŭ la nia. Neniam mi pretendis, ke vi trovos en tiu aŭ alia el tiuj animaloj, ekzakte tion, kio ekzistas en la homo ; male mi asertas, ke tion vi ne trovos. Sed, ripete, vi ne rajtas konkludi el la observado super la naturo, ke ekzistas **esenca** diferenco inter la kapabloj de l' homoj kaj la respondaj kapabloj de la animaloj.

- Por tio mi apogas min sur la aŭtoritato de l' koncilioj, diris la abato.

- Sed ĉu la koncilioj, kiuj difinis, inter la homo kaj la animaloj, tiun netransireblan dislimon, fakte konis la animalojn ? Ekzemple, ties partoprenantoj neniam vidis antropoidojn.

- Dio inspiris ilin, interrompis la pastro.

- Jen vi do revenis al la revelacio, diris s-ro Tako. Kaj same okazos ĉiufoje, kiam la sciencaj rezonoj ĝenos vin ; estas preferinde, ke vi daŭre staru ĉe tia vidpunkto kaj per antaŭdecido rifuzu ĉian diskuton.

- Mia simpla saĝo kaj mia racio sufiĉus por instrui al mi ĉion, kion hodiaŭ mi kredas, se la Eklezio jam ne estus min instruinta, respondis la abato.

S-ro Tako senresponde ridetis, kaj per la mano karesis Muskon, kiu ĵus vekigis.

- Nu ! kompatindulo, li diris al la hundo, ci estas tedita per nia filozofia interparolo, sed vi rigardu, li daŭrigis, sin turnante al la abato, ja vidu, ĉu ne estas vere, ke ĝiaj okuloj brilas per fajro el inteligento, kaj ĉu ne aspektas kvazaŭ ĝi volus kompreni, kion al ĝi mi diras ! Ifoje mi kredas, ke tiu kompatinda hundo suferas pro tio, ke ĝi ne havas parolkapablon.

- Almenaŭ jen estas diferenco, pri kiu vi konsentos, ke mi ne bezonas la aŭtoritaton de la Eklezio por ĝin konstati, diris iom akre abato Ĵozon. Vi mem konsentis, ke tiu bonega Musko ne havas parolatan lingvon.

- Pri tio mi ja konsentas, diris Fabricio ridante, kaj vi

vidas, ke tia manko estas kelkrilate profita, ĉar dank'al ĝi la brava hundo utile dediĉis al senlaciga dormado la tempon, kiun ni vane elspezis en senfrukta diskutado.

"Mi eĉ humile konfesos al vi, ke la parolata lingvo de l' homo ŝajnas al mi ege pli supera ol ĉiuj interkompreniloj, kiujn posedas aliaj animaloj, sed mi ne kuraĝus tion aserti ; mi ne sufiĉe konas la vivmanieron de ĉiuj vivuloj ; la formikoj, kiuj estas surdaj kaj sekve ne havas fonetikan lingvon, ŝajnas interdiri tre interesajn aferojn, per reciproka frotado de siaj antenoj ; bedaŭrinde, neniam mi ekscios kion ili interdiras.

"Rilate al la eligo de sonoj, ekzistas, nekontesteble, multe pli da vario en tio, kion povas diri homoj, ol en tio, kion krias hundoj aŭ simioj. Sed al kelkaj animaloj ne mankas ia amplekso en la voĉa aparato. La najtingaloj aŭdigas, dum belaj noktoj someraj, kantojn variaj kaj mildaj, kiuj, kvankam neegalaj al la Pastoral Simfonio de Bethoven, tamen signas muzikajn kapablojn ŝatindajn.

"Koncerne al la papagoj, la amplekso de ilia voĉa aparato ŝajnas ne malsuperi tiun de l' homo ; ĝi eĉ estus pli kompleta, almenaŭ rilate al la akutaj sonoj, laŭ la opinio de kompetentuloj.

- Tion mi antaŭpensis, vive diris la pastro ; jen vi komparas la voĉon de papagoj al la parolo de l' homo, tial ke tiuj mizeraj birdoj scipovas stulte imiti, ne komprenante ilin, la vortojn, kiujn ili aŭdas ĉirkaŭ sia grimpilo ! Nun , mi kaptas vin ĉe freŝa faro de vola sofismo, ĉar vi scias same bone kiel mi, ke l' papagoj ne komprenas kion ili diras !

- Ili ne komprenas kion ili diras, kiam ili france parolas, pri tio mi konsentas, gaje diris s-ro Tako ; sed ĉu vi scias, ke ili ne interkompreniĝas, kiam ili papage parolas ? Ĉu do neniam vi ĉeestis la kuŝiĝon de papagetoj en varmaj landoj ? Tiam okazas surdiga babilado, kiu daŭras proksimume unu horon post la malapero de l' suno. Neniam mi komprenis ion el tio, kion interrakontas tiuj bruaj animaloj, sed mi akiris, observante ilin, la konvinkon, ke ili fakte interparolas komprene. Kaj se mi amuziĝus per imito al iliaj krioj - kio estus al mi ege malfacile, ĉar tiuj krioj estas tre variaj kaj rapidaj, - ĉu vi ne pensas, ke tiuj petolemaj birdoj ne farus rilate al mi la malmulte flatan rezonon, kiun vi ĵus faris pri la papagoj, kaj ke en sia lingvo ili dirus : "Jen stultulo, kiu sufiĉe bone imitas

kion ni diras, sed evidente li komprenas nenion el tio, kion li "ripetas". Kaj la papagetoj pravus.

- Ĉu do la papagoj havas parolan lingvon, samkapable kiel la homo ? demandis la abato.

- Samkapable kiel la homo, tio estas afero, pri kiu mi ne povas aserti, nek nei, respondis Fabricio. Vi rimarkigis al mi, ke la homa lingvo havas iun filozofion, esprimas la personon, la agon, ktp., ktp. ; mi ne scias, ĉu la papaga lingvo havas gramatikon, kaj ankaŭ vi mem ne scias, mia kara amiko, ĉar neniu penis por ĝin lerni. Sed mi ne konas kialon, laŭ kiu vi **apriore** konsentus, ke la konversacio de papagetoj ne estas tiel altnivela, kiel tiu de l' negritoj aŭ de l' fueĵoj. Koncerne al la kompatindaj birdoj, kiujn ni bredas ĉe grimpiloj, ili amuziĝas, imitante kion ili aŭdas, kaj tion ili faras tute same kiel infano, kiu nekomprene lernas fablon de Ezopo. Oni observis iliajn provojn kaj oni precize konstatis, ke la mekanismo de ilia memoro estas la sama, kiel tiu de l' homo.

- Ĉu ankaŭ la papagetoj havas sian Odiseon, siajn Nibelungojn, sian folkloron ? diris la abato.

- Tion mi ne scias, serioze respondis s-ro Tako. Tial ke tiuj bruaj birdoj ne havas manojn, ili do ne skribas, kaj mi ne kredas, ke per sia beko ili registris, sur arboŝeloj, la glorajn farojn de siaj herooj. Mi nur konstatas, ke ili parolas, kiam ili estas kune en arbaro kaj ke, aliparte, ili havas organon sufiĉe ampleksan por imiti la voĉon de l' homo. Ĉu iliaj konversacioj estas filozofiaj diskutoj ? mi deziras, ke ne, sed nek vi nek mi povus tion nei aŭ jesi.

- Jen estas, diris la abato kun venka rideto, ke vi donas filozofion al la papagoj, kiel vi antaŭ momento donis matematikan genion al la kastoroj !

- Mi nur faras konstatojn, respondis Fabricio : la papagoj havas lingvon, kaj se ĝi eĉ malsuperas tiun de l' homo, tamen ni neniel rajtas supozi, ke ĝi **esence** diferencas de ĉi tiu. Kaj tiu tuta filozofio, pri kiu vi tiel fieras kaj dank'al kiu vi tiel alte lokumas la homon, mi emas kredi, ke ĝi necese dependas de via parola lingvo kaj ke ĝi povus resumiĝi per la malgajiga kaj profunda parolo de Hamleto : **Vortoj, vortoj, vortoj !**

- Mi estus kontenta aŭdi vin pruvi tion, diris la abato. Nu, ĉu do mutulo ne pensas ?

- Post momento ni pridiskutu tion, se vi deziras, plue diris s-ro Tako. Nun lasu min konkludi.

- Konkludu, mia amiko !

- El ĉiuj malsimiloj, per kiuj kardinalo Manning faris kvin timegindajn arojn, oni devas ekkoni, ke iujn vi akceptas senpruve, **aprioro** aŭ pro fido al la aŭtoritato de koncilioj kaj havante nenian rimedon por pruvi ilian ekziston : mi aludas la malsimilojn, kiuj rilatas al la intimaj kaj ne elmontrataj pensoj de la animaloj.

- Mia racio sufiĉas por pruvi tiun ekziston, interrompis la abato.

- Male, la mia postulas pruvojn, respondis Fabricio. Rilate al la aliaj malsimiloj, tiuj, kiuj elmontriĝas, la senpartieca observado super la viva mondo devigas nin konsenti, ke, se ili estas neneigeblaj en la vidpunkto pri la elvolviĝo de l' kapabloj, ili ne rilatas al la naturo, al la esenco mem de tiuj kapabloj. Mi ne pretendas, ke kastoro scipovas same bone rezoni kiel homo, mi asertas nur, ke, per siaj sciencohavaj konstruoj, la kastoro pruvas, ke ĝi posedas la elementan bazon de l' homa rezonkapablo. La glutono posedas la komencaĵon de nia nocio pri mekanismo. La papago posedas parolan lingvon. El la kvin aroj da malsimiloj, kiujn antaŭmetas la ĉefepiskopo de Vestminster, la solaj, kiujn eblas racie kaj senpartie observadi, entenas do diferencojn de kvanto, kaj ne esencajn diferencojn.

- Mi konsentas kun vi, ke inter la homo kaj la simio ekzistas granda distanco, sed mi kredas, ke tiu distanco, kiu ŝajnas hodiaŭ konsistigi netransireblan abismon, estis primitive multe malpli rimarkebla ; ĝi pligrandiĝis precipe pro tio, ke la simiaj prauloj de l' homo estis pli taŭge naturdotitaj ol la aliaj simioj rilate al la voĉa organo, same kiel nunepoke la papagoj estas tiaj, rilate al aliaj birdoj al ili parencaj.

"La ekzisto de parola lingvo ĉe simia praulo de l' homo faciligis la rilatojn inter individuoj kaj donis al la socia vivo intenson, kiun ĝi ne povis akiri ĉe la simioj neparolkapablaj. Iom post iom, la ekzisto de tia lingvo ebligis al niaj prauloj grandan nombron da operacioj, kies rezulto estis pli kaj pli ega elvolviĝo de la cerbo, sekve de l' principo de Lamark, laŭ kiu la organoj elvolviĝas per funkciado kaj ke la akiritaj ecoj herede konserviĝas. Cetere, mi kredas, ke ankaŭ la lingvo per-

fektiĝis pli kaj pli, kaj ke en la komencó ĝi tre diferencis de l' nuntempa, eĉ ĉe la plej malsuperaj rasoj. Estas dank'al la lingvo, ke l' homoj povis okupiĝi per konsideroj el pli kompleksa klaso ol tiuj, pri kiuj kapablas la mutaj simioj, kaj estas pro tio, ke nunepoke ekzistas inter la cerbo de eminentulo kaj tiu de l' plej evoluinta simio tia diferenco de pezo kaj kvalito, kiu ŝajnas fosi inter la du specoj netransireblan abismon.

- Sed kie estas la gradiĝoj kaj la ŝanĝiĝo ? diris la abato ; kie estas la simio, kiu proksimas al la homo kaj kie estas la homo, kiu ekhomiĝas ?

- Plenfide viaj amikoj starigis tiun demandon antaŭ kelkaj jaroj, respondis s-ro Tako ; ŝajne ili estis trovintaj per tio argumenton, al kiu nenion scienculoj povus respondi, pro manko de paleontologiaj dokumentoj. Kaj jen okazis, ke oni trovis ĉe Trinil, sur la insulo de Javo, la restaĵojn de tiu estulo, kiu similas al la homo kaj kies interna amplekso de l' kranio ĝuste estas intera al tiu de l' homo kaj de la homsimilaj simioj ; oni nomis ĝin **Pitekantropo**, Simi-Homo.

- Tiu skeleto estas simple tiu de idioto kun atrofiiginta cerbo, diris la abato.

- Tio eblas, respondis Fabricio. Sed ĉar tiu skeleto estas, laŭ la opinio de ĉiuj geologoj, treege antikva, ĉar ĝi estas la sola el sia epoko, kiun ni nuntempe konas, estas tute neverŝajne, ke tiu individuo, kiu, pro escepto, troviĝis en taŭgaj kondiĉoj por fosiliĝo, estis plie escepta tipo inter tiuj el sia speco ; estas pli probable, laŭ mia opinio, ke la raso el Trinil konsistis el idiotoj, kiel vi diras, aŭ almenaŭ el individuoj kun cerbo malmulte elvolviĝinta. Cetere, paleontologoj ekveturis al Javo, kie ili esperas trovi aliajn specimenojn de l' sama tipo, sed mi ne scias, ĉu ili sukcesos.

- Nu sekve, ree parolis la pastro, estas difinite, ke nur la parola lingvo faras diferencon inter la homo kaj la simio.

- Komence de l' disiĝo, respondis s-ro Tako, estas probable, ne ekzistis alia pli granda diferenco inter la praulo de l' homo kaj la praulo de l' gorilo ; poste, per la influo de l' parola lingvo, la homo grade diferenciĝis de sia kuzo kaj elvolvis grandan nombron de siaj cerbopartoj, kiuj restis elementaj ĉe la simio.

- Sed, rapide respondis la abato, se estas la parola

lingvo, kiu faris el la homo la mastron de l' mondo, kiel povas esti, ke la papago, kiu posedas la saman sukcesilon, restis tiel malsupera ?

- La cerbo de l' papago, diris Fabricio, estas ege pli **evolviginta** ol tiu de l' plejparto el la birdoj, sed ĝi tamen estas nur birdo. La homo fariĝis supera je la simio, lia parenco, per la parola lingvo, sed la simio jam estis unu el la animaloj plej bone naturdotitaj ; gorilo ne timas leonon. En ĉiu natura grupo el la klasiĝo ekzistas superaj kaj malsuperaj tipoj, **se oni komparas ilin inter si**, sed la polpo, kiu estas la plej rimarkinda el la moluskoj kaj kiu havas okulojn egalvaloraj al tiuj de l' homo, estas tamen malsupera al rato, kiu estas tamen mambesto tre ordinara. Mi ne kredas, ke birdo, kiel ajn ĝi fariĝu, rilate al la aliaj birdoj, povus iam komparindiĝi kun ulo havanta manojn, se limigi min je tiu apartaĵo.

- Do ankaŭ la manoj konsistigas elementon de super-eco, diris la abato.

- Ili estas tre taŭgaj iloj por fari multajn aferojn, respondis s-ro Tako. Rimarku, ke la plejparto el la animaloj, kiuj havas oportunan ilon, akiris per tio mem intelektan superecon, kompare al siaj najbaroj : Se la vosto de kastoro ne povus utili al ĝi kiel trulo, estas probable, ke ĝi ne grade konceptus la utilon de horizontalaj digoj kaj deverŝuoj. Kia estus elefanto sen sia rostro ? Estas tiu mirinda organo, kiu ebligis al ĝi plenumi multajn aferojn kaj, per tio mem, akiri komprenon pri tiuj aferoj ; same, estas la parola lingvo, kiu ebligis al la homo filozofi.

- Fine ni venis al la konvena punkto, diris la pastro, frotante al si la manojn. Espereble vi pruvos al mi, ke sufiĉas, ke estulo estu parolkapabla por fariĝi Paskal aŭ Bekn.

- Ne ĉiuj homoj estas geniuloj, respondis Fabricio, kaj la filozofio de l' kafro aŭ de la ajnuo estas sendube multe pli simpla ol tiu de Kant ; sed mi asertas, ke se li ne estus dotita je parola lingvo, Kartezo ne estus verkinta sian Argumentaĵon pri metodo.

La abato ekridis, kaj same faris s-ro Tako volonte ; Musko, scivola, fikse rigardis al ili, kaj eble pensante, ke ili mokis ĝin, malproksimiĝis kaj eksidis sur la sablaĵo.

- Kaj jen kial via filino estas muta*, diris la abato,

* *Ud. fine de p. 62.*

daŭre ridante ; la scienco vere faras tre subtilajn eltrovojn !

- Malmulte da personoj tamen pripensas, kion mi ĵus diris al vi laŭ ridinda esprimmaniero, ree parolis s-ro Tako. Evidente, se Kartezo ne estus parol- aŭ verko- kapabla, li ne povus konigi al ni siajn admirindajn pripensojn ; kion mi volas diri, tio estas, ke tiujn pripensojn li ne povus **pensi**, ne parolante ilin, almenaŭ spirite. Vi ja povas prezenti al vi ĉevalon, inkujon, tondilon, sed se vi ne estas parolkapabla, vi povas difini inter tiuj objektoj nur rilatojn pri ilia situacio en la spaco ; tiaj estas, mi kredas, la matematikaj rezonoj de kastoroj. La famaj abstraktoj, pri kiuj vi tiel fieras, ili estas vortoj, sed la parola lingvo estas tiom intime ligita al ni nuntempe, ke ni ne povas imagi tion, kio povas esti animalo sen tia kapablo. Kiam mi supozas, ke mia hundo havas ideon, tiam mi samtempe supozas, ke ĝi havas vortojn por ĝin esprimi.

- Sed ĉu tiu spirita voĉo, al kiu vi atribuas ĉefan gravon, ĝuste ne estas ekster la materia kampo, en kiu vi volas nin involvi .

- Ĝi rezultas de materiaj fenomenoj, kiuj okazas en iu tre bone konata parto de nia cerbo, la volvaĵo de Broka. Pruvo pri tio estas, ke la detruo je tiu regiono kaŭzas senparolecon. La idiotoj ankaŭ estas veraj senparoluloj kaj ne komprenas, kion oni diras al ili, kvankam surdaj ili ne estas. Se vi volas peni por observi tion, kio okazas en vi mem, vi rimarkos, ke, por reale kompreni kion al vi mi diras, vi mem estas devigata ripeti tion spirite ; la neeblo kompreni estas pruvo pri foriĝo de l' spirita voĉo.

- Homa animo povas funkcii nur helpe de sana korpo, diris la pastro, same kiel maŝinisto ne povas funkciigi lokomotivon, al kiu mankas iu radaro.

- Ĝuste tio pravas, mia opinie, ke animo ne ekzistas, respondis Fabricio, sed pri tio ni parolos aliam. Mi asertas nur, ke estas la praktikado de l' parola lingvo, kiu elvolvis en nia cerbo la partojn, kiuj nuntempe respondas al la spirita voĉo, partojn per kiuj ni ĝuste plenumas la kvar lastajn grupojn da operacioj el la klasigo de kardinalo Manning. La surdmutuloj povas sekvi rezonadon nur * *Aludo al iu ridinde stranga diro de rolulo en la komedio de Moljer : La Kontraŭvola Kuracisto. Trad.*

per spirita voĉo, rezultanta de cerbo herede konsistigita kiel ĉiuj cerboj, malgraŭ la malperfekto de la voĉaj aŭ aŭdaj mekanismoj. Sed vi mem alvenos al mia konkludo, kiam vi estos dum kelka tempo pensinta pri la rolo de l' parolo en viaj spiritaj operacioj. Ni do ĉesigu tiun diskutadon ; cetere jen estas la tempo por la bano ; la maro ŝajnas tre agrabla.

- Ni iru nin bani, diris la abato, kaj povu la bonfara influo de tiu freŝiga enakviĝo doni al via spirito la sanon, kiun ĝuas via korpo. Vi estas tre malsana, kompatinta amiko mia, li plu diris kompateme, kaj vi ne komprenas, ke vi serĉas tagmezon je la dekkvara horo por nei evidentajn ; vi lacigas vian spiriton por klarigi la plej simplajn aferojn, kiujn nur via malhumilo malebligas, ke vi vidu tiaj, kial ili estas ; la malhumilo estas la plej ega malhelpo al la kredo.

- La ekzercado estas bonfara al la spirito, same kiel al la korpo, mia kara abato ; la ekzercado per trapezo estas bonega, kvankam tia laboro estas vana. Same la filozofiaj diskutoj kaj la verserĉado, se ili estas tute senutilaj, konservas tamen la viglon de nia cerbo. Ni iru nin bani.

LA MORTO

Dum s-ro Tako kaj la abato estis ekirontaj por sia ĉiutaga promenado, infano alvenis laŭ la ŝtona vojeto de la erikejo ; ĝi marŝis nudpiede kaj tenis siajn lignoŝuojn per la mano, tial ke ĝi devis rapide kuri, sed kiam ĝi vidis la du amikojn, tiam ĝi subite haltis kaj demetis sian ĉapon kun tima kaj ĝeneca mieno.

- Kio okazas, mia infano ? milde demandis s-ro Tako.

La infano ĝisorele ruĝiĝis kaj fine ekparolis. Ĝi venis, siadire, laŭ peto de l' maljuna Iva, el Kerevan, kiu, revenante de la lavejo, trovis sian filon morta en la lito.

- Ĉu vi volas, ke ni iru ĝis tie ? diris Fabricio al sia amiko ; la vilaĝo ne estas tre malproksima, kaj mi deziras iom konsoli la maljunulinon.

La abato konsentis, kaj ili ekiris, antaŭitaj de la knabeto, kiu tenis siajn lignoŝuojn per unu mano kaj sian ĉapon per la alia.

- La morto de tiu kompatinda junulo ne surprizas min, diris s-ro Tako survoje ; li estis eksigita el la soldat-servo sekve de grava akcidento kaj, dum sia dujara restado ĉi tie, li volis labori kiel ŝtonhakisto, kio estis por li tro peniga metio. Post kelkaj monatoj, li sputis sangon kaj haltis, sed, ĉar la sangosputado estis ĉesanta, li rekomencis sian laboron ; tio kaj malbona nutrado - ili manĝas nur terpomojn kaj selakton - rapide konsumis lin kaj, kiam mi alvenis antaŭ unu monato, mi trovis lin tute elĉerpita pro l' malsano ; mi tamen pensis, ke, helpe de l' bela vetero, li vivus ĝisautune.

- Ĉu vi kredas, ke li havis la viziton de pastro ? demandis la abato.

- Estas dube, respondis s-ro Tako ; lia patrino vokis pastron ĉe lia lasta sangosputado, sed de tiam lia malsano havis senŝanĝan aspekton kaj nenio povis averti tiujn kompatindulojn pri tuja morto.

Ili daŭre marŝadis silente, ambaŭ absorbitaj per malgajaj pensoj.

La vilaĝo Kerevan havas strangan aspekton : apenaŭ

du domoj estas loĝataj meze de dudeko da ruinigitaj, kies pintaj frontonoj sentegmentaj kvazaŭ veas al la ĉielo ; ĝi aspektas kiel se uragano ĉion ruinigis, kaj tamen, kiam oni proksimiĝas, oni ekkonas, sur la ŝtonoj, la oksidaĵon de l' tempo. La ventegoj forportis la pajlajn tegmentojn kaj neniu riparitis ilin ; meze en tiu kvazaŭa tombego nur du domoj estas nedifektitaj ; ili distingiĝas de la ĉirkaŭaj ruinoj nur per siaj preskaŭ sendifektaj tegmentoj kaj per la maldika fumo, kiu leviĝas el la granitaj kamentuboj.

La domo de l' maljuna Iva estis la pli malriĉa el ambaŭ ; la putrinta pajlo de ĝia tegmento surhavis abundan vegetaĵaron - el muskoj, kotiledonoj, krasulo, - kaj ŝajne ĝi ne estis riparata jam delonge. El la kvar vitroj de la sola fenestreto, unu estis anstataŭita per pajla ŝtopaĵo, alia duonobstrukcita per gluita paperpeco. La pordo estis malferma ; ili eniris.

En la duonmallumo, la maljuna virino, sidanta apud malforta fajro el torfo, murmure trapreĝis sian rozarion, atendante la alvenon de l' klaĉinoj, kiuj helpos ŝin tualeti la mortinton ; la abato proksimiĝis al la fermita lito, en kiu oni divenis kadavron pli ol oni ĝin vidis kaj genuiĝis sur la ĉerko. S-ro Tako mallonge interparolis bretonlingve kun la kamparanino kaj donacis al ŝi iom da mono. Ĉe la foriro la abato, per la afabla helpo de s-ro Tako, sciigis al la kompatinda Iva, ke li faros diservon profite al ŝia filo. Tuj post la eliro, la abato forte spiris.

- Vi sufokiĝis en tiu domaĉo ! diris lia amiko ; jam de dek jaroj mi provas komprenigi al tiuj kompatinduloj, ke la aero kaj la lumo estas necesaj por la sano ; sed ili tro timas la venton kaj la pluvon dum la vintro, kaj la novaj domoj havas eĉ pli malgrandajn fenestrojn ol la malnovaj.

- Ĉu la mortinto ricevis sakramenton ? demandis la pastro.

- Mi kredas, ke ne, respondis s-ro Tako, mi ne pensis demandi la maljuninon pri tio.

La abato gestis surprize kaj kun sufiĉe malkontenta tono demandis :

- Sed pri kio vi do parolis ?

- Ŝi diris al mi, ke ŝia filo "foriris" dum ŝi estis ĉe la lavejo, kaj ke tio estas tre bedaŭrinda, ĉar estis tri semajnoj ĝis la pagdato de la trimonataĵo kaj ke ŝi ne

sciis, ĉu oni pagos ĝin al ŝi.

- Mi ne komprenas, diris la abato.

- Tial ke la kompatinda junulo estis vundita dum milit servado, li ricevis pro tio pensjon ; li enspezis dudek frankojn ĉiutrimonate, sed li povis ricevi tiun monon nur ĉe prezento de atestilo pri vivo. Mi ne kredas, ke estos facile al lia patrino enspezi la rentaĵon de la komencita trimonato.

- Kaj estas pri tia malŝatinda demando pri mono, ke okupiĝas tiu maljunino apud la kadavro de sia filo, ek-kriis indigne la abato ; la koro de l' patrinoj estas do senamiĝinta en tiu terura lando !

- Kvietiĝu, mia amiko, respondis s-ro Tako. Ĉi tie kiel alie, la patrino koro entenas trezorojn el amo kaj sindonemo, sed sesdek jaroj de mizero disŝutas sur la plej profundajn sentojn homajn tavolon da indiferento kaj malmildo. Mi pensas, ke la kompatinda Iva havas tiom da ĉagreno, kiom alia virino, sed ŝi ne havas tempon por ĝemi. La okdek frankoj, kiujn ricevis ĉiujare ŝia filo, portis en la hejmon relativan bonstaton, kiun ŝi ne spertis jam de la morto de sia edzo. Nun ŝi havas neniojn kaj estas tro maljuna por labori ; ŝi devos almozpeti aŭ malsatmorti. Tio estas konsideroj, pri kiuj maljunino rajtas pensi.

- Malgraŭ ĉio, diris la pastro, ŝia indiferento estas indigniga ; mi miras, ke patrino ne pensas almenaŭ dum kelkaj horoj pri la morto de sia filo, ne miksanter en siajn malĝojajn pensojn ideojn pri mono kaj pri materiaj zorgoj.

- La vizaĝo de l' maljunuloj estas flegma, en ĉi tiuj malriĉaj kaj krudaj landoj :

Ili havas la ĉagrenon fieraj kaj la doloron muta, diris unu el la regionaj poetoj. Koncerne la senton, kiun travivas la kompatinda Iva en ĉi tiu momento, ŝajnas al mi, ke ĝi estas precipe mirkonsterna. Ŝi bone sciis, ke ŝia filo ne vivus longe, sed ŝi ne atendis vidi lin "foriri" nun ; ŝi klarigis al mi, ke de kiam li "estis sputinta sian tutan malbonan sangon", li pli bonfartis ; ke ĉi tiun matenon, li estis gaja kaj pli bonhumora ol li estis jam de pluraj tagoj ; ŝi rigardis kiel gajon la eks-citecon de l' febro. Mi opinias, ke la kompatindulo estis sufokata per ektusego.

- Kaj pro tiu nescio pri la danĝero la kompatinda

junulo ne profitis la lastajn helpojn de l' religio ! diris la abato.

- La maljunino ne parolis al mi pri tio, sed mi estas certa, ke ŝi tre bedaŭras tian mankon ; ŝi de nun havos timon dum la nokto, pensante, ke ŝia filo eble venos ek-tiri ŝiajn piedojn el ŝia fermita lito ; ŝi certe pasigos la finan parton de sia vivo, murmurante preĝojn por la animoj el la purgatorio ; jen estas la konsolo, kiun ŝi profitos el sia kredo plena je superstiĉoj. Ŝi certe estus pli trankvila, se ŝi kredus kiel mi, ke ŝia filo tute mortis ; ŝi havus nur ĉagrenon pro lia morto kaj pro perdo de lia pensio.

- Tiel, eĉ antaŭ la terura spektaklo de l' morto vi ĉiam restos kun nekorektebla skeptiko !

- Povas okazi, ke, malfortiginta pro malsano, mi estos artifice varbita de pastro en la momento, kiam mi ne plu povos logike rezoni ; mi scias, ke vi fanfaronas pri tiaj konvertiĝoj **in extremis***. Litre fariĝis apogo por vi ; malfacile oni povis malebligi, ke pastro proksimiĝu al Viktoro Hugo, kiam li agoniis.

- Kiuĵ malhelpis lin, tiuj faris krimon : la pastro ne farus al li malbonon kaj povus lin savi.

- Tio estus laŭdinda, se vi dezirus nur savi lin, diris Fabricio ; mi konsentas kun vi, ke pastro farus nenian malbonon al mortiganto, kiu ne plu havas rezonkapablon ; sed mi opinias, ke estas tre bedaŭrinde, kiam homo, kies vivo estis tute okupata por kontraŭbatali vian pli kaj pli trudeman influon, estas devigita servi al vi kiel sukcesigilo post sia morto, tial ke pastro, profitante lian malfortigon finan, diris al li iajn vortojn kaj ricevis aŭ kredis ricevi iajn signojn pri konsento. Koncerne min, mi firme asertas, ke tio, kion mi hodiaŭ pensas, kiam mi estas tute sana korpe kaj spirite, havas pli da rezona pravigo ol tio, pri kio mi povos konsenti, kiam mi estos duonmorta ; kion mi pensas hodiaŭ, tio rezultas de arango de materiaj eroj, kaj kiam tiu arango estos de-truita, tiam mi ne plu ekzistos.

- Kompatindulo ! ekkriis la abato. Mi tremas, pensante pri via vola blindiĝo ; ĉar fine, vi estas konstruita laŭ la sama modelo kiel mi, kaj mi trafe **sentas** en mi, ke mi ne povas morti entute. Mi ne povas imagi, ke mi ne

* *Lastmomente. Trad.*

estas ; tio kontraŭas al la simpla saĝo, kaj ne necesas esti ricevinta la instruojn de la Eklezio por esti konvinkita pri tio. La senmorteco de la animo estas afero tiel evidenta, ke ĉiuj popoloj kredis je ĝi, laŭ pli malpli noblaj manieroj.

- Krom la budaistoj, kiuj kredas je la fina neniigo, interrompis s-ro Tako.

- Ili deziras la finan neniigon, ree parolis la abato, pro la turmentegoj, pri kiuj estas minacataj en sia dua vivo la malobeintoj al la leĝo, sed ĉu vi pensas, ke ili fakte povas kredi je la neniigo ? Ĉu vi pensas, ke homo povas kredi, ke ĝi tute ekstermiĝos ?

- Tion mi mem firme kredas, respondis Fabricio.

- Vi diras tion, ree parolis la abato kun ekscitiĝo, sed, se vi povus dum momento eliri el la malhumilo de via nekompleta sistemo, vi bone vidus, ke tiu ideo pri kompleta neniigo kontraŭas al via intima sento kaj al la logiko, pri kiu vi tiel fieras. Jen al kia vola blindiĝo kondukis vin dudek jaroj da sciencaj studoj ! Vi ne plu kredas tion, kio estas evidenta por la plej simplaj kaj malkleraj homoj !

- Vi facile povas, mia kara abato, diris trankvile s-ro Tako, kredigi al homoj, ke ili estas senmortaj ; ili ĉiuj eble ne estas pri tio tiel konvinkitaj, kiel ili deziras, sed estas ideo, kiu agrable impresas ilin kaj favoras ; kun plezuro ili ĝin akceptas. Vi ankaŭ diras al ili, ke ĉiujn animalojn ili superas kaj ke Dio, estulo senlime bona kaj aminda, kreis ilin, nur ilin, similaj al si. Ĉion tian oni aŭdas kun plezuro ; dum la roma imperio flatuloj asertis, ke la imperiestroj estas dioj kaj vi opinias, ke tio estis maldelikata artifiko de korteguloj. Se miaflanke mi provus kredigi al la homoj kion mi pensas, nome, ke ili tute mortos la tagon de sia morto, same kiel hundo aŭ kokido, ke ili estas animaloj kiel la aliaj, "kuzoj de simioj", fariĝintaj babilemaj, tion ili malpli volonte akceptus ol viajn flatojn. Tiom malpli, ke tio, kion mi petus, ke ili kredu, postulus intelektan penadon multe pli grandan. Kiel vi tiel trafe diras, via kredo estas en la atingopovo de la plej malkleraj homoj ; ĝi estas simplisma sistemo ; ĝi estas la verko de malklerulo ; ĝi estas akirebla de ĉiuj.

- Ĉiuj viaj mokoĵoj ne malhelpos, ke mi sentas en mi mian senmortecon, ree parolis nebonhumore la pastro.

Mi ne povas koncepti pli grandan absurdon ol ĉi tiun : estos momento, kiam mi ne plu estos.

- Mi ne scias, ĉu Musko en sia hunda cerbo starigas al si tiun demandon, sed, se jes, mi estas konvinkita, ke ĝi alvenas al la sama konkludo kiel vi. Estulo, kiu sentas kaj pensas, ĉar ĝi **estas**, ne povas pensi, ke ĝi ne estas ; vi provas imagi vin neestanta : tio estas absurda, ĉar via ekzisto estas la nepre necesa kondiĉo, por ke vi povu ion imagi. Dum vi parolas pri via persono, vi estas senmorta ; ankaŭ tio estas konsekvenco de nia parola lingvo. Dum vi diras **Mi**, mi estas, mi pensas, mi manĝas, **vi estas** ; estas al vi neeble eldiri frazon, komenciĝanta , per **Mi** kaj esprimanta, ke vi ne estas aŭ povus ne esti. Sed estas tre facile al vi imagi, ke mia **Mi**, mia propra, iun tagon forpasos.

- Tute ne, respondis la abato, ĉar vi estas samspeca kiel mi ; mi pensas, ke kio estas absurda pri mi, tio estas absurda pri vi kaj ke vi estas senmorta kiel mi.

- Tamen vi povus imagi la vivon kaj la mondon, dum mi ne estas ekzistanta, respondis s-ro Tako. Jen, tie, estas la vilaĝo Kerviziu ; vi povas ne scii la nombron de ĝiaj loĝantoj ; vi povas pensi, ke da ili ekzistas malpli ol fakte estas ; la **tuta** forigo de kelkaj el tiuj vivuloj ne signifus do, por vi, ion absurdan. Kaj tiu bonega Musko ? Vi povas facile imagi, ke ĝi tute neniĝos ; vi eĉ estas certa, ke tiel okazos, ŝajnas al mi, kaj mi estas certa, ke tiu bona hundo ne povus imagi la mondon senigita je ĝia persono.

- Nur la homo havas senmortan animon, diris la pastro.

- Eble la papagetoj havas la saman pretendon, respondis Fabricio ; **vi** ne povas imagi **vin** ne ekzistanta, kaj, el tiu neeblo tiel facile komprenebla, vi konkludas, ke vi estas senmorta. Ĉar, aliparte, vi konstatas, ke mi estas via samspeculo, vi atribuas al mi la saman senmortecon, kvankam vi facile povas imagi mian tutan morton, sed vi rifuzas ĝin al Musko, ĉar estante malsimila al ĝi, vi rajtas atribui al vi senmortecon, ne konsentante ĝin al ĝi. Mi rezonas tute inverse : mi konstatas, kiel vi, ke la hundoj, la kokidoj, la lacertoj mortas tute, en tiu senco, ke post ilia morto ilia personeco ne plu partoprenas en la fenomenoj de l' mondo ; aliparte, ŝajnas al mi, ke la homoj mortas sammaniere kiel la hundoj kaj, ĝis nun, mi

neniam observis, ke ilia personeco montriĝas per io ajn post ilia morto ; el tio mi konkludas, ke ili tute mortas same kiel la aliaj animaloj kaj, ĉar mi estas homo, mi kredas, ke mi mortos tute, kvankam neblas al mi, kiel ĵus mi diris al vi, **imagi min ne ekzistanta.**

- Ĉu do vi konsentas, diris la abato, ke via morto ŝajnas al vi mem ia absurdo ?

- Tre bone mi scias, ke mi mortos, kaj ke mia morto ne ŝajnas al mi ia absurdo, sed mi ne povas imagi min neekzistanta, kio estas tute malsama. Mi estas tute certa, ke mi ne diros kiel la Valdemaro de Edgar Poe : "Antaŭ momento mi estis dormanta, kaj nun mi estas morta!". "Mi estas morta" estas la plej ega stultaĵo, kiun povas vortigi nia lingvo, kiu tamen estas tre tauga tiurilate. **Mi** ne povas esti morta, ĉar **Mi** estas rezulto de l' vivo.

Mevo preterpasis kriante apud la du amikoj kaj daŭre flugis trankvile al la Insulo Granda.

- Mi dezirus esti tiu mevo, diris s-ro Tako ; ĝi vizitas per sia potenca flugado la malproksimajn marojn kaj ne atentis ventegojn ; kiam ĝi estas laca, tiam ĝi metas sin sur la ondoj kaj de ili lasas sin luli, sen ia zorgo pri vento kaj pluvego.

- Vi fariĝis tre poeziema, mia amiko, diris ridante la abato. Surprizas min tia ekflugo al la lando el revo, post la tiel decida esprimo pri via vulgara, senideala filozofio.

- La poezio kaj la arto estas banoj el mensogo kaj fikcio, en kiuj ŝatas ripozi la homo, lacigita pro serĉado al la vero. Eldirante mian deziron esti mevo, mi parolis absurde, sed bele prezentita absurdo povas esti agrabla. Ofte plaĉis al mi en miaj karaj erikejoj elvoki la koriganojn* kaj koboldojn, je kiuj kredis niaj prauloj ; floko el nebulo kroĉita ĉe tufo de ulekso ĉe lunbrilo similas al virino blanke vestita, vento ĝin svingas, forportas kaj disĵetas en la aero kaj finite ! Muse** pri tio verkis tre belajn versojn, kiujn mi neniam senemocie ripetas.

- Vi ne sukcesis, mia kara amiko, diris la abato, triumfi, per ĉiuj viaj sofismoj, super la vere homa naturo, kiu estas en vi ; via dia animo emociiĝas, malgraŭ sia materialismo, de ĉio, kio estas nobla kaj bela kaj

* *Malbonfara estulo laŭ la bretona tradicio.*

** *Musset, franca poeto.*

mistera.

- Efektive, respondis s-ro Tako, ĉiufoje, kiam mia spirito estas laca pro tro longa streĉado, volonte mi akceptas la influon de tiaj malprecizaj halucinoj, heredaĵo de cent generacioj kun mistiko kaj malklero ; tiam mi sentas min pli simila al Musko, kiu kriegas al la luno aŭ bojas pro teruro ĉe la vido de paperfolio svingata de l' vento. Sed se mi sentas min pli simila al Musko, mi ne sentas min pli proksima al la vero, male ! Kion ajn mi pensas pri la vanto de l' homa racio, tamen ŝajnas, ke mi devas taksi pli alte la deduktojn de mia vekiginta inteligento ol la mallumajn viziojn, kiuj povas naskiĝi en mia cerbo invadita per la laco kaj dormemo. Ofte mi ja deziris esti mevo aŭ petrelo, kiam, dum varma tago, mi ripozas ĉe la ombro de l' klifo, duone dormanta pro la digestado. Mi sentas min lulata de l' silenta ondo aŭ fluganta en la aero kaj ĉio tio estas tre agrabla ; sed, tuj kiam la malviglo forlasas mian spiriton, tiam mi vidas, kiel absurda estis mia revo, kaj mi rekonsciigas.

- Kaj vi preferas la malvastan logikon, kiu tenas vin al la tero ! vi malkonfesas la flugojn de via animo al la idealo ! vi forgesas la ĝojojn, kiujn vi spertis, imagante, ke vi ŝvebis en la aero aŭ ke vi dormis sur la ondoj.

- Iom da iluzio kaj da mensogo estas agrabla de tempo al tempo ; sed, malgraŭ ĉio, kion vi povus diri, mi rigardas kiel superan la parton de mia naturo, kiu serĉas kaj konceptas la veron, prefere ol tiun, kiu mallaboreme kontentiĝas per eleganta absurdaĵo. **Mi** ne povas esti mevo ; ankaŭ la mevo havas iun **Mi**, kiu rezultas de ĝia strukturo meva, kiel mia **Mi** rezultas de mia strukturo homa. Diri, ke **Mi** volus esti mevo, samsignifas kiel se **Mi** povus esti alia ol **Mi** kaj tio estas absurda. Sed fakte, vi, mia amiko, kiu havas animon sendependa de la korpo, personan animon, kiu kapablas transvivi vian korpaĉon, vi povus havi la deziron fariĝi mevo kaj tamen ne esti rigardata freneza, ĉar ja via animo povus, ne rezignante vian personecon, okupi alian korpon ol tiun de abato Jozon. Vere mi bedaŭras, ke mi ne kredas je animo, kiu permesus al mi, sen absurdo, deziri esti vi aŭ Musko, aŭ petrelo.

- Vi estas freneza, mia kompatinda amiko ! diris la abato.

- Ve, mi scias, ke mi povas fariĝi petrelo nur manĝite

de ĝi, kaj tiam **Mi** ne plu ekzistus, **Mi** estus morta, kaj mia materio ne ŝanĝus la **Mi** de la petrelo, kiu restus petrelo kiel antaŭe. Ni forlasu tiun revon imagi tion, kio okazas en cerbo de mevo, de formiko, de hundo.

- Sed tamen, diris la abato, se vi konsistas nur el materio, se vi rezultas el iu asociiĝo de molekuloj, kiel do povas esti, ke tiu asociiĝo de molekuloj havas unu **Mi**, tiun **Mi**, pri kiu vi ŝajne tiom cerbumas ? Kaj cetere, la materio, el kiu vi konsistas, ne estas konstanta ; ĝi noviĝas senĉese ; ĝi aliiĝas !

- Ankaŭ mi aliiĝas, respondis s-ro Tako ; Paskal mem tion konstatis, kiam li diris : "Tempo kuracas vundojn kaj disputojn, tial ke oni aliiĝas, oni fariĝas alia persono". Sed **Mi** povus ne aliiĝi, malgraŭ senĉesa aliiĝo de mia substanco, se la aranĝo de miaj eroj ne ŝanĝiĝus ; mia personeco dependas de la aranĝo de miaj molekuloj kaj de ilia naturo, sed oni povus anstataŭigi iun ajn el miaj atomoj de karbono per iu alia atomo de karbono, ne farante en mi ian ŝanĝon. La flamo de gaslampo donas perfektan ekzemplon pri io, kio rezultas, sen ia personeca ŝanĝiĝo de senĉese renoviĝo materia. Se la fluo estas bone regulita, en kvieta aero, la flamo ŝajnas tute fiksa ; ĝi estas ĉiam la sama flamo, kun la samaj ecoj, kaj tamen, en unu milono da sekundo, la **tuta** materio, kiu ĝin konsistigas, estis renovigita ; ĝi ne plu estas la sama gaso, ĝi ne plu estas la sama oksigeno ; sed la flamo estas la sama.

- Ĉu la flamo havas iun **Mi** ? demandis la abato.

- Neniam ni povos ekscii pri tio, malgaje respondis Fabricio. Tio estas unu el la mankoj, kiujn forigi la scienco ne povas esperi ; neniam ni penetros en alies subjektivon. La subjektivo de ĉiu estaĵo estas ĝia netuŝebla propreco ; neniu povas tie enketi. Vi, kiu havas parolan lingvon, povas rakonti al mi, kion vi sentas, sed vi laŭplaĉe povas mensogi, kaj, cetere, eĉ se vi raportas al mi fidele vian impreson, mi ne spertas ĝin. Nia mi estas netransdonebla tiom longe, kiom ĝi ekzistas, neniu povas eniri ĝin, sed ni ankaŭ ne povas eliri el ĝi ; ĝi estas por ni la tuta universo.

- Kaj, sentante tiun limigon al via esteco, tiun neeblon eliri for de tiu etdimensia malliberejo, vi kuraĝas nei Dion ! diris la abato. Ĝi estas monstra orgojlo ĉe la konstato de via humilo.

- Mi ne neas Dion, respondis s-ro Tako ; mi konstatas nur, ke la ekzisto de Dio, je kiu vi kredas, klarigas al mi nenion ; ĝi estas vorto, per kiu vi kvietigas vian scibezonon kaj kiu havas la magian povon igi vin rezigni je komprenemo. Sed ĝi estas vorto, kiel multaj aliaj, per kiu vi prezentas la iluziojn de via imago : tuj kiam iluzio estas montrita per vorto, ĝi korpigiĝas, ĝi ekzistas ; kaj poste oni senfine diskutas pri vortoj, kvazaŭ ili havus signifon. Prave mi diris al vi, mia kara amiko, ke la homa filozofio estas rezulto de l' parola lingvo, nura babilado. Mi ne opinias, ke la kredo je la neniigo de sia propra personeco povas esti rigardata kiel signo de malhumilo.

- Estas troa memfido pretendi, ke oni estas la sola verscianto kaj malakcepti tion, pri kio ĉiuj konsentas.

- Se, apud cent mil diapazonoj, kiuj sonas la "a", vi metus unu diapazonon, sonantan la "e", ĉu vi rigardus ĉi tiun lastan ilon malhumila, tial ke ĝi rifuzus soni kiel ĝiaj najbaroj ? Ni ĉiuj estas malsamaj aparatoj, sed multaj povas agordiĝi pri iuj punktoj, ceteraj ne ; ili sonas la "e" meze inter ĉiuj "a", kiuj estas pli multnombraj. Ĉu ili kulpas pro tio, ke ili ne povas agi aliel ol laŭ sia naturo ? Ĉu vi riproĉas hundon, pro tio ke ĝi bojas, gardante ŝafojn, kiuj ŝafblekas ? Ĉiu agas laŭpove.

- Vi pravas, mia amiko, diris la abato : estu paco sur la tero por la bonvoluloj. De nun mi evitas riproĉi vin pro malhumilo, kiu ĉefe suferigas vin, sed mi estas sci-vola ekscii, kiel via logiko tenas vin en mallumo, meze inter tiom da lum- kaj verĝuantoj. Vi diris, ke via **mio** dependas nur de via materia strukturo.

- Ĝis nun ĉio pruvis tion al mi, asertis s-ro Tako, kaj sekve mi sentas la tutan difekteblon de tiu **mio**, al kiu vi bonvole atribuas senmortecon, tial ke vi ne povas imagi **vin** neekzistanta.

- Tamen, aldiris la pastro, se, per la efiko de magia bastoneto, mi povus konstrui korpon identa al la via, atomo laŭ atomo, ĉu tiu korpo estus vi ?

- Ofte tiun demandon mi faris al mi, ĝuste, ĉiufoje, kiam okazis, ke mi estis revinta esti mevo aŭ iu ajn animalo. Unue mi diras al vi, ke tiu konstruo, pri kiu vi parolis, estas tute neebla per naturaj rimedoj : mi hodiaŭ rezultas de **ĉio**, kion mi faris jam de mia naskiĝo, t.e. ekde la fekundigo de la ovo, el kiu mi devenas, kaj ĉio,

kion mi travivis, kaj kio lasis postsignon en mi, faris min tro kompleksa, por ke oni povu konstrui estulon identa al mi. Sed mi malatentas la neblon kaj konsideras la hipotezon. Supoze vi konstruis identan korpon al la mia, kiu konsistas el identaj atomoj apudmetitaj ekzakte laŭ la sama maniero : en la momento mem, kiam li estus konstruita, li havus tute la saman menson kiel mi ; li havus la samajn memorojn kiel mi, ĉar miaj memoroj estas enskribitaj en la materia strukturo de mia cerbo ; li memorus esti vizitinta Amerikon antaŭ pluraj jaroj, kaj tamen li neniam estus irinta tien ; sed ĉu mi mem iris tien ? Certe ne plu estas en mi, en la vivaj partoj de mi almenaŭ, unu sola el la atomoj, kiuj konsistigis min en la tempo, kiam mi estis tie, kaj vi povus, male, per via magia bastoneto, kunigi ĉiujn atomojn, el kiuj mi konsistis iam en Ameriko, por konsistigi mian similulon. Kaj tamen tiuj memoroj trompus lin ; iu memoro estas vera nur, se ĝi ekzakte prezentas al nia konscio la faktojn, kiuj kaŭzis en nia cerbo la apartan aranĝon, el kiu devenas hodiaŭ tiu memoro mem. Estus, en la cerbo de mia Similulo, iu eta aparato, kiu originus de via magia bastoneto kaj ne de reala ĉeesto en Ameriko. Ĝi estus falsa memoro ; la sonĝoj estas sammaniere falsaj memoroj.

- Vi flankiĝas de la demando, kiun mi starigis, diris la abato.

- Mi do revenas al mia Similulo ; li identus al mi en la momento mem, kiam via bastoneto kreus lin, sed li malsimilus min unu milonon da sekundo poste.

- Kaj kial do ? mi petas.

- Tial ke, tiel simila al mi, kiel vi estus lin konstruinta, vi ne povus loki lin tie, kie mi estas, pro tiu stranga eco, al kiu scienculoj donis la ne malpli strangan nomon nepenetrebleco. Nu, ĉar li ne estus tie, kie mi estas, li ne vidus kion mi vidas, ne aŭdus kion mi aŭdas kaj, post momento, li malsimilus min ; kion mi farus en la momento, kiam vi konstruus lin, tion mi farus pro mia propra strukturo kaj pro la kondiĉoj de la medio, en kiu mi estus ; li same agus pro sia propra strukturo kaj la mediaj cirkonstancoj ; li do farus alion ol mi, ĉar malsamaj estus la cirkonstancoj, kaj tiel malgraŭ nia origina idento ktp. : ni diverĝus pli kaj pli, kaj ni havus komunaj, krom nia korpa similo, identajn memorojn nur ĝis iu preci-

za momento, tiu de la naskiĝo de mia Similulo.

- Sed, plian fojon, en la momento, kiam mi lin kreus per mia magia bastoneto, en la momento, kiam li estus al vi identa, ĉu li estus vi ?

- Ne, amiko mia, li ne estus mi : en iu difinebla momento, en iu preciza kaj unika momento el la historio de l' mondo, estus du identaj homoj ; sed ambaŭ havus propran mion, kaj tiel estus sendepende de la ekzisto de sia respektiva Similulo, pri kies ekzisto ambaŭ povus eĉ ne scii, se neniam okazus interrenkontiĝo. Mi havas iun mion, kiu rezultas en ĉi tiu momento el la aglomeriĝo de ĉiuj molekuloj, kiuj konsistigas min, kaj mi ne embarasiĝas por scii, ĉu inter ĉiuj ekzistantaj homoj estas unu, kiu hodiaŭ estas al mi identa. Mi havas seriozajn tialojn por kredi, ke tiu idento estas neebla, sed, se ĝi ekzistus, tio povus embarasi vin, ĉar vi ne povus distingi inter ambaŭ identuloj tiun, kiu estas via malnova amiko, sed nek li, nek mi estus embarasata ; ni ambaŭ havus nian respektivan subjektivon, kiu rezultas de kontinua aglomeriĝo de molekuloj. Sed, tion mi rediras, tia hipotezo estas nepravigebla, kvankam estas interese prikonsideri ĝin, ĝuste tial ke ĝi montras, kiel sensignifaj ni estas.

- Mi kondukis vin ĝis la punkto, kiun mi celis, malicete diris la abato. Vi unue diras, ke via mio **unike** rezultas de ia aranĝo de materiaj molekuloj, kaj, se mi proponas al vi la hipotezon pri alia aglomeriĝo identa al la via, tiam vi deklaras, ke ĝi ne estas **vi**. Evidente vi sentas, ke estas en vi iu unika principo, iu personeco, kiu propre apartenas al vi kaj kiu estas sendependa de tiu akumuliĝo de materio senĉese renoviĝanta.

- Tute ne, vive ekkriis Fabricio. Vi povas imagi kvindek aglomeriĝojn, identaj al iu viva homo, en iu preciza momento. En tiu preciza momento, ĉiu el tiuj aglomeriĝoj havos ian mion, kaj rigardos la kvardek naŭ aliajn kiel fremdajn, malgraŭ ilia absoluta idento. La kvardek naŭ aliaj cetere havos tute la saman mion : tiu mio rezultas nur el la aranĝo de l' materiaj molekuloj, kiuj konsistigas ĉiun aglomeriĝon, sed, kvankam identa en la kvindek individuoj prikonsiderataj, ĝi tamen estas propra al ĉiu el ili.

- La tuta afero estas malfacile komprenebla, diris la abato.

- Ĝi estas malfacile klarigebla pro nia individualista lingvo ; facile mi montros tion al vi per alia hipotezo. Ĉu vi scias, kio estas sinkopo ?

- Bedaŭrinde da ili mi havis plurajn jam de kelkaj jaroj, respondis la pastro ; mi konas tiun ege malagrablan impreson : **foriri** kiel se ĉio estus finita.

- Sinkopo, ree parolis s-ro Tako, identas la morton ; ĝi estas morto nedefinitiva, sed tamen morto.

- La morto estas nepre definitiva, predikeme diris abato Ĵozon. Morto estas disiĝo inter animo kaj korpo.

- Sendube, se via difino estus ĝusta, oni ne rigardus sinkopon kiel momentan morton ; tamen Teofilo Gotje*, en iu fantazia rakonto titolita "Ŝanĝiĝo", donas al iu scienculo la povon elirigi momente la animon el la korpo, sed tenante ĝin ĉe la trafpovo de mano, en ia sfero de altireco, tiel ke ĝi povas reenkorpiĝi kelkajn momentojn poste ; tio estas nura fantazio, delira fabelo, kaj pri tio vi certe konsentas.

- La disiĝo inter la animo kaj la korpo estas definitiva, respondis la abato ; nur Dio povas fari miraklon kaj redoni la vivon al mortinto ; Nia Sinjoro revivigis Lazaron, kaj tio pruvas ties diecon.

- Mi timas, mia kara amiko, ke tiu aserto rezultigos por vi la neceson rezigni pri la teorio, laŭ kiu la animo vivigas la korpon, ĉar ja, estas certe hodiaŭ, ke kirurgoj povas, en iaj kazoj, fari operaciojn, kiuj resanigas el morto.

- Vi denove diras sensencaĵon, diris ridetante la pastro.

- Mi parolas tre serioze, diris Fabricio. La operacio, pri kiu mi parolas, estis farata antaŭnelonge, kaj plurfoje kun sukceso. Temis pri individuoj, kiuj, kun korpo tute sana cetere, mortis pro mekanika obstrukco en la sango-cirkulado. Ili estis mortaj, do la koro ne plu pulsas, la pulmo ne plu spiras, la cerbo ne plu pensas ; ilia korpo estis destinita al putrado, kiu okazas post morto. Kirurgoj havis la ideon ne atendi, ke tiu putro komenciĝu ĉe gravaj internaĵoj, kaj ili faris ampleksan operacion, kiu refunkciigis la cirkuladon ; tiam ĉiuj vivfunkcioj rekomenciĝis kaj la mortintoj reviviĝis.

- Tio signifas, ke ili ne estis mortaj, asertis la pastro.

* Théophile Gautier, franca poeto kaj kritikisto,
1811-1897.

La morto havas kiel nepran karakteron esti definitiva ; letargio estas stato, kiu ŝajnis morton ; tiuj pacientoj estis en letargio, la kirurgoj opiniis ilin mortaj, sed pruvis mem, ke ili eraris, revivigante ŝajnajn kadavrojn.

- Tian respondon mi atendis, diris s-ro Tako ; se via difino pri morto estas vivofino, estas tute certe, ke la reviviĝo estas ia absurdo ; oni ne povas rekomeni tion, kio estas finita. Sed fine, kio estas la vivo ?

- Oni ne povas doni difinon pri la vivo, diris la abato ; tion Klaŭdo Bernar venke demonstris.

- Mi jam respondis al vi, mia kara amiko, rilate al la peraŭtoritata argumento ; vi scias, ke mia malhumilo ne akceptas ĝin ; sed se oni ne difinas la vivon, oni almenaŭ ekkonas ĝin per io videbla, kaj vi ne neos, ke ĉe ĉiu vivulo ekzistas konstanta renoviĝo de la interna medio ; tiu renoviĝo okazas iuparte per la enkonduko de novaj elementoj : oksigeno de la spiro, nutraĵoj glutataj per la digesta organo, aliparte per elmeto de malutilaj elementoj: funkcio, kiun plenumas la renoj kaj aliaj glandoj. La cirkulado, aliparte, kirlomiksas senĉese tiun internaĵon, kiun ni nomas sango kaj limfo, kaj la rezulto de ĉio tio estas, ke la elementoj de nia korpo ne detruigās, tial ke ili senĉese trempigās en iu taŭga medio. Miaopinie, estas tiu fenomenaro, kiu konsistigas la vivon ; sed, ĉar vi ne konsentas, ke la vivo estas difinebla, mi diros al vi nur, ke ni ekkonas ĝin per tiu renoviĝo de la internaĵo ; kiam ĝi ne plu okazas, kiam ne plu pulsas la koro, ne plu spiras la pulmoj, tiam ni diros, ke korpo mortis. Kaj estas pro tio, ke sinkopo estas momenta morto. Se la aparato ĉesis funkcii pro iu nedaŭra kaŭzo, ĝi rekomencos siajn ritmajn movojn, tuj kiam estos malaperinta la kaŭzo ; mortinto reviviĝas ; se tiu nedaŭra kaŭzo malaperis pro via faro, tiam vi estos kuracinta la morton.

- Tio pruvas, diris la abato, ke vi donis pri la vivo nesufiĉe kompletan difinon, ĉar ĝi ne kongruas kun la kredo, komuna al ĉiuj homoj, ke la morto finas definitive la vivon.

- **Kaj** pro tio, ke kredo estas komuna al ĉiuj homoj, vi konkludas, ke ĝi havas absolutan valoron ! Mi ne akceptas la peraŭtoritan argumenton, kaj tiu per la saĝo de la amaso estas eĉ pli malakceptinda. Nia lingvo, kiu estas erarplena, ĉar ni ricevis ĝin de l' malkleruloj, kiaj estis

niaj prapatroj, havas du vortojn : vivo kaj morto, la vulgarulo kredas, ke tiel estas la regulo ; kaj tio sufiĉas, por ke vi riproĉu min pro frenezo, tial ke mi asertas, ke sinkopo havas **ĉiujn** karakterojn de morto kaj iafoje morto estas kuracebla !

- La morto estas disiĝo inter korpo kaj animo, flegme rediris la abato ; ĝi okazas nur unu fojon kaj estas definitiva ; sinkopo ne estas morto, ĉar ĝi estas nedaŭra.

- Amen, diris s-ro Tako. Cetere, mi malpravus flankenigante de mia temo kaj havante kun vi tiun diskuton, al kiu viaj **aprioraj** difinoj ne ebligas, ke vi partoprenu. Mi ĵus demandis vin, ĉu vi scias, kio estas sinkopo ; mi ne rediros, ke ĝi estas momenta morto ; sed vi devas konsenti kun mi, ke ĝi esta stato, en kiu la koro ne pulsas, la pulmoj ne spiras, la cerbo ne pensas ; la personeco ne plu ekzistas, kaj tio sufiĉas al mi por mia rezonado.

- Mi do aŭskultas pri tiu rezonado, diris la abato.

- Ĉar vi havis sinkopojn, komencis Fabricio, estas vi kaj ne mi, kiun de nun mi prenos kiel objekton, tio plie multe faciligos al mi la lingvaĵon. Mi supozas, ke vi havis sinkopon, kio viadire ne estas momenta morto, sed kio, laŭ via propra sperto, rezultigas la neniigon de konscia personeco. Dum vi estas sinkopa, mi konstruas, dank'al mia magia bastoneto, estulon identa al vi ; ankaŭ li estas sinkopa, ĉar li identas al vi. Mi apudmetas lin al vi kaj mi atendas, ke ĉesu la sinkopo ; ĝi ĉesos samtempe por la du Jozon, kaj tiam mi vidos du identajn virojn, kiuj probable diros al mi, naskiĝante, la samajn vortojn. Jen ni estas en la sama kazo, kiel antaŭ momento : kiu el ambaŭ estos vi ?

- Mi estos mi, sen ia dubo, respondis la abato, kaj tio, kion vi nomas mia Similulo, estos nur malŝatinda aparato senanima kaj senpenso.

- Vi forgesas pri nia interkonsento, mia kara amiko, diris s-ro Tako ; ĝi estas vi mem, kiu, antaŭ momento, por pruvi al mi kiel absurda estas la ideo pri **mio** nur materia, bonvolis akcepti mian hipotezon kaj dum momento konsenti, ke la homo estas nur aglomeriginta polvo ; por ke mi povu defendi mian sistemon, necesas, ke vi daŭrigu momente ĝin akcepti ; eble vi montros al mi ties neverŝajnecon.

- Konsentite, diris la pastro.

- Mi do supozu, ree parolis s-ro Tako, ke mi konstruis vian Similulon dum via sinkopo, kaj post tio mi igas definitiva vian morton, tranĉante al vi la kolon, ekzemple ; poste mi metos vian Similulon en la lokon, kiun vi okupis kaj mi atendos, ke lia sinkopo finiĝis. La vera abato Ĵozon ne plu ekzistos, ĉar al li mi estos tranĉinta la kolon, sed antaŭ mi naskiĝos nova individuo identa al vi ; tiu individuo kredos esti abato Ĵozon kaj eĉ daŭrigos kun mi la konversacion, komencita antaŭ la sinkopo. Ĉiu alia persono, kiu forestus dum mi mortigus vin, rilatos al tiu falsa Ĵozon, kiel al vi mem. Cetere la falsa Ĵozon kredos tute sincere, ke li estas vi. Ĉu li estas vi ? Ĉu **vi sentos esti vi** en tiu nova korpo ?

- Ne nur vi frenezigiĝos, se vi daŭrigos, diris la abato, sed mi kredas, ke ankaŭ min vi frenezigos per viaj strangaj hipotezoj kaj viaj eksterordinaraj demandoj. Kiel mi povus senti mian miecon en tiu nova korpo ? Tre bone mi scias, ke mi ne povas senti min ekster mi, kaj vi mem scias, ke se vi ne estus mortiginta min, mi sentus min en mia vera korpo ; estas neeble, ke mi sentu mian miecon en mia Similulo.

- Kaj tamen tiu Similulo, diris Fabricio, havos iun mion identa al la via kaj kredos esti vi ; li ne scios pri via morto, kiu estos konata nur de mi, kaj abato Ĵozon plu vivos en la mondo, ne konjektante, ke mi mortigis lin kaj ŝanĝis lian korpon.

- Se vi volis prui mem al mi la absurdon de via materialista sistemo, ree parolis la abato, vi trafe kaj sukcese elektis ekzemplon ; mi konfesas, ke mi mem ne pli bone sukcesus ; mi ekkredas, ke vi mokas kaj mistifikas min kaj ke vi mem estas kiel mi same konvinkita pri la ekzisto de via senmorta animo.

- Tute male, respondis s-ro Tako, mi volas montri al vi, ke via animista teorio estas nur la konsekvenco de mankohava lingvo. Estas al vi same neeble imagi ĉeson en la ekzisto de via **mio**, kiel estas al vi neeble imagi ties definitivan neniigon pro morto. Diri "dum mi estis sinkopa" estas same granda absurdo, kiel la "mi estas morta" de Edgar Poe. **Mi** tute ne povas esti sinkopa, ĉar, dum la sinkopo, ne ekzistas iu **Mi** ; uzante la vorton **Mi**, al kiu vi atribuas senvole senĉesan kaj definitivan

ekziston, vi ne povas rakonti, sekve nek imagi, fenomenon, en kiu via **Mi** ĝuste estus ĉesigita. Estas neeble, kiam oni parolas en la unua persono, ne kredi je la senmorteco kaj je la senĉeseco de l' mio.

- Sed fine, malpacientiĝinte diris la abato, kiam ĉesas mia sinkopo, mi bone sentas, ke mi estas mi ; pri tio ne indas diskutaĉi ; mi sentas mian miecon en mia efektiva korpo.

- Tamen, diris Fabricio ridante, se, dum via sinkopo, mi estus apudmetinta vian Similulon kaj se mi forirus, tiel ke neniu en la mondo scius, kiu estis la efektiva Ĵozon, identaj fenomenoj okazus en la du identaj korpoj kaj ambaŭ, naskiĝante, kredus esti la efektiva Ĵozon ; ĉu vi vidas kialon, por ke vi sentu vin prefere en unu ol en la alia ?

- Evidente, diris la abato ; mi sentus min en mia propra mio, kaj mi rigardus la alian kiel fremdan.

- Sed ankaŭ la alia sentus, ke li estas abato Ĵozon kaj rigardus vin kiel fremdan, diris s-ro Tako.

- Jes, sed li ne estus **mi**, ree parolis la pastro.

- Vane vi parolas, reis Fabricio, ĉiam ridante ; vi obstine penadas por kredi, ke via **mio** daŭre ekzistis dum via sinkopo, kvankam estas evidente, ke ĝi ne plu ekzistis. La mio estas la rezulto de l' vivo de korpo ; ĝi malaperas, kiam tiu korpo ne plu vivas ; ĝi reaperas, se la korpo ree vivas, kaj estas pro tio, ke oni devas diri "naskiĝi" aŭ almenaŭ "renaskiĝi" post sinkopo kaj ne "vekiĝi", kiel malprave oni diras plej ofte, ĉar la personeco estas modifita, sed ne neniiginta dum la dormo ; estas grandaj aliigoj en la interaj pozicioj de la cerbaj elementoj, sed la vivo daŭras dum oni dormas ; ne ekzistas ĉeso.

- Ĉu vi iam havis sinkopon ? abrupte demandis la abato.

- Neniam, respondis s-ro Tako.

- Nu, mi havis da ili, vive diris la abato, mi asertas al vi, ke kiam mi renaskiĝis, mi bone sentis min mem ; mi retrovis miajn memorojn kaj pensojn, mian tutan spiritostaton ; tion vi ne povas imagi, ĉar neniam vi estis sinkopa.

- Tion tre facile mi imagas, reis trankvile Fabricio, ĉar mi pensas, ke viaj memoroj, viaj pensoj, via spiritostato, estas la rezulto de via korpa stato ; do, se la

sinkopo ne daŭris sufiĉe longe, por ke gravaj perturboj okazu en via cerbo, ĉiuj tiuj apartaĵoj de via mio devas reproduktiĝi, identaj al vi mem, tuj kiam la sango rekomencas cirkuli kaj alporti la bonfarajn substancojn, kiujn ĝi ricevas per la nutrado kaj la spirado. Ĝuste por komprenigi al vi ekzakte kion mi volis diri, parolante pri la materia naturo de l' mio, mi akceptis volonte la hipotezon pri la Similulo, kiun vi sugestis. De nun mi ne plu okupiĝos pri tiu teoria, malagraba kaj ĝena individuo.

- Mi konfesas, ke li menciinde komencis inciti min, diris la abato.

- Li do reiru tien, kie li estis, diris s-ro Tako, sed ne kredu, ke pro tio vi evitos mian demonstradon. Ĉar vi havis sinkopojn, vi do scias nun, ke via personeco estas malkontinua, kvankam vi ne povas tion imagi, same kiel vi ne povas imagi esti morta, ne plu esti. Mi eĉ pretendas, ke via personeco estas nuna kaj ĵusa ; kion vi nomas via vivo, tio estas serio da momentaj kaj sinsekvaj vivoj, analogaj al bildoj de kinematografo ; kompreneble mi parolas pri via subjektiva vivo, pri tiu, kiun vi sentas, kiun vi travivas mem. Kiam oni funkciigas kinematografon, se la bildoj sin sekvas sufiĉe rapide, oni havas la iluzion de kontinuo, kaj, tamen, inter du najbaraj bildoj estas iu periodo de vakuo, ia sinkopo. Ĉe ni same ; ni estas iu serio de momentaj vivoj sinsekvaj, apartigitaj per sinkopoj similaj al tiuj de l' kinematografo, sed multe pli mallongaj. Nia mio varias senĉese, tion vi mem rimarkigis al mi : ni estas en ĉiu momento, sed dum la posta momento ni estas iu alia ; estas kvazaŭ el ĉiu sinkopo ni renaskiĝas en iu Similulo iomete malsimila. La serio da Similuloj ŝajnas kontinua, sed ĉiam nur unu vivas, la nuna : ĉiuj aliaj mortis ; ni pasigas la vivon mortante.

- Jen, denove vi freneziga, diris la abato.

- Neniam mi estis pli saĝa ol nun, reis Fabricio. Mi memoras pri iu abato Ĵozon kaj pri iu Fabricio Tako junaj kaj viglaj ; kie ili estas tiuj, kiuj antaŭnelonge promenis en la florornamitaj kamparoj de l' Marno ? Ili mortis ; ili ne estas plu ; kaj kiam ili ĉesis ekzisti ? Dum ĉiu momento, aliĝante en iun alian Ĵozon kaj en iun alian Tako, ktp., ĝis nun, kiam ni retrovas ilin maljuniĝintaj kaj filozofantaj fronte al la bretona maro, kaj ili daŭre mortos kaj reviviĝos ĝis la definitiva sinkopo, kiu ne estas, subjektive, pli grava ol la aliaj.

- Vi timigas min, amiko mia, diris la pastro. Sed kiel povas okazi, ke pri tiu tuta pasintaĵo morta mi memoras, mi Ĵozon, en ĉiu momento de mia efemera ekzisto ?

- Tial ke, ĝuste, ĉiu aliĝo, kiun ni spertas, notiĝas en nia organismo per eta modifiĝo, kiu reprezentas tiun aliĝon, kaj ĝi efikas, tiom longe, kiom ĝi ekzistas, per la aliĝo mem, kiu ĝin produktis ; sed tiuj etaj modifiĝoj povas malaperi dum niaj postaj varioj, kaj estas pro tio, ke ni forgesas. Ni supozu, ke tiel ne okazas, la memoro ne ekzistus, t.e. ke mankus iu ligilo por unuigi niajn sinsekvajn personecojn ; ni estus ekster la tempo, aŭ pli ĝuste, tempo ne plu ekzistus, ĉar estas ni, kiuj kreas ĝin per nia memoro. Nia subjektivo prezentas al ni ĉiumomente unikan kaj senmovan scenon de kinematografo, sed la kinematografo ne plu ekzistus, ne plu farus sintezon.

- Ĉio tio estas treege malfacile komprenebla, kompatinda amiko, rediris abato Ĵozon, sed ĝi estas tiel komplika, ke mi estas sentima : via materialismo neniam ruinigos la dogmon, kiun instruas la Eklezio ; neniu komprenos vin.

- Ankaŭ vin neniu komprenas, vive reis s-ro Tako, ĉar, ĉe ĉiuj demandoj, vi respondas : "mistero!". Mi estas tre scivola pri la dogma teorio koncerne la sinkopon. Cetere, kiuj akceptas vian dogmon, tiuj ne deziras kompreni, **ili kredas**, kaj tio sufiĉas al ili, ĉar ili ne scias kaj ne demandas kion tio signifas ; ĝi estas vorto, kiu kontentigas ilin. Mi estas konvinkita, ke la amaso longe kontentiĝos per vortoj malplenaj je senco, sed la pensuloj malkonsentos ; ili jam malkonsentas.

- Kiom do da eminentaj pensuloj akceptas vian sistemon ? demandis la abato.

- Estiĝos da ili ; paciencon ! respondis Fabricio ; ne per vorta nutrado al la infanoj oni povas formi cerbojn, kapablaj libere alfronti la grandajn problemojn pri la naturo ; tiom longe, kiom vi havos la rajton sisteme misformi la menson de l' junaj generacioj, nur malmulte da junuloj evitos vian stampon ; vi servutigas la mondon per via katekismo ; vi kondamnas la infanojn je vivdaŭra mallumo.

- Ni malfermas al ili senlimajn horizontojn, rebatis la abato, kaj ni preparas ilin por gustumi la ĝojojn de la eterna vivo.

- Fakte tio ne estas tre grava, diris s-ro Tako ; ŝajnas al mi tamen, ke ne estas malagrade vidi klare dum sia vivo ; sed eble estas ankaŭ agrable kompreni nenion kaj nenium demandon starigi al si : **Beati qui non viderunt et firmiter crediderunt** ! Jen estas la limvorto pri feliĉo : havi racion kaj ĝin ne uzi ! Kaj tamen la kompatinda maljuna Iva timos sian mortintan filon, tial ke pastro ne donis al li sanktan ŝmiron. Povas esti malutile kredi stultaĵojn !

La abato malŝate levetis la ŝultrojn, kaj ili silente daŭrigis sian promenadon.

MATERIO KAJ PENSO

- Via Similulo hieraŭa kaŭzis al mi premsongon, diris abato Ĵozon al sia amiko, kiam ili interrenkontiĝis la postan tagon ; mi vidis vin samtempe morta kaj viva, kiel la Johano el la **Vojaĝo kien al vi plaĉos** ; vi diris al mi, ke vi estis morta, sed ke vi tute intence renaskiĝis por sciigi al mi, ke tre certe ni ne havas animon ; via kadavro, sternaĝanta apud vi, faris videblajn provojn por paroli, kaj vi asertis, ke ĝi nur volis konfirmi vian diron per sia aŭtoritato de mortinto. Ĝi estis tiel timiga, ke mi vekigis kovrite de frosta ŝvito kaj ne povis ree dormi.

- Mi tre bedaŭras, respondis s-ro Tako, ke mi havigis al vi tiel malagrablan momenton ; tamen mi diris al vi hieraŭ nur tre saĝajn aferojn ; eble vi estis impresata kaj maltrankviligata per la logiko de mia rezonado tiel kontraŭa al via kredo ?

- **Impavidum ferient ruinae!*** diris la abato, frapante al si la bruston. Pro via malhumilo, vi imagas, ke viaj sofismoj povas atingi la kredon de vera kredulo tra la triobla ŝirmilo el bronzo, kiun donas al li la dia Graco. Male, mi ekvidis, dum mia sendormo pensante pri bedaŭrinda sensaĝiĝo, ke estas punkto, pri kiu vi ne donis klarigojn kaj kiu ruinigos vian tutan sistemon. Kiel individuo konsistanta el materio akiras subjektivon ? Ĝia cerbo, vi diros, sekrecias penson, kiel la hepato galon ; sed mi tuj kontraŭdiros, rimarkigante, ke la penso ĝuste tiel mal-similas la galon, kiel la animo la korpon ; la penso estas nemateria, kaj la fenomenoj de sekrecio estas krudaj fenomenoj, kiel ĉiuj per kiuj vi provas klarigi la esencon mem de l' Vivo.

- Vi vere estas tre grandanima, gaje respondis s-ro Tako, atribuante al mi tiun malnovan absurdon pri la penso sekreciata de la cerbo ; sendube vi kredas, ke la logiko kaj la studado ne povas konsistigi sufiĉe fortikan kirason, ĉar vi pretendas eltrovi, dum kelkaj minutoj, en mia scienca opinio, sensencaĝon, kiun mi ne vidis jam de

* *Senemocie li vidus la mondon ruiniĝi. Trad.*

dudek jaroj. Sed, kiam vi asertas, ke la penso estas nemateria, ĉu vi estas tute certa pri tio, kion vi diras ? aŭ prefere, ĉu vi komprenas la signifon de via diro ? Estas logaj vortoj, pri kiuj estas saĝe iomete malfidi. Ĉu vi iam vidis animon agi, ne estante asociita kun korpo ?

- Mi ne vidis tion, kio estas nevidebla, respondis la abato ; sed mi vidis la homon kaj ĝian kadavron, kaj mi komprenis, ke la animo vivigis la unuan kaj mankis en la dua. Ĉu kadavro estas malpli peza ol homo ? Ne, ĉu ne vere ? Tio pravas, ke la vivdona animo estas nemateria. La plej simpla saĝo tion pravas.

- Ĉu lokomotivo, kies cilindroj estas ŝiritaj, estas malpli peza ol normala lokomotivo ? diris Fabricio. Ne, ĉu ne vere ? Kaj tamen la unua estas inerta, la dua havas grandegan potencon. Ĉu vi diros, ke lokomotivo havas senmortan animon ? Nevole vi faris malĝustan rezonon, ĉar vi bone scias, ke la morto ĉiam rezultas de materia difekto en la homa organismo ; kaj kiam oni sciigas al vi, ke iu el viaj amikoj mortis, vi tiam demandas : "Pro kio li mortis?" t.e. kiu estas la difekto, per kiu lia morta korpo diferencas de tio, kio ĝi estis, kiam ĝi vivis ? Vi do tre bone scias, ke kadavro ĉiam malsimilas vivan korpon laŭ ĝia materia konsisto. Ho! se oni mortus sen ia difekto, tiam estus tute alia afero ! Sed, kion oni devas pensi pri nemateria principo, kiun forkurigas spadobato ?

- Jam mi diris al vi, reis la abato, ke animo povas vivigi nur sanan korpon, same kiel maŝinisto ne povas funkciigi frakasitan lokomotivon ; spadobato fluigas el la korpo sangon necesan por ties bona funkciado, same kiel, krevigante la kaldronon de lokomotivo oni senigas ĝin je la akvo, kies vaporo estas utiligata de l' maŝinisto.

- Sed, diris s-ro Tako, maŝinisto aperas al ni ekster sia agado ĉe lokomotivo, sendepende de lokomotivo ; tial mi kredas je la ekzisto de maŝinisto. Se maŝino estas difektita, maŝinisto povas direkti alian ; male, kiam homo estas morta, ĝia animo tute ne aperas antaŭ mi kaj neniam vivigas alian korpon. Se mi vidus lokomotivon funkcii sen maŝinisto, mi kredus, ke ĝi funkcias senhelpe ; same, mi vidas vian korpon vivi sen la helpo de maŝinisto kaj pro tio mi kredas, ke ĝi funkcias per si mem.

- Kaj kiu faris la lokomotivon, kiu faris la korpon ? diris la abato.

- Tio ne rilatas al la demando, reis Fabricio ; ni ne povas pridiskuti ĉion samtempe ; poste ni priparolos la originon de l' vivo. Mi do diris al vi, ke via kredo je animo, pravigita per la ŝajna idento de kadavro kun vivanta korpo estas nepre erara, ĉar vi bone scias, ke tiu idento estas nur ŝajna. Cetere, estas verŝajne, ke ĝi estas tiu sama kredo je la materia idento de mortinto kaj vivanto, kiu naskis la animistan teorion ĉe niaj malkleraj prauloj. Ĉar mi, kiu neniam vidis animon agi sen korpo, mi, kiu neniam vidis korpon morti sen iu pli malpli grava modifiĝo, sen iu detruo de mekanismo, mi kredas, ke la vivo rezultas de la materia strukturo de l' korpo kaj, same kiel la penso estas esence propra al la vivo, mi konkludas, ke la penso rezultas de l' funkciado de vivanta korpo. Materia difekto ĉesigas la penson, do la penso ne povas havi esencon malsama je la materio. Pli trafe, ekzistas venenoj por la penso : alkoholo efikas sur nian subjektivon kaj tute modifas ĝin ; mi ne povas kompreni, kiel nemateria principo povus esti modifata per kemia substanco ; fenomeno, kiu modifas kemian forton, estas mem kemia.

- Animo estas la substanca formo de korpo, diris la abato ; kio modifas korpon, tio nepre reefikas sur ĝian animon.

- Vi do estas pelita en senelirejon, vive ekkriis s-ro Tako, tiel ke vi estas devigata argumenti per tiaj mirigaj difinoj ; mi kredis, ke vi rezervastiuajn vortojn por viaj konversacioj inter aŭguristoj kaj por viaj skolastikaj turniroj. Supozeble vi ne pensis dum momento impresi min per via **substanca formo** ! La animo, je kiu vi kredas, ne havas formon kaj ne konsistas el substanco, tamen vi rapidas nomi ĝin "substanca formo". Poste, nur vere tre subtilaj argumentemuloj kuraĝos diskuti kun vi.

- Substanco ne estas materio, malestime diris la abato. Dio estas la substanco en la plej perfekta stato kaj li ne estas materio ; sed la substanco regas kaj mastrumas la materion.

- Kaj kiel formo povas esti substanca ? interdiris s-ro Tako. Formo estas vorto, kiu havas sencon, almenaŭ kiu iam havis tian.

- Vi ŝajnigas esti pli malklera ol vi estis, ree diris la abato. Legu libron pri teologio kaj tie vi trovos mir-

inde klarajn difinojn ; vi mokas min denove, ŝajngante ne kompreni.

- Mi certigas vin, mia kara amiko, diris Fabricio, ke mi ne mokas vin kaj ke, tute sincere, la vortoj, kiujn vi uzas, ŝajnas al mi tute sensencaj. Verŝajne tio rezultas de tio, ke mi lernis ilin, kiam mi ne plu estis sufiĉe juna por kontentiĝi per vantaj paroloj ; sed mi admiras la disciplinon el la seminarioj, en kiuj, kia ajn cetere estas la komenca inteligento de la studentoj, oni sukcesas atingi, ke mense ili ĉiuj estu same modlitaj kaj havu la kranion ŝtopita per esprimoj, al kiuj pli poste ili sukcesos trovi sencon per turmenta cerbumado. Mi ne dubas, ke vi malestime rigardas al tiuj, kiuj sentas malesperon penadante por kompreni viajn subtilegaĵojn.

- Neniun oni devas malestimigi, predikeme diris la abato ; se ni posedas lumon per dia graco, tiam ni devas provi vidigi ĝin al la okuloj de tiuj, kiuj estas en mallumo.

- Tro maljuna mi estas ! respondis s-ro Tako, levante malespere la manojn. Mi ne plu estas sufiĉe fleksebla por ekvidi tian lumon ! Mi mortos en definitiva mallumo ! Iam mi time kredis, ke mi freneziga, legante, en teologia libro, la historion pri la **reala ĉeesto**. La hostio konsekrita de pastro ne plu estas nefermentita pano, sed la korpo de Jesuo-Kristo ; kaj tamen, se kemiisto analizus tiun hostion, li en ĝi trovus amelon kiel antaŭ la konsekro. Nur ŝajno ! La hostio ŝajnas esti nefermentita pano, sed ĝia substanco estas la korpo de Jesuo-Kristo ; kaj kiam la ŝajnaĵo estas digestita de la englutinto, tiam liberiĝis la korpo de Jesuo-Kristo ; ĝis tiam li loĝas en la intesto de la kompatinda pekulo ! La konsekrita vino havas nur ŝajnon de vino, sed ĝi estas la sango de Jesuo-Kristo ; pastro, kiu trinkus vinon nur kiam li faras meson, povus aserti, ke neniam li trinkis vinon ; ĉu tiel ?

- Efektive tiel estas, diris la abato, sed la pastro trinkas ankaŭ la likvaĵon de sia sinlavo, kiu enhavas vinon.

- Doloras mia kapo, doloregas ! ekkriis s-ro Tako. Kiu elpensis ĉi ĉion, tiu estis tamen tre lerta, li aldonis ; la dogmo de la Eŭkaristio estas ŝirmita kontraŭ la esploroj de scienculoj ; kemiistoj povas vidi nur la ŝajnaĵon, kaj neniam ili sukcesos pruvi, ke la substanco de la hostio ne estas la korpo de Jesuo-Kristo.

- Ekzistas abismo inter la scienco kaj la kredo, simple diris la abato, sed malgraŭ tio mi estas scivola pri viaj

klarigoj, rilate al la penso, kiu originas en la materio ; ni flankeniris de nia komenca interparolo.

- Malfacile mi revenos al ĝi, ĝemete diris Fabricio. Ĉiufoje, kiam mi riskas kontakti kun la skolastika implikaĵo, mi havas la impreson, ke mia kapo disrompiĝas, precipe ĉe la penso, ke sufiĉas esti sidinta, dum sufiĉe juna aĝo, en seminario kvin jarojn, por kredi, ke ĉio tio estas tute klara. Kompatinda cerbo homa tiel fiera pri sia racio ! kiom facile oni povas ĉin deviigi por ĉiam !

"Mi do diris al vi, li daŭrigis laŭ malpli patosa tono, ke ĉiuj fenomenoj de l' vivo ŝajnas al mi klarigeblaj per la fiziko kaj la scienco. Ho ! la klarigo ne estas komprenebla de kiu ajn malklerulo ; tio estas evidenta. La biologio estas la plej malfacila el ĉiuj sciencoj ; ĝi bezonas la helpon de ĉiuj aliaj sciencoj ; tamen ĉiu kredas havi la rajton eldiri sian opinion pri la vivo. Vi ne konsentas, ke oni estu indiferenta rilate al la religio ; estas ja vere, ke vi ne postulas, ke ĉiu havu propran opinion, sed nur ke oni akceptu la vian, eĉ se ĝi ofendas la racion ; kaj rilate al la kompatinduloj, kiuj, per longa pripensado, provas kompreni per si mem, ili estu anatem- itaj pro sia malhumilo, kiu fermas ilin en mallumon !

"Mi kredas, ke vi konsistas nur el materio, amiko mia ; mi kredas, ke mi estas samkonsista kiel vi, kaj ke, konsekvence, mia konsistiĝo estas materia ; nu, mi pensas kaj sentas !

- Ni frontas al la demando, triumfe diris la abato. Kaj kiel do povas okazi, ke estulo, konsistanta nur el materio, povas pensi kaj senti ?

- Mi estas homo, daŭrigis s-ro Tako ; mi konsistas el pluraj bilionoj da ĉeloj, el kiuj ĉiu konsistas el sama nombro de molekuloj el karbono, el azoto, el hidrogeno, ktp. Kia ajn estu mia komplikiĝo, rilate al unu atomo, mi do scias, ke en la atomoj de kelka nombro de korpoj simplaj, ĉiuj elementoj de mia strukturo enestas ; tiel estas laŭ objektiva vidpunkto ; se kemie vi esploras min, vi trovos en mi nur atomojn ; mi do povas prave diri, ke ĉio, kio okazas en mi, tio rezultas nur de la atoma aktiveco ; nu, tamen mi pensas kaj sentas, do logike mi devas konsenti, ke en la atomoj ekzistas la elementoj de mia penso kaj sento.

- Kaj al tia absurdo vi devas finveni, kompateme diris la abato ; kaj ĉio rezultas de tio, ke, malgraŭ la evidento,

vi neas la ekziston de via senmorta animo : la atomoj pensas ! la karbono havas genion !

- Mi rimarkigos al vi, trankvile reis Fabricio, ke senmotive vi provizas min je tiu absurdo, per kiu vi tiras venkon. Mi ne diris al vi, ke la atomoj pensas ; male, mi estas konvinkita, ke ili ne pensas. Mi diris al vi, ke devas ekzisti en la atomoj la **elementoj** de mia penso, kio estas tute malsama afero.

- Mi ne vidas la diferencon, diris la abato.

- Mi do provos montri ĝin al vi. Mi komencis, intence, per memorigo al vi, ke, laŭ objektiva vidpunkto, - la sola laŭ kiu oni povas explore observi alian individuon ol sin mem - mi konsistas el karbono, el oksigeno, ktp. Tion vi ne povas nei ; eble antaŭ la laboroj de Lavuazje* vi eble neus ; hodiaŭ ne eblas. Nu, ĉiam starante ĉe objektiva vidpunkto, mi kondukas kiel homo, t.e. ke mi marŝas, manĝas, parolas, spiras, dum la atomoj, el kiuj mi konsistas, faras absolute nenion tian. Mi estas la sintezo de pluraj bilionoj da bilionoj da atomoj, kaj mi tre bone scias, ke neniu el tiuj atomoj estas homo. Miaj plej simplaj movoj rezultas de la aktiveco de pluraj miliardoj da atomoj, kaj tion vi konstatas, ne pensante tamen diri al mi, ke, por ke estu tiel, necesas, ke la atomoj marŝu, manĝu, parolu, same kiel mi mem marŝas, manĝas, parolas. Lokomotivo konsistas el ŝtalo, akvo kaj karbo, kaj vi tre bone scias, ke oni ne devas imagi lokomotivon en ĉiu molekulo el ŝtalo, el akvo kaj el karbo ; lokomotivo estas ia sintezo, kiel mi mem. La objektiva aktiveco de la atomoj estas treege pli simpla, rilate al tiu de homo, kiu konsistas el pluraj bilionoj da atomoj ; same necesas pensi, ke la subjektiva aktiveco de l' karbono estas treege pli simpla, rilate al tiu de homo, unuvorte al la penso ; kaj, same kiel vi ne dirus al mi, ke atomo de karbono manĝas, marŝas kaj parolas, same vi ne devas diri, ke ĝi pensas, tial ke mi asertas, ke la **elementoj** de mia penso devas ekzisti en la atomoj, el kiuj mi konsistas. Mia penso estas sintezo, same kiel mia korpa aktiveco estas tiel komplika, rilate al siaj elementoj, kiel estas mia korpo, rilate al la atomoj. Kaj ĉar mi neniam konstatis ion en mi, kio estus ekster la leĝoj de l' fiziko kaj de l' kemio, la simpla saĝo, kiun vi ofte mencias,

* Lavoisier : fama kemiisto franca, gilotinita 1794.

devigas min konsenti, ke en la atomoj troviĝas la elementoj de mia subjektivo, alivorte, devigas min pensi, ke nenial ekzistas **esenca** diferenco inter la atomoj kaj mi, sintezo el atomoj.

- Tre bone mi sekvas vian rezonadon, diris la abato, kaj mi konstatas, ke vi ja estas tute logika kun vi mem, kredante je la ekzisto, en la kruda materio, de la elementoj de via penso, ĉar via opinio vi konsistas nur el kruda materio ; sed mi humile rimarkigos al vi, ke agente tiel, vi riskas meriti la riproĉon, kiun vi ĵus faris al mi : vi rifuĝas en iun eburan turon, same neenireblan, kiel la superaj veroj de l' Dogmo. Kiu povos iam penetri en la atoman subjektivon kaj ĝin kontroli ?

- Efektive temas pri hipotezo, kies **senpera** kontrolo ne eblas, respondis s-ro Tako, sed miavice mi rimarkigos al vi, ke mi utiligas tiun hipotezon, **nur** por pravigi la ekziston de mia subjektivo. Mi ne bezonas ties helpon por doni klarigon pri ĉiuj objektivaj fenomenoj de l' vivo, kaj tiurilate la eksperimentado kaj observado ebligas al mi defendi mian sistemon kontraŭ la via. Ĉar vi pensas, vi, ke via nemateria animo vivigas kaj gvidas vian korpon ; asertas mi, male, ke mia korpo pasive obeas al ĉiuj necesoj de l' fiziko kaj de l' kemio, ke ĉiuj atomoj, kiuj konsistigas min, rigore obeas al la samaj leĝoj kiel la similaj atomoj, kiuj, nunmomente, ne partoprenas en la konsistigo de viva korpo. Kaj ĉi tio povas esti konstatata per eksperimento kaj observado.

- Unuvorte, diris la abato, vi opinias, ke la atomoj havas subjektivon, sed ke ĝi neniel utilas al ili, dum mia subjektivo utilas al mi.

- Ne tute precize tion mi opinias, respondis Fabricio. Mi ne asertas, ke mia subjektivo estas al mi senutila, ĉar ĝi spertigas al mi ĝojojn kaj dolorojn, sed mi asertas ke mia subjektivo utilas nur al mi, kaj la samon mi diras pri tiu de la atomoj. Alivorte, mia subjektivo estas la interna rebrilo de mia objektivo kaj neniel influas la manieron, laŭ kiu mia korpo kondutas en la tempo kaj en la spaco ; eĉ se mi ne havas subjektivon, tamen mi aspektus identa al la Tako, kiun vi konas. La atomoj havas objektivajn proprajn ecojn, kiujn ni povas pristudi : ili estas fizikaj kaj kemiaj ecoj ; ni scias, ke tiuj ecoj estas konstantaj, rilate al iu difinita speco atoma ; sed neniel ni prave povas nei, ke ili havas ankaŭ aliajn

ecojn subjektivajn, kies karaktero precize estus ne montrigi ekstere, ne influu la movojn kaj la aliigojn de iliaj posedantoj. Maŭdslej* kaj Heŭksli** poste, nomis **epifeno-
menoj** tiujn internajn rebrilojn, nekapablaj modifi la fenomenojn, kiujn ili ĉiam akompanas.

- Tiel do, diris la abato, mi estas ia konscia aŭtomato, sed nur aŭtomato ; mi ne estas libera fari kion mi volas, kiam tio al mi plaĉas !

- La atomoj, trankvile reis s-ro Tako, obeas al precizaj kaj neŝanĝeblaj leĝoj, kiujn la kemiistoj kaj fizikistoj eltrovis kaj senĉese studas ; de kiam tiuj leĝoj estas de ni konataj, ni scias, ke nenio okazas hazarde en la kruda naturo ; ni povas rigore antaŭscii ĉiujn fenomenojn de la senviva naturo, kiam ni konas ekzakte ĉiujn kondiĉojn ekzistantaj en iu difinita momento kaj en iu difinita loko. Estas tio, kion ni resumas per unu vorto, kiam ni diras, ke ili estas **determinitaj**. Mi, kiu havas la certon esti nur materia aglomerigo, estus nelogika, kredante, ke ĉio, kio okazas al mi, ne estas **determinita**.

- Do, vi ne estas libera ! intermetis la pastro. Efektive tio estas iu konsekvenco de via elprovita materialismo. Kaj tio ĝuste konfuzos vin kaj pruvos, ke vi havas animon! Mi ja sentas en mi mian liberon ; mi scias, ke mi povas fari kion mi deziras kaj kiam tio plaĉas al mi.

- Vi sentas en vi vian liberon tute same kiel vi sentas vian senmortecon, kaj pro la sama kaŭzo, nome la kaŭzo, ke vi parolas pri vi mem en la unua persono, kaj ke estulo, kiu parolas unuapersono, estas libera.

- Vi parolas enigme ; mi ne komprenas kion vi celas, sed mi havas malprecizan timon, ke vi denove vokos vian Similulon ; mi petas, se tiel estas, ni parolu pri aliaj aferoj.

- Mi ne aludos al Similulo, diris ridante s-ro Tako ; estu do trankvila. Mi nur montros al vi, ke vi ne povas pravigi la ekziston de l' homa libero, kaj mi klarigos, kial vi havas la iluzion esti libera.

- Mi ne havas iluzion, diris la pastro ; mi sentas, ke mi estas libera, kaj nenio povas igi min rezigni je mia libero.

- Unue, kion vi nomas libero ? Ĉu ĝi ne estas tiu eblo, laŭ kiu vi ĉiumomente povas agi pro motivoj, kiuj estas

* *Maudsley* : angla psikiatro, 1835-1918.

** *Huxley* : angla naturalisto, 1825-1895.

en vi, kaj laŭ kiu vi povas elekti el tiuj motivoj eĉ tiun, kiu ŝajnas al vi la plej malbona, se tio plaĉas al vi ?

- Konsentite, diris la abato.

- Mi pretendas havi tute la saman eblon, kaj tamen mi ne estas libera, reis s-ro Tako. Unue, **tiuj motivoj, kiuj estas en vi** ĉe difinita momento, ĝuste estas la rebrilo de l' materia stato de via cerbo en tiu donita momento. Nur malklera deterministo povus ne konsenti pri tio, ke la stato de via korpo en la momento, kiam vi agas, influas sur la manieron, laŭ kiu vi agas ; ĝi male estas la plej grava faktoro de via agado, pri kies decido tamen influas la ĉirkaŭaj cirkonstancoj ; kvankam oni povus ne menciigi ĉi tiujn lastajn, ĉar ili influas vian agadon nur per la modifoj, kiujn ili faras al via organismo. Vi do agas, en iu donita momento, pro motivoj, kiuj estas en vi. Tiujn motivojn vi mem konas kaj ne mi ; mi ja ne povas penetri en vian subjektivon kaj sekve antaŭvidi kion vi faros, kaj antaŭ mi vi ŝajnas libera, tial ke mi ne konas la staton de via cerbo. Jen estas jam iu unua konstato, kiu pruvas al vi, ke via ŝajna libero ne malakordiĝas kun la plej senescepta determinismo.

"Necesus eĉ, ke mi pli akcentu mian diron, ĉar en **la motivoj, kiuj estas en vi**, mi povas konsideri, ke ĉion mi sinteze traktis, same la motivojn mem, kiel la elekton, kiun vi faras inter tiuj motivoj. Ĉio tio estas nur la materia rebrilo de via cerbo en la momento, kiam vi agas.

- Kaj tamen, diris la abato ridetante, mi bone sentas, kiam mi decidas ion fari, ke mi povus fari alion. Jen **estas eriko ; mi deŝiras ĝin kaj donas al vi ; mi povus same tion ne fari.**

- Provu do, mia kara amiko, gaje respondis Fabricio. Mi vin defias : vi ne povis fari aliel ol deŝiri tiun floron.

- Kompreneble, diris la abato, nun mi ne povas ne esti ĝin deŝirinta, sed mi povus esti ne farinta tion.

- Ĉiuj tiuj kondicionalaj modoj estas tre perfidaj, rimarkigis s-ro Tako. Per tiaj pasintaj kondicionaloj oni sukcesus pendigi la plej honestajn homojn ; mi malfidas je tiuj komplikaĵoj de l' parola lingvo.

- Jen, daŭrigis la abato, jen alia eriko ; mi povus derompi ĝin kaj tion mi ne faras ; sed vi tre bone scias, ke mi estus povinta ĝin derompi antaŭmomente.

- Mi timas nenian rebaton al mia aserto, ke vi ne povas ne esti ĝin ĵus derompinta, diris Fabricio ridetante.

Vi do ne vidas, ke mi mokas vin, kompatinda amiko mia, kaj ke mi celas atingi, ke vi mem konfesu, ke la evoluo de l' homo havas determinitan sinsekvon, ke ĉiu momento prezentiĝas nur unu fojon kaj ke faritaĵo ne povas ne esti farita. Kaj pro tio vi neniam povos pruvi al mi, ke vi estas libera : kiam vi faris ion, tiam vi ne povas ne esti ĝin farinta ; tio estas tute evidenta.

- Sed mi sentas en mi, ke mi povus ĝin ne esti farinta, asertis la abato.

- Timu vian Similulon ! minacis Fabricio, ridante ; nur li povas kuraci vin je via manio uzi pasintajn kondicionalojn. La nuna abato Ĵozon ne plu estas la ĵusa abato Ĵozon ; li aliĝis ; sed li plu diris **Mi**, parolante pri si, kaj, tial ke li daŭre sin nomis **Mi**, li kredas esti la sama ! **Mi** faris tion en tiuj kondiĉoj ; **Mi** faris alion en aliaj kondiĉoj, do **Mi** estas libera. Bedaŭrinde li ne plu estas la sama **Mi** ; sed mi ne povas diri **Mi**, se ni ne kredas, ke ni estas liberaj ; tio estas certa. Jen bastono, sur kiun mi apogas min kaj kiu subtenas min ; jen la sama bastono rompita ; ĝi ne plu subtenas min, do ĝi estis libera, ne plu subteni min. Sed ne plu estas la sama bastono !

Sendube, mi aliĝis, diris la abato, sed kian citindan diferencon vi vidas en mi, kiu estus komparebla al tiu, kiun vi kaŭzis, rompante vian bastonon ?

- Via korpo malmulte aliĝis ekstere, diris Tako, sed la stato de via cerbo tre variis, kvankam tion mi ne rimarkis ; nur vi konsciis pri ĝia variado, kiu rezultigis en vi ideasociojn ; nu, mi ne vidas vian cerbon kaj en ĝi mi ne scias legi. **Se ni havus la formon de niaj ideoj, neniu povus nin rekoni.** Ili tute aliĝas en unu dekono da sekundo.

- Mi sentas, ke mi estas libera, diris la pastro. Ĉiuj viaj argumentoj ne povas konvinki min pri la malo.

- Esti reale libera, reis Fabricio, tio estus, laŭ la admirinda difino de s-ro Renuvje*, kapabli je absolutaj komencoj ; tio signifus esti kapabla enkonduki unu novan elementon en la evoluo de la aĵoj ; tio signifus esti kapabla pruvi eraraj la leĝojn de l' fiziko kaj de l' kemio. Studo pri tiu libero estas do ebla per observado, kiu ebligas certigi, ke la materiaj leĝoj efikas ĉie kaj ĉiam ;

* *Renouvier* : franca filozofo, 1815-1903.

vi havas la iluzion posedi tiun senkondiĉan liberon, kiam vi rezonas, kiel vi ĵus faris per viaj pasintaj kondicionaloj. "Mi faris ĉi tion en tiu difinita momento, sed **mi povus** fari alion sammomente, se mi volus." Facila aserto, per kiu vi kontentiĝas, ĉar vi ne povas ne esti volinta, en tiu difinita momento, fari kion vi volis. Vi diris, ke vi sentis tiun eblon fari aŭ ne fari ; mi kredas vin, sed ni povas erare senti ; neniam vi povos eksperimente pruvi al vi, nek pruvi al iu ajn, kion vi asertis, ĉar via evoluo havas determinitan sinsekvon kaj ĉar la pasinta momento neniam denove estos. Ho ! se vi nur unu fojon farus tiun demonstron, la demando estus solvita ; en vi estus okazinta iu absoluta komenco, ĉar, en la objektiva stato de l' materio, el kiu konsistas via korpo en iu difinita momento, vi estus farinta **alian** operacion, ol tiun, kiu devis rezultu en tiu preciza momento de tiu stato de materio ; sed tian demonstron vi ne povos fari.

- Sed, se mi ne estas libera, kial do mi penas, por ne malbone agi ? Ĉio okazos ekster mia volo ; via determinismo kondukas rekte al la fatalismo.

- Certe, vi ne estas libera, mia kara amiko, reis s-ro Tako, sed vi estas inteligenta, kaj ĝuste tio montros, ke la fatalismo de la araboj estas ia malsano de l' prudento. Vi estas inteligenta, t.e. ke vi povas profiti el via eksperimento, alivorte, por ne uzi individualistan lingvon, kiu donas la iluzion de absoluta libero, vi estas mekanismo, ĉiumomente varianta pro la influo de materiaj kondiĉoj kaj senĉese perfektiganta pro tiu influo. Mi supozas, ke iun fojon vi spertis doloron ĉe mano, tuŝante folion de urtiko, vi ne povas ne esti spertinta tiun doloron, sed vi estas aliigita en alian abaton Ĵozon, kiu scias, ke la tuŝo de urtiko kaŭzas doloron ; tiu scio pri la ecoj de urtiko registriĝis en la mekanismo de via cerbo, kaj kiam pli poste, unu el la sinsekvaj abatoj Ĵozon, kiuj vi estas, renkontos urtikojn, la ekzisto de tiu mekanismo kaŭzos, ke li malsame agos antaŭ tiu dolor-dona planto : li ne tuŝos ĝin kaj ne dolorigos sin, kiel la unuan fojon, kaj tamen lia ago estos determinita de materiaj motivoj.

- Sed ĝuste, intermetis la abato, tiu estonta Ĵozon, kiu mi estos, povos, se li volos, tuŝi urtikon kaj sperti doloron.

- Certe, respondis Fabricio, t.e. ke en via tiom vasta

inteligento, kiu sin provizas ĉiumomente per novaj konoj, aliaj mekanismoj determinos vin mantuŝi urtikon, kvankam vi scias, ke tio kaŭzos al vi doloron. Vi, ekzemple, povos jene rakonti : "Jen estas dolorona urtiko, sed amiko Tako asertas, ke mi ne estas libera ; mi do dolorigos min nur por pruvi al mi, ke li eraras" ; por fari tiun rezonon, vi bezonos eble nur dekonon da sekundo, t.e. ke ĝi estas la kinematografaĵo pri pluraj sinsekvaj Ĵozon dum tiu tempo, kaj, momenteton poste, vi povos ankoraŭ, malgraŭ via **pasinta** rezono, ne tuŝi urtikon, pro alia movo de via cerbo, kiu okazos, dum vi etendos la manon al la planto.

- Mi tre bone komprenas, kion vi diris al mi, respondis la abato, sed mi ne komprenas, per kia mirinda subtilo vi povas pravigi vian opinion, ke la determinismo ne kondukas al la fatalismo. Ripete mi diras al vi : se mi scias, ke ĉio, kion mi faras, okazas sendepende de mia volo, por kio utilas penado ?

- Tio, kion vi faras, ne estas sendependa de via volo, vive reis Fabricio ; sed via volo estas, same kiel la aliaj internaj rebriloj de via cerbo, nur iu sekvo de la nuna stato de via korpo. Via volo ne estas absoluta, ne havas absolutajn komencojn, sed vi ĉiam agas pro motivoj, kiuj estas **en vi** kaj kiujn nur vi konas ; tiel vi ŝajnas al mi libera, ĉar mi ne vidas en via cerbo, kaj vi aspektas libera al vi mem, tial ke vi rigardas vin sendependa de l' mondo ; ĉiumomente, vi forgesas, ke via subjektivo ĉiumomenta estas la rebrilo de iu nuna ŝtaĵo de via cerbo, ŝtaĵo, kiu mem rezultas de sia antaŭa ŝtaĵo kaj de la impresoj ricevitaj el ekstere pere de la sentumiloj. Vi faras kion vi volas, kiam al vi tio plaĉas, kaj tamen vi ne havas absolutajn komencojn, vi ne estas libera.

"Male je vi, kiu kredas esti sendependa de l' mondo, la fatalisto kredas, ke la ekstera mondo estas sendependa je li ; alivorte, li pensas, ke la monda historio elvolviĝas sen lia partopreno en ĝi, kaj tiel li faras eraron analoga al la via ; la arabo lasas sin domon bruli, tial ke li pensas, ke la sorto de tiu incendio estas antaŭe finarangita **sendepende de lia propra partopreno** ; li kredas, ke la mondo estas libera, same kiel vi mem kredas esti libera antaŭ la mondo ; li kaj vi, vole vi forigas el via rezonado parton de la ekzistantaj kaŭzoj ; la arabo forigas la kaŭzojn, kiuj estas en li, vi forigas la kaŭzojn,

kiuj estas ekster vi, almenaŭ kiam vi pretendas esti kapabla je absolutaj komencoj.

- Mi tuj haltigas vin, intermetis abato Ĵozon ; vi ĵus refutis vin mem ; vi diris : la arabo forigas la kaŭzojn, kiuj estas en li, mi mem forigas la kaŭzojn, kiuj estas ekster mi ; jen estas absolutaj komencoj !

- Tute simple vi rimarkigas, ree parolis s-ro Tako, erarojn, kiuj rezultas de la ordinara lingvo. La lingvo estas farita de homoj, kiuj kredis esti liberaj, kaj ĝi ebligas esprimon nur farante el la homo la subjekton de l' verbo, t.e. la mastro de siaj agoj ; temas denove pri la **Mi**, kiu esence estas senmorta kaj libera. Por paroli tute ĝuste mi devus diri : okazas en la arabo rezonado, kiu ktp. La fatalismo estas ia monomanio same danĝera, kiel ĉiuj aliaj monomanioj ; ĝi senkapabligas la individuon, kiun ĝi trafas. Nu, estas konsentite, ĉu ne ? ke la deterministo estas tiu, kiu opinias, ke en iu difinita momento iu el liaj agoj rezultas samtempe de lia materia strukturo kaj de tiu de l' ĉirkaŭa mondo ; la fatalisto kredas, ke ĉio rezultas de l' ĉirkaŭa mondo, kvazaŭ li mem ne ekzistus ; vi mem asertas, ke ago povas naskiĝi en vi, havi absolutan komencon. Vi do vidas, ke la deterministo staras same malproksime de l' fatalismo kiel vi mem ; kaj tiu fatalismo, per kiu vi pretendas bati min, ŝajnas, ke ĝi originas en via kredo je la providenco. Se iu povas antaŭvidi la estonton, kiel eblus, ke oni estu libera ? Ĉu vi ne havas la argumenton, tirita el la historio pri la perfido de Judaso, kaj kiun oni uzas refute al la tezo pri absoluta libero ?

- Sed vi scias ankaŭ, respondis la abato, kiel oni venke rebatis al tiu argumento.

- Mi konfesas, ke mi ne tre klare komprenis la respondon. Ĉar oni sciis antaŭe, ke Judaso ne povis ne perfidi, kiel do li povis perfidi tute libere ? Mi kredas, ke vi misuzas la vorton libero kaj utiligas ĝin por kazoj kiel tia.

- Dio kreis la homon libera, diris la pastro.

- Jes, sed Dio antaŭe determinis la uzon, kiun la homo faros je sia libero, ĉar li konas la estonton. Mi aŭdis lian pastran moŝton Olivje*, kiam foje li paroladis en la paroĥa preĝejo de Pasi**, en la nomo de Dio la Patro

* M.J.H. Ollivier, franca predikanto, 1835-1910.

** Passy : aristokrata kvartalo de Parizo

li diris : "Mi kreis vin liberaj ; ĝuadu pace vian liberon ; blasfemu, sakrilegiu, tio ne gravas laŭ mi : **Patiens quia aeternus !** Sed ni atendu la finon ; venos tago, kiam ĉio tio estos ordigata : **Tunc ridebo !**" Kaj mi estis indignita, tion mi konfesas, aŭdi tiun monakon laŭdi sian kolereman kaj vengeman Dion ! Ho ! necesa estas al vi la kredo je libera homo ! sen ĝi respondeco ne ekzistus, puno estus maljusta, kaj sekve kian bazon havus religio sen la timo antaŭ puno kaj sen la espero al rekompenco ?

- Tion mi ripetas al vi, diris la abato, mi scias, ke mi estas libera ; tion mi sentas kaj vi ne povas konvinki min pri la malo.

- Ĉu la papo estas libera ? demandis Fabricio. Nature mi aludas la kazojn, pri kiuj vi agnoskas lin neerarpova, ekzemple, rilate la dogmon.

- Sendube, la papo estas libera, respondis la pastro, sed Dio inspiras lin kaj montras al li la veron.

- Do li ne povus diri alion ol la veron, kiun Dio instruas ! Kaj tamen li estas libera !

- Sendube, li estas libera ! fajre diris la abato. Esti neprotektata kontraŭ eraro kaj mensogo, tio ne signifas liberon. La celo de l' homo estas la bono...

- Haltu, mia kara amiko, milde diris s-ro Tako. Mi ne povus vin sekvi pli malproksimen ; mia scienca determinismo nature malakordiĝas kun ĉia kredo je celismo. Tuj kiam vi parolas pri la celo de l' homo, tio efikas al mi, kvazaŭ vi parolus ĉine !

- Mi estis pli largmensa ol vi, reis la abato, ĉar mi sekvis vin laŭ la komplikegoj de via determinismo, kiuj estas al mi same nekomprenblaj.

- Tial ke vi esperis kapti min ĉe la freŝa peko de sofismo, dum mi neniel pretendas pruvi al vi, ke celaj kaŭzoj ne ekzistas ; mia intelekto preferas serĉi la kaŭzon de la aferoj en la kondiĉoj mem de la fenomenoj, sed ne eblas al mi demonstri al vi, ke ĉio ne okazas tiel por la plej granda gloro de Dio. Mia determinisma klarigo kontentigas min kaj liberigas min je la neceso min turni al la celaj kaŭzoj, kiuj ne kontentigas min ; vi uzas malan metodon : konsentite ! mi ne povas malhelpi vin tion fari, sed mi sekvas vin nur kiam vi estos montrinta mankon en la materialista klarigo.

- Sed jam de kelkaj tagoj ĉiumomente mi rimarkis ĝiajn mankojn, diris la pastro ; senĉese mi petis, ke vi

demonstru al mi, ke vi ne havas animon kaj vi ne sukcesis tion fari !

- Iam estis, diris s-ro Tako, aŭtomobilisto, kiu vizitis sian amikon, loĝanta en vilaĝo. Li demonstris al li la mirindaĵojn de la mekanismo ; li klarigis al li la transigilojn de l' movado ; unuvorte li faris kompletan klarigon pri la veturilo. La amiko aŭskultis admire kaj ofte intermetis entuziasmajn ekkriojn dum la parolado de l' maŝinisto ; poste, kiam finita estis la klarigado, li aldiris : "Ĉio tio certe estas tre lerte elpensita, sed neniam mi komprenos, ke cia veturilo povas ruliĝi sen ĉevaloj!" Mia animo similas al la ĉevalo de aŭtomobilo ; mi konvinkas min, ke ĉio en mi funkcias sen animo, sed vi volas doni iun al mi ! Oni ankaŭ povas jungi ĉevalon al veturilaĉo ; tion oni eĉ ofte faras, kiam ĝi difektigis ; via animo male povas funkciigi nur sanan korpon ; tuj kiam la aŭtomobilo estas difektita, la animo foriras !

- Mi ŝatas viajn ŝercojn kaj vian bonan humoron, mia kara amiko, diris la abato. Veturilaĉo funkcias sen ĉevalo, sed ĝi bezonas maŝiniston, kaj la maŝinisto havas animon, dank'al kiu li komprenas la mekanismon de sia veturilo kaj povas ĝin ekfunkciigi.

S-ro Tako levis la brakojn al la ĉielo !

- Mia diapazono aŭdigas la sonon e, la via la sonon a ; estas do mi, kiu malpravas, li diris kun ĝemeto.

- Nu, mia amiko, cedeme diris la abato, vi ne devas rompi al vi la kapon ! Mi ankoraŭ ne malesperas malfermi al vi la okulojn antaŭ la lumo de vero, sed tio estos pli malfacila, ol mi supozis, tial ke via orgojlo estas grandega.

- Dum vi estas tute humila ! murmuris Fabricio.

- Vi riproĉas, ke mi konsentas **apriore** pri la ekzisto de senmorta animo ; unue mia konsento ne estas **apriora**, sed ĝi rezultas de matura rezonado ; vi riproĉas, ke mi konsentas pri la ekzisto de Dio kaj ke ĝin mi ne povas pruvi ; sed ĉio atestas favore al tiu ekzisto. Kaj vi poste volas konsentigi min, ke ekzistas en la materio la elementoj de l' penso, hipotezo ofenda al la simpla saĝo kaj kiun vi ne povas pravigi !

- Ties pravon mi ne povas **senpere** demonstri, rezigne respondis s-ro Tako, sed la scienca demonstrado de la determinismo nerefuteble **pruvas**, ke la epifenomenoj de penso havas neniun gvidan agadon al la materiaj feno-

menoj de l' vivo. Mi konstatas la fizikajn leĝojn kaj ilian rigoron ; ili aplikiĝas grandnombre en la plej malgrava el niaj agoj, sed, kia ajn estas la malsimpla de tiuj agoj, ili estas determinitaj, ĉar la fizikaj leĝoj estas sensanĝaj. Ĉu vi kredas je fizikaj leĝoj ?

- Mi kredas, ke Dio diktis leĝojn al la materio, kiam li kreis, respondis la abato ; mi kredas ankaŭ, ke tiuj leĝoj povas, kiam plaĉas al li, cedi antaŭ lia suverena volo.

- Neniam mi vidis miraklon, diris s-ro Tako, sed mi promesas al vi, ke se iam mi konstatos iun, tute senmanke, mi forlasos mian materialismon kaj fariĝos monako. Nur tiel povas sin montri al tia malhumilulo, kia estas mi, la ekzisto de ĉiopova Dio.

- Sed la historio raportas al ni la miraklojn de Nia Sinjoro kaj tiujn de l' sanktuloj, diris la abato.

- Ankaŭ la grekaj poetoj raportas al ni pri mirakloj, je kiuj vi ne kredas ; permesu do al mi same ne kredi je tiuj, raportitaj de malkleraj entuziasmuloj, kiaj estis la apostoloj. Kiam mi mem vidis miraklon, okazanta laŭ kondiĉoj eliminantaj ĉian trompon, mi promesas al vi, ke tiam mi monakiĝos, ĉar estus tro stulte lasi sin trompi tiel krude, atribuante al la fizikaj leĝoj rigoron, kiun ili ne havas.

- Vi legu la libron, kiun ĵus publikigis doktoro Buasari (Boissarie) pri la mirakloj en Lurdo ; en ĝi vi trovos mirindajn ekzemplojn, taŭge konstatitaj de komitato el tre kleraj kuracistoj. Ĝi estas libro, kiu daŭre restos en la historio pri la scienco ; ĝi estas admirinda libro kaj verkita kun evidenta sincero.

- Kiel la fama sankta Tomaso, mi pli fidas la ateston de miaj sentiloj ol tiun de l' plej agnoskataj aŭtoritatuloj, respondis s-ro Tako. Mi iros al Lurdo ; sed mi malfidas je la kuracadoj ŝajne miraklaj, kiuj ne estas pli mirigaj ol tiuj el la Salpetrier* kaj el la hospitalo Sankta Anna*. Jen estas tranĉilo, kiun mi posedas jam delonge kaj kiun mi zorge konservas ; ĉiam mi havas ĝin dum miaj kreskaĵokolektadoj. Mi metos ĝin en botelon, kiun mi lute fermos. Fervore mi subakvigos la botelon en la sankta banbaseno kaj, se la tranĉilo eliĝos el la botelo, ne rompiĝinte ĝin, tiam mi kredos je Dio.

* *Parizaj hospitaloj, kie oni flegis gehisteriulojn. Trad.*

- Vi postulas, ke Dio estu prestidigitisto, kiel Robert Huden*, diris la abato ridante.

- Mi petas al li kuracon al la malkredemo de mia animo, diris Fabricio kun la plej granda seriozo ; tia kuracado ne estas malpli grava ol tiu, kiu konsistas en plilongigo de kruro aŭ en forigo de hernio. Se malaperos mia tranĉilo, tiam mi ne plu kredos je la konserviĝo de l materio, kaj mi fariĝos monako !

- Povas esti, diris la pastro, ke Dio konsentos al vi tiun miraklon ; vi eraras kun tiel tuta sincero, ke li ne povas esti vengema al vi ; estu paco sur la tero al la bonvolemluloj !

- Kaj se la tranĉilo restos en la botelo, daŭrigis s-ro Tako, el tio mi ne konkludos, ke Dio ne ekzistas, sed ke ĉio okazas, kiel se li ne ekzistus. Cetere, kial iri al Lurdo ? kial ne alvoki preĝe por miraklo en ĉi tiu sovaĝa loko el Bretonio ? Dio certe estas ĉi tie kiel tie, ŝajnas al mi ; ni do faru la eksperimenton.

- Vi ŝercas, diris la abato ; Lurdo estas la loko, kiun Dio elektis ; kial voli trudi al li alian lokon ?

- Mi do iros al Lurdo, diris s-ro Tako, sed, se Dio konsentus miraklumi ĉi tie, tio rezultigus bonan aferon por ĉi tiu regiono. Ties loĝantoj estas tre malriĉaj ; miraklo plenumita je mia tranĉilo sufiĉus logi al ĉi tiuj erikejoj amason da pilgrimantoj, kiuj riĉigus niajn kompatindajn najbarojn.

- Al Lurdo oni devas iri, reis la pastro ; sed dume vi legu, mi petas vin, la libron de doktoro Buasari ; ĝi estas tre leginda.

- Ĉar vi rekomendas tiun legaĵon, respondis malfideme Fabricio, tio signifas, ke ĝi estas la verko de kredulo kun antaŭfavoremo al la pruvota tezo kaj kiu povis pli facile konvinkiĝi, ol mi mem povus. La sola miraklo, je kiu mi kredis, estis al mi rakontita de malkredulo kiel mi ; antaŭ proksimume dek jaroj, li veturis al Lurdo per speciala trajno por pilgrimantoj. Tiu trajno estis ŝovita en la stacioj sur flankan vojon ĉiufoje, kiam rapidtrajno devis preterpasi. En iu loko, malsatantaj pilgrimantoj elvagoniĝis, sed ĉe la nepermesata flanko. Du el ili portis paraliziton, kuŝanta sur brankardo. Fervojistoj, timante teruran akcidenton, abrupte ekkriis : "Atentu, jen venas la rapidtrajno!" Fakte trajno alkuregis ; la du

* Robert Houdin : fama prestidigitisto franca, 1805-1871

portantoj panike saltis sur la kajon, lasinte la paraliziton sur la reloj. Nun aŭskultu pri la miraklo : vidante la trajnon proksimiĝi, la paralizito leviĝis de sia danĝera kuŝejo kaj kuris al la bufedo, dum la lokomotivo disfrazis la brankardon, kiun li ĵus forlasis. Kaj tio pruvas, ke, kiam oni kredas, ne estas necese iri ĝis Lurdo por resaniĝi ; sufiĉas ekiri kun la intenco atingi la celon. Tion pensis mia amiko ; li revenis, neirinte ĝis la celo de sia vojaĝo, tial ke li ja vidis miraklon, kaj ankaŭ pro tio, ke la trajno por pilgrimantoj estis ne tute komforta.

- Vi daŭre ŝercas, diris la abato kun iom da malbonhumoro.

- Mi do iros al Lurdo, konklude diris Fabricio.

LA SENLIMO KAJ LA ABSOLUTO

En la kokejo, kokino finis sian kovadon ; kiam la lasta ovo estis elkovita, la patrino ekstaris, tutetendis siajn piedojn, lacaj pro longa senmoveco kaj plurfoje skuis siajn plumojn, dum ŝi aktive klukis, por teni apud si siajn idojn jam riskemaj . S-ro Tako malfermis la pordon de l' kokejo kaj elirigis la patrino ; la kokidetoj sekvis, aŭdigante kriojn, similaj al tiuj de timigita muso, kaj gaje disiris en la erikejo, sub la suno.

- Neniu spektaklo, diris la abato, iam ajn pli mirigis min ol tiu de la elkoviĝo de kokidetoj ; ĉe la seminario, ni havis artefaritan kovilon, kaj ofte mi restis observe dum horoj por vidi iun el tiuj junaj bestoj eliri el sia ŝelo. Mi ne povas ne revii pri kio estis, antaŭ tri semajnoj, la ovo, kiu produktis iun el tiuj etaj mirindaĵoj ! Iom da blankaĵo kaj da flavaĵo, ia fluida kaj senforma miksaĵo ! Hodiaŭ jen estas facilmovaj kaj viglaj kokidetoj mirinde ekipitaj por vivi en via erikejo. Kaj kia komplikaĵo de strukturo, kiom da diversaj elementoj ! La kokideto utiligas la tuton kun tre eksterordinara lerto. Ĝi etendiĝas kvazaŭ ĝi estus laca pro longa malliberiĝo ; ĝi kuras, ĝi trinkas, ĝi manĝas, ĝi eĉ timas, kiel se ĝi jam konus la trompojn de l' mondo ! Kaj ĉiujn tiujn movojn ĝi faras senpene, senhezite, kiel se ĝi sciis tion fari jam delonge ! Ĉu vi vidos en tiu mirinda besteto nur simplan maŝinon ? Montru do al mi, en via kemio, fluidan kaj gluetan korpon, kiu, dum kelkaj tagoj, kaj per siaj propraj rimedoj, transformiĝas en ion tiel mirindan, kiel viva kokideto !

- Mia kemio, kiel malĝuste vi nomas ĝin, respondis Fabricio, ne povos montri al vi kion vi petas, tiom longe, kiom vi **apriore** apartigos de ĝi ĉiujn korpojn, kiuj posedas ecojn de kokina ovo aŭ similajn ecojn. Estas tute certe, ke se vi dividas la materiajn korpojn laŭ du kategorioj, tiu de l' vivaj korpoj kaj tiu de l' malvivaj, kaj se via difino pri **kemio** rilatas nur al la scienco, kiu studas la ecojn de l' korpoj de l' dua kategorio, vi neniam trovos

vivajn korpojn inter tiuj, kiujn studas la kemiistoj. Ekzistas mirindaĵoj en la kemio pri la malvivaj korpoj, sed la fenomenoj, kiuj okazas en ĉi tiuj lastaj, ne diferencas esence de tiuj, kiuj okazas en la unuaj. La moderna scienco nepridiskuteble tion pruvis kaj vi povos konvinkiĝi pri tio, se vi bonvolos studi la biologion. Senplue, vi tuj ekkonos mem iun fundamentan karakteron, komuna al la du kategorioj da korpoj.

- Mi estos tre kontenta, diris la abato ; ni do vidu tiun komunan karakteron.

- Se vi zorge elektas fekundigitajn ovojn de kokino kaj elmetitajn en normalaj kondiĉoj, kaj se vi prizorgas ilin dum dudek unu tagoj en iu serumata varmigejo, kun taŭga temperaturo, ĉiu ovo donos al vi, fine de la eksperimento, unu bone konsistigitan kokideton vivantan kaj nur emantan plu vivi. Pri tio vi konsentas, ĉu ne ?

- Certe, konsentis la abato.

- Do, daŭrigis Fabricio, same kiel por fizika aŭ kemia eksperimento tre simpla, kies kondiĉojn vi konas, **vi povas antaŭscii**, sen eblo de eraro, tion, kio rezultos de l' fakto, ke vi metis ovon en artefaritan kovilon. Vi povas aserti, ke en la kovilaj kondiĉoj, t.e. en renovigata aero kun taŭga temperaturo, la ovo estigas kokideton, la kokideto estigas en la ovo. Alidirite, per kokina ovo, aero kaj varmo, mi scias fari kokideton, senmanke.

- Sed kiu liveris la kokinan ovon ? intermetis la abato.

- Pri tio poste, respondis s-ro Tako. Se, anstataŭ kokina ovo, vi estus preninta anasinan ovon, vi ne estus konstatainta egajn diferencojn en ĝia komenca strukturo, kaj tamen, metite en kovilon, tiu ovo estigus anasideton kaj ne kokideton. Anasideto malsimilas kokideton laŭ tre granda nombro de gravaj karakteroj, kaj oni povas miri, ke estuloj tiel malmulte similaj originas, en samaj kondiĉoj, el du ovoj tiel similaj ; sed la anasideto estas, per si mem, same kurioza kiel la kokideto, ĝi estas same komplika kaj same mirinde kunaranĝita.

- Kiu liveris la anasinan ovon ? diris la abato.

- La anasina ovo, senekscitiĝe daŭrigis Fabricio, estigas la anasideton, kiel la kokina ovo, la kokideton ; la diferencoj, kiuj apartigas la anasideton disde la kokideto kuŝas do en la tiel malmulte videblaj diferencoj, kiuj ekzistas inter la anasina ovo kaj la kokina ovo. Kiom da motivoj por miro en la studo super tiuj ordinaraj faktoj !

Sed, anstataŭ sin limigi per senfrukta admiro por la verko de l' Kreinto, la kleruloj provis kompreni tiujn mirindaĵojn. Tiu komprenemo naskis tri sciencojn. La **Fiziologio** studas la mekanismon de l' konsistigita estulo, ĉu juna, ĉu plenkreska, kaj montras, ke ĉiuj mekanismoj, kiel ajn komplikaj ili estas, obeas al la fizikaj kaj kemiaj leĝoj. La fiziologio estas tre multfaka scienco.

- Kiu kreis tiujn mekanismojn ? diris la abato.

- Ĝi estas la ovo, per aero kaj varmo, respondis s-ro **Tako**. Konsidere kokinan ovon, la **Embriologio** instruas al ni, kiel, en artefarita kovilo, tiu ovo fariĝas kokido post tri semajnoj. La embriologio estas freŝdata scienco, sed jam riĉa je faktoj kaj dokumentoj ; pluraj jaroj estas necesaj por studi ĝin.

- Sed kiu liveris la kokinan ovon ? insistis la abato.

- Mi tuj respondos, diris Fabricio. Kiel povas okazi, ke tia ovo, ke tiel mirinda korpo ekzistas, en kiu de antaŭe estas determinitaj tiom da fenomenoj kun tre eksterordinara komplekseco kaj kun matematika precizo, kun la nura kondiĉo, ke oni provizu ĝin, dum dudek unu tagoj, per oksigeno kaj konstanta varmo samtemperatura ?

- Jes, diris la abato ; kiel tio povas esti ?

- Al tia grava demando penadas respondi la tria scienco, pri kiu mi parolis al vi, la scienco pri la **origino de la specoj**. Same kiel la embriologio, tiu scienco naskiĝis antaŭnelonge, sed ĝi jam tiom progresis, ke pluraj jaroj estas necesaj por esti informita pri ĝiaj akiroj. Do, por ne plu miri antaŭ la elkoviĝo de kokideto, necesas pasigi dekon da jaroj por studi la Fiziologion, la Embriologion kaj la Originon de la specoj. Evidente estas malpli lacige konsenti, ke ĉio estas tia pro tio, ke Dio volis, ke estu tia, kaj ke en la siluria epoko kokidoj ekzistis, kio certe estas erara. Estas pli facile emfaze paroli pri la fiasko de la scienco ol akiri komprenon pri ĝiaj mirindaĵoj, kaj pro tio via katekismo dum longa tempo staros venke kontraŭ la vero ; la vero postulas tro da penado !

- Vi tro arogante parolas, mia kara amiko, diris la abato, aŭdante vin oni povus pensi, ke ĉiuj kreduloj estas malkleraj. Eminentaj scienculoj kredis ; da ili ekzistas ankoraŭ kaj ekzistos dum longa tempo, glorige al la homaro.

- Tial ke, kiel tion rimarkigis Pasteŭr, en ĉiu el ili

ekzistas du apartaj homoj, la scienculo kaj la kredulo, kiuj ne interdiskutas. La kredulo estas la plej postulema, li malpermesas al la scienculo transiri la kredolimon, kaj la scienculo, por ĝui pacon, cedas kaj neas la ekziston de l' konflikto. Estas malfacile liberigi el hereda nescio, daŭranta dum pluraj centoj da generacioj, precipe, kiam dum la junaĝo la edukado sisteme plifortigis la kontraŭsciencan mistikemon. Malmultaj estas tiuj, kiuj sukcesas, kiel diris Brieŭ (Brieux), forrampi el tiu heredaĵo, dank'al racia edukado frue komencita. Pro tio tiel fervore vi klopodas, por "instrui" la infanojn. Tiom longe, kiom vi plenumos tiun instruan taskon, la kontraŭkulturemo venkos super la klerigemo, kaj vi dum longa tempo regos sur tiu kampo, tial ke vi havas grandan influon sur la virinojn ; la virina cerbo estas pli akceptema al la logoj de l' poezio kaj de la arto ol al la severaj veroj de l' pozitiva scienco ; la patrinoj liveros al vi siajn infanojn, kaj la infanoj, fariĝintaj plenkreskuloj, ne kapablos liberigi el la krusto, en kiu ili estos fermitaj.

- La Eklezio vivos, tiom longe, kiom estos homoj, diris la abato.

- Tion mi timas, respondis s-ro Tako ; tamen ni ne plu vivas en la mezepoko ; vi ne plu monopoligas la sciencon ; ekster viaj vicoj troviĝas **kleruloj**, kaj eble iam oni ekvidos, ke la progresoj okazas malgraŭ vi ; la per-aŭtoritata argumento alilokiĝos. Sed vi posedas multajn rimedojn !

- Vi fariĝas tre atakema, mia kara amiko, diris abato Ĵozon ; mi preferas vian sintenon en la sereno de via scienca konvinko ; ni denove preparolu la kokinan ovon, se plaĉas al vi.

- Denove ni parolu pri la kokina ovo, diris Fabricio. Ni estis parolantaj pri la origino de la specoj, kaj mi konstatis, ke vi kontraŭas al la transformismo, sen kiu ĝi ne estas klarigebla.

- La transformismo ne kontraŭas la dogmon, diris la abato.

- Konsentite, sed mi ne forgesis, ke la dogmo tamen ne rilatas simpatie al tia ismo. Ni tamen preparolu ĝin, se vi konsentas. La transformismo klarigas, kiel la kokina ovo nuna deriviĝas de ovo iom malsimila, kiu ekzistis antaŭ kelkaj miloj da jaroj ; tiu praovo estigis **pli simplan** prabirdon, ktp. ; la transformismo klarigas, **per naturaj**

faktoroj, tiun iompostioman evoluon de la specoj. Tiel irante returne laŭ la epokoj, ni trovas, ke la homo, la hundo, la kokino, la lacerto, ktp., deriviĝas de prauloj, kiuj, antaŭ miloj kaj miloj da jaroj, estis treege pli simplaj ; eĉ pli simplaj ol la plej simplaj el la malsuperaj estuloj hodiaŭ konataj.

- Kaj de kie venis la unua el tiuj tiel simplaj estuloj? malicete demandis la abato.

- Estas certe, diris s-ro Tako, ke sur la tero la vivo ne ĉiam ekzistis ; la tero iam estis inkandeska, kaj neniu viva substanco povas elteni ducentgradan* varmon. Do la vivo iam aperis, tio estas evidenta. Kaj la transformismo instruas al ni, ke ĝi kredeble aperis en formo treege simpla, pli simpla, tion mi jam diris al vi, ol la plej simplaj estaĵoj hodiaŭ konataj.

- Sed kiel ĝi aperis ? demandis la abato.

- Tion mi ne scias, respondis Fabricio. La terglobo estis en tiu epoko tiel malsimila al tio, kio ĝi hodiaŭ estas, ke tre malfacile estas imagi, kiaj estis, tiuepoke, la kondiĉoj kaj la substancoj kunekzistantaj. Tre eble estas, cetere, ke la cirkonstancoj necesaj por la sintezo de kelkaj vivaj molekuloj okazis nur unu fojon, en iu tre speciala punkto. Tio sufiĉas, por ke ni povu kompreni ĉion, kio okazis poste.

- Kaj kiu okazigis, en tiu tre speciala punkto, tiujn tre specialajn cirkonstancojn ?

- Kiu rondigis ĉi tiun ŝtoneton, kiun vi tretas ? reis s-ro Tako. Ĝi estas la ruliĝo, la surfluo de la akvo, la pluvado, la vento, kaj mi ne scias kio, unuvorte ĉiuj naturaj faktoroj. En la determinite sinsekva evoluo de l' mondo okazis unufoje iu sintezo de viva materio, tute simple.

- Tute simple, ripetis ridetante la abato. Ĉu do s-ro Pasteur ne pruvis, ke la spontanea generado ne eblas ?

- S-ro Pasteur pruvis, ke la bakterioj, ŝimaĵoj kaj aliaj organismoj, kiuj aperas en la lokoj ne ŝirmitaj kontraŭ la polvoj de la aero, neniam aperas tie tute solaj ; li vidis, ke la ĝermoj de tiuj treege etaj organismoj estas portataj tien, kie ili kreskas ; alivorte, li instruis al ni, ke oni povas, per iaj procedoj, **ŝirmi iajn substancojn kontraŭ la invado de l' vivo** ; ĉu tio pruvas,

* ĉi tie temas pri centezimalaj gradoj.

ke ne eblas fari vivan materion ? Tion la glorfama scienculo neniam asertis ; neniam oni sukcesos pruvi, ke la sintezo de viva substanco estas neebla.

- Ĉu oni sukcesos pruvi, ke ĝi estas ebla ? diris la abato.

- Tion mi esperas, respondis Fabricio, sed mi ne kuraĝus jesi ; la kemio tiom progresis dum cent jaroj, ke oni ne scias, kie ĝi haltos ; ĉiaokaze, se oni sukcesos fari vivan substancan, ĝi probable estos nur viva substanco primitiva, pli simpla ol ĉiuj, kiujn ni nuntempe konas ; ĝi eble montriĝos en formo tia, ke ni ne rekonos ĝin. Necesos ankaŭ, ke ĝi estu ŝirmita kontraŭ ĉiuj specoj nuntempe vivantaj ; specoj, kiuj estas pli bone adaptitaj al la nunaj kondiĉoj, kiuj neeviteble ĝin detruus. La puraj kulturoj de Pasteur estas do iu precipa neceso por la sintezo de viva substanco.

- Ĉu oni faros kokinan ovon viva kaj kapabla materie evolui per kovado ? demandis la abato.

- Se oni faros ovon de kokino, similan al la ekzistantaj, ĝi estos viva kaj kapabla kove evolui, sed ĉu oni povas prave postuli, ke homo faru tuj kion la naturo perfektigis dum milionoj da jaroj ? Se oni faros vivan substancan, ĝi estos, mi rediras, tre simpla kaj tio neniel estos grava.

- Tio ja havos nenian gravon, vive diris la abato, tio nenion pruvos kontraŭ la kreado. Mi supozas, ke en iu laboratorio vi faros vivan substancan ; ĉu tio pruvos, ke iam ĝi povis mem kreiĝi ? Tute ne, ĉar en via laboratorio estas homo, **vi** ! kaj da ili ne ekzistis en la historio de l' terglobo, kie viasupoze okazis tiu hipoteza sintezo de la unua molekulo viva. Se vi kreos vivan materion, tio pruvos nur, ke Dio, kreante la homon, donis al ĝi la kapablon fari vivan substancan ; sed necesos unue ekspliki al mi la homon, kiu mem estas viva !

- Admirinde ! admirinde ! ekkriis s-ro Tako. Vi mal-simpatie rilatas al la eblo pri sintezo de viva substanco, sed vi antaŭvidas la okazon, kiam oni ĝin efektivigus, kaj vi jam okupas defendan pozicion ! Kiel povas esti, ke pli frue oni ne pensis pri tio ? La scienco povas nenion kontraŭ la dogmo, ĉar Dio donis la sciencon al la homo, kiam Li kreis ĝin. Ĉiuj eltrovoj de l' homa genio ĉiam pruvos nur la ĉiopovecon de l' Kreinto !

- Prave dirite, mia kara amiko, diris la abato, kaj,

kvankam vi ironie parolis, vi tamen eldiris ion tute saĝan. Neniam la scienco bate trafos la kredon, tio estas neebila, tio estas absurda !

- Tio signifas, respondis Fabricio, ke la kredo finfine limiĝos je kelka kvanto da vortoj, havantaj la pretendon reprezenti metafizikajn verojn, ne trafebraj per observado kaj eksperimentado. Tiam, efektive, la scienco ne plu povos ĝeni la kredon, sed, almenaŭ, ĝi estos konkerinta la mondon !

- Vi estas tre asertema, reis la abato ; sed hodiaŭ mi decidis devigi vin eluzi viajn lastajn defendilojn. Mi do, kompleze al vi, konsentas, ke la vivo aperis kiel normala sekvo de la efektiviĝo de iaj cirkonstancoj materiaj en iu punkto de l' mondo, en ia momento. Kaj, cetere, farante al vi tiun cedon, mi ne kolizias kun la dogmo ; ni rajtas konsenti, ke Dio nur metis animon en la homon, ke li nur kreis **ĝian substancon, ĝian animon**, tion, kio estas en li esenca, kaj ke tiucele li elektis animalon, kiu sufiĉe progresis en la evoluado.

- Ĉion tion vi jam diris al mi alian tagon, diris s-ro Tako.

- Nu! denove mi faras al vi tiun cedon ; ni ne plu bezonas pridiskuti tiun demandon pri la materia origino de la korpo de l' homo kaj pri la spontanea apero de la malsupera vivo ĉe la surfaco de l' tero. Mi bonvolas cedi, ne ĉar vi konvinkis min, sed tial ke ĝi ne kontraŭas la dogmon. Mi ja povas cedi tiurilate, tial ke mi havas rezerve, ekster tiu demando pri la vivo, armilojn, kiuj certigas al mi venkon kontraŭ vi ; oni povas esti bonhumore cedema, kiam oni havas abunde valorajn argumentojn.

- Serene mi atendas la fortegan baton de viaj konvinkaj argumentoj, gaje diris Fabricio.

- Mi teren batos vin per unu vorto : **Senfineco** ! diris la abato. La senfineco en la spaco kaj la senfineco en la tempo ! La homo posedas en si mem tiun ideon pri la senfineco ; ĝi sentas la ekziston de iu senfineco ; ĝi sentas la ekziston de iu senfineco kaj ties nekompreneblecon ; la nocio pri tiu nekomprenebla senfineco trudas al ni la kredon pri la ekzisto de Dio, kiu sola estas senfina kaj sekve sola povas koncepti la senfinecon. Paskal, Njuton, Pasteŭr, ĉiuj eminentaj geniuloj provis sensukcese kompreni la senfinecon kaj tial sin klinis humile antaŭ Dio.

- Mi ne sentas min terenbatita, diris s-ro Tako ; mi intencis diri al vi multon pri tiu temo, kaj mi estas kontenta, ke vi donis al mi tiun oportunos. Mi eĉ havas tiom multe por diri, ke mi ne scias per kio komenci.

- Ĉu vi difinos la senfinecon ? ironie diris la abato.

- Estu trankvila, respondis Fabricio. Longe mi cerbumadis super tiu demando pri la senfineco, kiu, tion vi ĵus diris, terenbatas la homan genion kaj devigas ĝin esti humila ; sekve, mi esperas, ke mi ne diros al vi tro da sensencaĵoj. Unue, la demando pri la senfineco, kiu staras antaŭ ĉiuj pensuloj, estas nur iu infaneca **kial**, aŭ, se vi preferas, iu homa **kial**.

- Mi ne komprenas, aŭdigis la abato.

- Sendube vi konis infanojn, kiujn iliaj gepatroj nomis "Sinjoro Kial". Ili estas etcerbaj scivolemuloj, kiuj senĉese starigas al si demandojn ; inter tiuj demandoj estas kelkaj, kiuj estas prudentaj kaj nemalofte embarasas la gepatrojn ; aliaj estas tute absurdaj. Ĉiuj tiuj demandoj naskiĝas en la cerbo de la infanoj pro la strukturo mem de tiu cerbo, kaj ni ne sentas la neceson maltrankviliĝi, kiam ni aŭdas absurdan demandon. Male ni mokas tiujn infanecajn kialojn. Kiam, niavice, ni mem, plenkreskuloj, starigas absurdajn demandojn, ni ne havas superulojn, kiuj povus moki nin, kiel ni mokas niajn infanojn. Tiam ni stimulas nin super tiuj demandoj ; en ili ni vidas gravajn problemojn, ni metafizikumas ! ni fieras pro tio, ke ni sukcesis, per geniaĵo, starigi tiujn demandojn, al kiuj ni ne povas respondi ! Kaj tial ke ekzistas demandoj, kiuj stariĝas antaŭ ni, kaj kiujn ni ne povas solvi, ni sentas la bezonon imagi unu aŭ kelkajn superulojn, kapablaj trovi solvon, tute same kiel infano erare kredas, ke lia patro povas respondi, kiam ĝi demandas : "Paĉjo, kial la akvo malsekigas ?"

- Jen elturniĝo, per kiu vi ne forsavos vin, mia amiko ; viaj supozitaj kialoj infanaj stariĝas antaŭ ĉiuj homoj, kaj al la eminentaj pli insiste ol al la aliaj. Paskal sopiregis al la senfineco.

- Paskal estis homo, respondis s-ro Tako. Vi ne miras pro tio, ke la homoj havas nazon, buŝon, dentojn, okulojn kaj orelojn, sed vi miras pro la ekzisto de iu komuna al ĉiuj homaj cerboj, iu struktura karaktero, kiu montriĝas en la subjektivo de ĉiu per la samaj deziroj, la samaj

aspiroj, la samaj demandoj ! Se vi starus kiel mi sur la tereno de l' pura Biologio, vi pensus, ke vi, homo, vi estas nur ŝtupeto de iompostioma evoluado de la estuloj ; vi rezultas denaturaj aliĝoj de prauloj, de kiuj vi ricevis, per heredo pli malpli modifita, same viajn korpajn karakterojn kiel la spiritajn. La parenceco, pruvita per la determinismo, inter ĉiuj estuloj malebligus, ke vi miru pro la similaĵoj konstatitaj inter ni ; vi ne dirus, ke demando estas nepre esenca kaj prudenta, tial ke ĝi starigās antaŭ ĉiuj homoj, same kiel vi ne asertas, ke la nazo, havata de ĉiu homo, superas, rilate al la flarkapablo, tiun de hundo. Kaj, konante vian modestan devenon, vian tute naturan evoluadon, vi mirus, ne pro tio, ke ekzistas aferoj, kiujn vi ne povas kompreni, sed, male, ke tiom da ili ekzistas, kiujn vi komprenas kaj eĉ tre bone ! La sciencaj akiroj de l' 19-a jarcento igas min orgojla, tion mi humile konfesas al vi.

- Kompatinda amiko mia, diris la abato, jen estas ne tre brila malvenko ; vi kutimis defendi vin laŭ maniero pli konstante alta, sed mi estis certa, ke per tiu terura demando pri la Senfineco mi donos al vi la lastan venkobaton ! Ha! ĝi estas vere aŭdinda via argumento ! Mi neas Dion, tial ke mia prudento venkas ĉiujn malfacilaĵojn, kaj, kiam iu vere serioza prezentiĝas, tiam mi pafas alidirekte. Mia prudento estas tre malforta, vi diras ; ĝi originas de miaj animalaj prauloj, oni do ne devas miri pro ĝia malforto ; male, ju pli stulta, ju pli malklera mi estas kaj malkapabla kompreni, des pli tio pruvas, ke mi originas de simio kaj ke Dio ne ekzistas !

- Mia kara abato, trankvile diris s-ro Tako, vi eble pripensos denove la argumenton, kiun mi prezentis al vi kaj kiu certe estas tre prudenta. La demando pri la komenco kaj la senlimeco de l' mondo starigās antaŭ ĉiuj homoj pro ilia naturo ; tion mi montros al vi post momento : cetere mi havas aliajn argumentojn, kiuj probable pli facile konvinkos vin, kvankam ili estas pli komplikaj kaj pli malfacile kompreneblaj.

- Mi ne dubas, ke ili estas eĉ pli senvaloraj, triumfante diris la abato.

- Vi rigardu la sunon, kiu donas al ni lumon. Ĉu vi scias ties amplekson ?

- Mi scias, ke ĝi estas grandega kaj konsistas el mal-

multe densa materio, diris la abato.

- Ĝi estas dekkvarmiloble pli granda ol la Tero, diris Fabricio. Ĉu vi povas imagi, prezenti al vi objekton dekkvarmiloble pli grandan ol la Tero ? Iu el miaj profesoroj instruis al mi, kiam mi estis knabo, ke se la centro de l' Suno troviĝus ĉe la centro de l' Tero, la Luno, tie, kie ĝi nun estas, troviĝus en la Suno, kvazaŭ fazeolo en la ventro de giganto. Mi povas facile imagi fazeolon kaj giganton, sed ne povas rilate al la vastego de l' Suno.

- Tio ĉi estas tute ĝusta, diris la abato ; ofte mi konstatis, ke mi eĉ ne povas prezenti al mi la dimensiojn de l' Tero. Ĝi estas tro granda, rilate al tio, kion mi povas ĉirkaŭrigardi en unu fojo, suprengrimpinte altan monton. Kaj se mi supoze staras tre malproksime, en kondiĉoj analogaj al tiuj, en kiuj mi troviĝas, rilate al la Suno, ekzemple, mi forgesas la distancon kaj ne plu imagas la malrelativan amplekson de tio, kion mi rigardas. La Suno ne ŝajnas tre granda. Mi loĝas je cent kilometroj for de l' Blanka Monto, kaj mi vidas, dum la hela vetero, tiun giganton de la Alpoj ; sed, tiel klare, kiel mi ĝin vidas, ĝi aspektas malgrandigita pro la distanco kaj mi ne povas imagi ĝian realan amplekson. Tiom malpli mi ne povas imagi la Lunon, la Teron aŭ la Sunon laŭ ilia vera amplekso.

- Kaj ĉu vi scias, kioma distanco apartigas nin de l' Suno ? daŭrigis Fabricio. Tiu inkandeska globo bezonas ok minutojn por sendi al ni sian lumon, kies irrapido estas tricent mil kilometroj sekunde. Ĉu vi povas imagi tiom grandan distancon ?

- Mi scias, ke ĝi ekzistas kaj tio sufiĉas al mi, diris la abato ; mi povas imagi nur kelkkilometran distancon.

- Kaj ĉu vi meditis pri la rapido de la lumo ? Tricent mil kilometroj en unu sekundo ! Vi povas imagi la rapidon de ŝtono, kies trajektorion vi sekvas per la okuloj, tiun de preterpasanta rapidvagonaro ; vi jam ne povas imagi tiun de kanona kuglego ; sekve pri la rapido de la lumo estas pli saĝe ne paroli. Kaj kio estas la lumo mem, se ne vibra moviĝado, kiu okazas pli ol tricent bilionojn da fojoj en unu sekundo ? Tiu termino "vibra moviĝado", ni ĝin komprenas, kiam temas pri malrapida moviĝo, pri tiu de horloĝo, ekzemple ; ni imagas ĝin ankaŭ, kiam temas pri diapazono aŭdiganta iom malakutan sonon, kaj,

tamen, se ni rigardas diapazonon, ni vidas ĝin aliformita kaj plilarĝigita per ĝia movado, sed ni ne vidas plu la movadon : ĝi estas tro rapida. Kiel estas pri la luma moviĝo, kiu estas unubilionoble pli rapida ! Malprecize ni **komparas** ĝin al iu pendola moviĝo, sed ni ne povas ĝin imagi. Ne parolante pri io tiom eta, kiom estas la luma vibrado, ĉu vi kelkfoje rigardis per mikroskopo ?

- Per ĝi oni montris al mi bacilojn de la tuberkulozo, diris la abato.

- Kaj ĉu vi provis imagi la **realajn** dimensiojn de tiuj baciloj, kiuj aspektis al vi kiel maldika plumostreko du milimetrojn longa ? Se vi rigardis ilin laŭ pligrandigo de 1200 diametroj, tio faris surfacan pligrandigon de unu miliono kvarcent mil obloj. Ĉu vi povas imagi ion, kio estas unu miliono kvarcent kvardek mil oblojn pli malgranda ol maldika plumostreko du milimetrojn longa ?

- Neniam mi provis tion imagi ; mi scias, kioma estas la grandeco de l' bacilo eltrovita de Kofn ; mi povas esprimi ĝin per frakcioj de milimetroj, kaj tio sufiĉas al mi por paroli pri tiu bacilo.

- Ni ja parolas pri tio, kio estas tre granda aŭ pri tio, kio estas tre malgranda, sed por tion fari ni uzas la matematikan lingvon, kiu malgraŭ sia precizeco nenion **reprezentas** en nia spirito. Ni ne povas imagi la dimensiojn de l' Suno kaj, malgraŭ ĉiuj niaj penoj, ni restas, kiam ni uzas la ordinaran lingvon, en kazo analoga al tiu de la infano, kiu demandis al sia patro : "Ĉu Afriko estas tre granda ? Ĉu ĝi estas pli granda ol la sonorilturo de l' preĝejo ?"

- **Sic parvis componere magna solebam**, aldonis la abato.

- Tion mi senĉese faras, reis Fabricio. Ni ne povas imagi la dimensiojn de objekto, kiu estas tro senproportia kun niaj propraj dimensioj aŭ kun la dimensioj de la objektoj, kiuj kontaktas kun niaj sentiloj. Kiam ni diras, ke la lumo de stelo bezonas tri mil jarojn por atingi nin, ni ne povas imagi ĝian distancon pli granda ol tiun de alia stelo, kies lumo jam atingas nin post sesdek sep jaroj, aŭ eĉ tiun de l' suno, kiu bezonas nur ok minutojn por trafi la teron, tial ke la distanco inter la suno kaj nia planedo jam multe superas la plej grandajn distancojn kiujn ni povas imagi. Tio rezultas de nia homa naturo, de niaj dimensioj kaj de niaj sentorganoj. Vi supozu,

momente, la ekziston de homo, granda kiel la suno ; tian supozon ni povas fari, kvankam ni ne povas imagi tian homon ; ĝi imagus la dimensiojn de l' suno, sed ĝi mal-facile povus imagi la distancon inter la suno kaj la tero kaj ĝi ne povus imagi iun tiom malgranda , kiom ni, same kiel ni mem ne povas imagi la bacilon de l' tuberkulozo. Male vi supozu la ekziston de homo same eta kiom estas la bacilo de l' tuberkulozo, ĝi ne povus imagi la grandon de domo, sed ĝi ankaŭ ne povus imagi tiun de luma vibrado. Vivulo, kiu konsistigas limigitan parton de l' mondo, povas imagi nenion tro grandan aŭ tro malgrandan, rilate al siaj propraj dimensioj aŭ al tiuj de la objektoj, kiujn konigas al ĝi ĝiaj sentorganoj.

- Kion vi celas konkludi per ĉiuj tiuj rimarkoj ? demandis la abato.

- Nu, ĉi tion : ni ne povas sukcesi imagi, kompreni tion, kio estas tre granda aŭ tre malgranda, rilate al ni mem, eĉ en la kampo de la limigitaj aĵoj ; ne estas do necese rilati al la senlime granda aŭ al la senlime malgranda por trovi la limojn de l' homa komprenpovo. Ĉiuj niaj rezonoj, koncerne al tiuj demandoj pri senfineco, pruvas, plian fojon, ke ni estas la viktimoj de lingvo, kiu ebligas paroli pri tio, kion ni ne komprenas, same kiel ni jam vidis, ke ĝi ebligas paroli klare pri kio ne ekzistas.

Vortoj ! Vortoj !

- Vi implikiĝas en elturniĝoj, kiuj mirigas min pro via kutima logikemo ; pli kaj pli mi ekvidas, ke tiu demando pri la senfineco senigas vin je via kutima klarvido. Vi ne komprenas la senfinecon, do ĝi estas nur vorto ! Ŝajnas tamen, ke miaj paroloj estis tre klaraj kaj precizaj en la demando : kiam komenciĝis la mondo !

- Se mi diras al vi, ke ĝi ĉiam ekzistis, tiam vi demandos al mi, ĉu mi povas imagi la senfinecon de l' pasinta tempo ; ĉar mi diros, ke tion fari mi ne povas, vi respondos al mi, ke la mondo komenciĝis iam, kaj ke ĝin kreis estulo, kiu ĉiam ekzistis ; tiel ke al la neeblo por mia intelekto kompreni tiun demandon pri la senfineco de l' tempo, kiu daŭre starigis rilate Dion, kiel ĝi starigis rilate la mondon, vi aldonas la novan neeblon kompreni, ke io povis esti farata per nenio.

- Dio konsistigas por la homo misteron ; se la homo povus koncepti Dion, ĝi estus mem Dio.

- Tiel ke vi anstataŭigas misteron per alia mistero !

Tio ne multe helpis al ni ! Sed mi ne rezignas kaj mi tuj montros al vi, mi esperas, post tiu enkonduko konfuza, ke la demando pri la senfineco estas ia infaneca kialo, iu antropocentrisma kialo, se vi preferas.

- Atente mi aŭskultos vian demonstradon ; ĝi tre interesos min, diris la abato kun triumfa rideto ; sed via intelekto ŝajnas ne esti hodiaŭ tiel bonstata kiel kutime, mia kara amiko, ĉar ĝis nun via argumentado estis vere tre malforta.

- Vi demandas, ĉu mi povas imagi la senlimecon de l' pasinta tempo ; sed, unue, kio estas la tempo ? diris Fabricio.

- Ha! ha! Tion mi atendis ! diris la abato. Donu al mi difinon pri la tempo, aliel mi ne povas kompreni vian demandon pri la senfineco de la spaco ! Admirinde ! Ĉu vi scias, mia kara amiko, ke por homo, kiu asertas, ke la dogmo sin ŝirmas malantaŭ subtilegaĵoj, kun la celo vanigi la atakojn de la scienco, vi mem montras grandan lerton por eviti la ĝenajn demandojn ? Ha ! vi volas difinon pri la tempo ! Peste ! vi neniel ĝenas vin ! Sed vi bone scias, ke oni ne ĉion povas difini ; necesas konservi almenaŭ kelkajn memkompreneblajn vortojn kaj kiuj servas por difini la aliajn. "Ne ekzistas difino pri la primitivaj aferoj", diris via majstro, Klaŭdo Bernar (Claude Bernard). La fama matematikisto Puinso (Poinso), al kiu amiko parolis pri la tempo, demandis lin : " Ĉu vi scias, kio ĝi estas ?" kaj ĉar la amiko ne respondis : "Nu! ni parolu pri alio", li diris.

- Ne, trankvile respondis Fabricio, ni parolu pri la tempo, se vi konsentas ; eble mi moderigos vian memfidon, vokante por helpo la timigan Similulon.

- Denove la helpanto, al kiu vi turnas vin ĉiufoje, kiam vi sentas vin kaptita per la forto de mia rezonado ; vi scias, ke mi havas malsimpation por tiu Similulo, kaj vi puŝas lin al mi atake por ŝanceli mian prudenton.

- Antaŭnelonge, komencis s-ro Tako, ni interkonsentis pri ĉi tio, ke la homo senĉese varias. Mi okupiĝas nur pri ĝia subjektivo ; mi lasas flanke la materian formon de l' korpo, kies varioj estas treege malpli videblaj por ĉiu el ni ; **Mi** estas malsimila je tio, kio mi ĵus estis kaj je tio, kio mi tuj estos. Mia vivo estas kontinua sinsekvo de diferencaj **Mi**, el kiuj ĉiu daŭras nur unu momenton ; ĝi estas, alidire, ekster la tempo. **Mi** estas

nuna kaj ekstertempa, kvankam ĝi kredas la malon.

- Mi antaŭvidas vian konkludon, diris la abato ; mi vidas vian **sinsekvon** de **Mi**, kaj mi sentas, ke vi difinos la tempon kiel sinsekvon, ne vidante, ke en la vorto **sinsekvo** jam estas la ideo pri tempo ! Difino estas **taŭga**, nur kondiĉe, ke ĝi estas farita per terminoj, el kiuj neniu ricevas helpon, rekte aŭ malrekte, de la difinenda ideo.

- Dankon, diris Fabricio ; ĉi tio troviĝas en verko de Klaŭdo Bernar ; ĝin mi legis antaŭ dudek jaroj. Mi do diris al vi, ke la vivo de homo en la tempo estas iu kontinua sinsekvo de **Mi**, el kiuj ĉiu estas ekstertempa. Ekzistus neniu ligilo inter tiuj sinsekvaj **Mi**, se ne estus la epifenomeno de l' memoro, nepra sekvo de l' fenomeno de **asimiliĝo**, kiu konsistigas la vivon laŭ la objektiva vidpunkto. Tiu memora epifenomeno fiksas, en la subjektivo de ĉiu **Mi**, la signifon de ĉiuj operacioj de la antaŭaj **Mi**. Se ne ekzistus memoro, **Mi** ne havus la nocion pri tempo ; estas **Mi**, kiu kredas la tempon per sia memoro ; nu, la memoro, sekvo de la **asimiliĝo**, karakterizo de l' vivo, ekzistas nur ĉe vivuloj ; do, ekster la vivuloj, la tempo ne ekzistas. Tio estas tute klara.

- Tion mi ne opinias, diris la abato. Mi konstatas nur, ke vi trafe maltrafe uzas esprimojn, kiuj entenas ideon pri tempo, por difini la tempon. Tio ne estas scienca.

- Mi ne difinis la tempon ! milde reis Fabricio ; mi nur celis montri al vi, ke la nocio pri tempo ne estas primitiva nocio ; ĝi estas konsekvenco de l' vivo ! Kaj mi eĉ diros al vi, ke estus absurde provi difini la tempon per la homa lingvo, **kiu estas en la tempo**. La **Mi**, kiu komencas frazon, eĉ ne plu estas la sama **Mi**, kiu finas ĝin ; mia difino pri la tempo estus eldirata de sinsekvo de **Mi**, kiu estas en la tempo kaj ne de unika **Mi**, kiu tamen havas, dank'al sia memoro, la nocion pri tempo. Necesus difino pri la tempo, kiu estus ekster la tempo, necesus ekstertempa reprezento de l' tempo ; tian difinon ni ne povas fari per la homa lingvo.

- Viaj klarigoj fariĝas pli kompreneblaj, diris la abato, sed mi ne vidas kion vi celas.

- Nur ĉi tion, respondis s-ro Tako, ke la pritempa nocio estas konsekvenco de l' vivo ; ĝi estiĝis ĉe ni per la memoro kaj ĝi estas limigita per la limoj de nia memoro, t.e. je tempo iom pli mallonga ol la daŭro de

nia vivo. La homo estas, laŭ la subjektiva vidpunkto, limigita en la tempo, kiel ĝi estas limigita en la spaco, kaj ĝi ne povas imagi tempon multe pli longan ol tiun, kiun li konas. Mi konfesas al vi, ke mia imagpovo ne faras grandan diferencon inter dekjara daŭro kaj dudekjara daŭro. La jarcentoj estas por mi ekster ĉia reprezentanto, kaj rilate al la geologiaj periodoj, ili estas same nekomprenablaj por mia kompatinda cerbo, kiel la distanco ĝis Siriuso aŭ la amplekso de la lakta Vojo. La trea granda, en la tempo, estas ekster ĉiu homa reprezentanto, same kiel la trea granda en la spaco.

"Sed ĉefe, kaj tion mi aparte volis rimarkigi al vi, ĝi estas, ke nia **Mi** estas ekstertempa, nuna, kaj pri tio ne konscias pro sia memoro, kiu donas al ĝi nocion pri tempo ; ĝi estas ĉiam la iluzio, kies viktimo estas tiu kompatinda **Mi**, kiu donas al ĝi kredon pri ĝia senmorteco, kaj kiu starigas por ĝi la demandon pri la senfineco en la tempo kaj pri la senfineco en la spaco. Ĉu do vi ne komprenas, ke tiaj demandoj estas antropocentristaj kialoj ?

- Pardonon, diris la abato, vi ĵus parolis al mi pri la tempo kaj, ne tuj konsentante pri tio, kion vi ĵus diris al mi, mi bezonas tempon por pripensi la aferon ; sed de la senfineco de l' tempo vi konkludas al la senfineco de la spaco, kaj tiurilate mi kontraŭdiras.

- Vidu, diris s-ro Tako, kiel brilas la maro malantaŭ la insulo Granda ! La tuta golfeto aspektas kiel granda lago ora, kaj la insulo d' Aval ŝajnas talpujeto sur tiu preskaŭ blindige brila fono.

- La spektaklo estas tre bela kaj ripoziga, diris la abato ; cetere, mi forte ekamas vian dezertan golfeton ; ĝiaj tiel variaj aspektoj senĉese prezentas al mi neatenditajn belaĵojn ; oni ĝuas ĉi tie agrablegan pacon.

- Taŭga por filozofiaj interparoloj, ĉu ne ? intermetis Fabricio.

- Mi konfesas, ke filozofia diskutado estas agrabla en tiu bela pejzaĝo malgajaspekta. Cetere, mi pensas, ke ĝi ne kontraŭas la maraeran kuracadon, kiun ordonis al mi la kuracisto.

- Certe, diris s-ro Tako ; la senokupa intelekto volonte tendencas akcepti malgajon, kaj nenio estas pli malprofita al la resanigantoj. Ĉu vi vidas, kiel la pinto de l' kokejo strange kontrastas kun la ora fono de la golfeto ?

- Laŭ mi, ĝi siluetiĝas sur la insulo, respondis la abato; mi sidas je du metroj for de vi.

- Restu ĉe via sidilo, diris Fabricio. Mi intencis nur rimarkigi al vi, ke la pinton vi ne vidas tie, kie mi ĝin vidas. Ĉu vi kredas, ke Dio ĝuas la belon de l' spektaklo, kiu ravas nin ambaŭ nunmomente ?

- Dio ĉion vidas, respondis la abato.

- Tion ja instruas la katekismo, reis s-ro Tako : "Li estas ĉie, vidas ĉion kaj konas eĉ niajn plej intimajn pensojn." Ĉu tiel ?

- Mi bedaŭras, ke malgraŭ via perfekta scio pri la instruaĵo el la katekismo, vi tiom malmulte profitas de ĝi, diris la abato.

- Do, Dio vidas ĉion ; konsentite ; sed, rilate la nunan kazon, kiel li vidas nian pejzaĝon ? Ĉu li vidas ĝin kiel mi aŭ kiel vi ? Ĉu li vidas la pinton de l' kokejo siluetiĝi sur la maro aŭ sur la insulo ?

La abato momente hezitis.

- Li vidas ĝin kiel mi, li vidas ĝin kiel vi, li estas en ĉiu el ni, fine estis lia respondo.

- Tio ŝajnas al mi tre malfacila, reis Fabricio, ĉar fine, se li vidas la pinton de l' kokejo kontraste brili sur la maro, li ne vidas ĝin sur la insulo. Tio estas kontraŭecaj aferoj. Kaj rimarku, ke, sen ia ŝanĝo en la regiono mem, sufiĉas, ke mi iom promenu, por ke la aspekto, laŭ kiu mi ĝin vidas, aliĝu senfine ; ekzistas tiom da diversaj vidaĵoj, kiom estas da punktoj en la spaco ; vi supozu, ke cent mil homoj troviĝas ĉirkaŭ la golfeto ; ĉiu el ili vidos malsaman golfeton, malsaman pejzaĝon. Laŭ kiu aspekto Dio vidas ĉi tiun pejzaĝon ? Ĉu li vidas ĝin samtempe laŭ mil malsamaj kaj kontraŭecaj aspektoj ?

La abato silentis kaj ŝajnis profunde absorbita.

- Kiel povas esti, ke vi ne meditis pri tio ? diris s-ro Tako ; mi konsilas, ke vi pripensadu tiun gravan demandon, al kiu mi ne scias, ĉu la koncilioj donis definitivon. Vi rigardu ĉi tiun formikon, sur tiu folio de trifolio, apud tiu ega guto da roso ; ĝi sendube vidas en tiu klarega sfero ĉiujn ravojn de l' ĉielarko ; ĝi eble admiras la belbrilegecon de la verko de l' kreinto ! Ĝi ĉirkaŭiru la guton kaj ĉio malaperos !

"Ĉiuvespere ni admiras la sunsubiron al la maro. Ĝi havas ruĝajn kaj violajn nuancojn, akve verdajn makulojn kaj orangkolorajn striojn. Kial tio okazas ? Tial ke la

radioj, kiuj trafas nian okulon, renkontis, super la maro, kelkajn flokojn el akva vaporo. La suno estas ruĝa ! ni diras ; tio ne estas vera : vi vidas ĝin ruĝa, tial ke ni troviĝas en tiu eta loko, kien ĝiaj radioj trafas tra la nebulo. Ĉu Dio vidas tiun sunsubiron ? Sed en iu loko en Ameriko la suno levigigas nunmomente ; en alia loko ĝi kuŝas ĉe la zenito ; por tria loko ĝi malaperis kaj regas la nokto. Kiel Dio vidas sian kreaĵon ? Kie li observas ?

"Kaj la insulo d' Aval, kiun ni vidas malhela ĉe tiu lumanta fono, la homoj de la Granda Insulo vidas ĝin ruĝa sub la fajro de l' subiranta suno ; la fluganta birdo vidas ĝin elsupre duon-ruĝa kaj duon-ombra meze de la kvietaj maro. Ĉu vi neniam pripensis, ke ĝi estas la homo, kiu kreas la pejzaĝon ?

- Kion vi volas pruvu al mi ? kion vi celas ? diris fine la abato.

- Mi volas, ke vi pensadu pri la antropocentrismo, respondis s-ro Tako. Sendube vi aŭdis paroli pri la konsisto de la lumo ; vi scias, ke lumanta punkto havas transversajn vibrojn, kiuj komunikas sin al la etero kaj transumas iom post iom foren, dum ilia intenso malpliĝas kun la distanco ; vi scias, ke, laŭ la koloro de la lumanta punkto, la nombro de tiuj vibroj varias de ses cent ĝis sep cent trilionoj, ĉirkaŭe, en ĉiu sekundo ; pensu, ke ni vidas tiun admirindan pejzaĝon, nur ĉar ĉiu el la punktoj de la regiono antaŭ ni kuŝanta vibradas je miriga rapideco kaj eligas konstante vibrojn, ĉiudirekten, en la ĉirkaŭanta etero. Mi ne povas pensi, sen teruro, pri tiu neimagebla nombro da senĉesaj vibroj ; mi timas frenezigi ĉe la konstato de mia nekapablo kompreni tion tiom naturan. Kaj tamen mi scias, ke mi vidas la pejzaĝon nur pro tio, ke mia okulo perceptas, en iu eta loko de l' vastega spaco, ĉiujn lumajn vibrojn, el kie ajn ili venas ! Mia okulo estas eta fenestro, tra kiu tiu tuta kaoso el vibraj moviĝoj impresas mian subjektivon ; estas mi, kiu kreas la pejzaĝon tia, kiam mi vidas ĝin. Ĉar reale kio estas en ĉi tiu regiono, ĉirkaŭ mi ? Bilionoj kaj bilionoj da molekuloj, el kiuj ĉiu plenumas sian pendolan movon treege rapidan ; ĉiu molekulo vibras por si mem ĉirkaŭ sia ekvilibra pozicio, kaj ĝia movo pelas la najbaran molekulon, kiu siavice vibras, ktp. El ĉio tio mi ricevas la impreson pri admirinda pejzaĝo ; sed neniigu min : ne plu estos unuaĵo, sintezo,

unuverte ne plu estos spaco. Por ĉiu molekulo ekzistas nenio ekster ĝia propra movo vibra ĉirkaŭ ĝia ekvilibra pozicio. Por Dio, kiu estas ĉie kaj nenie pli aparte ol alie, ekzistas nur vibrantaj molekuloj ; ĝi estas timiga kaoso !

- Efektive, diris la abato, tiu simpla konstato pri la treege granda nombro da fenomenoj, kiuj okazas en iu eta punkto de nia tergloba, estas io terura. Nur Dio povas mediti pri sia verko ; ĝi estas ekster la homa komprenkapablo.

- Nia analizo tamen penetras ĝin, respondis Fabricio, kvankam la sintezo timigas nin. Sed kia ravo, en nia humilo, estas senti, malgraŭ ĉio, ke ni estas kreantoj de ĉio, kio estas bela kaj nin emocias ! Nia universo estas en ni mem, mia kara amiko, kaj nur en ni ; kaj se ni ne povas koncepti la senfinecon de l' mondo, tio estas tial ke la sola mondo, kiun ni konas, estas tiu, kiun ni kreas en nia subjektivo ; sed el la kaoso ni tiras mirindaĵojn. Ĉu vi memoras pri malproksima kaj rava valo, kie, iam, sola kun vi mem, vi ĝuis la puran admiron de la kampaj belaĵoj ? Koncerne min, ŝate mi penas memori tiajn pasintaĵojn, kaj ili estas saturitaj per ia malĝojo, tial ke tiuj belaĵoj ne plu ekzistas ! Estas mi, kiu kreis tiun valon kaj ties ĝuigajn aspektojn ; nun eble neniu trairas ĝin ; tie estas nur konfuza amaso da vibrantaj molekuloj, el kiuj ĉiu ne konas sian najbaron. La nocion pri spaco, granda, ni mem kreas, ĉar, ekster vivulo, ĉiu molekulo ne konscias pri ekzisto de ĉiuj aliaj ! De ĉi tie ĝis tie estas du metroj, ĉu ? Ni foriru, kaj poste ekzistos nur du disigitaj punktoj kaj ĉiu estas sola en la mondo. La vivo, kiu havigas al ni nocion pri tempo pro nia memoro, donas al ni spacan nocion, firmigante unikan subjektivon ĉe tutaĵo el molekuloj, okupanta ioman spacan. Mi diras : la **vivo** kaj ne la vivo de l' homo, ĉar nocio pri spaco kaj tempo ekzistas ĉe la hundo, ĉe la lacerto, ĉe la ostro ! Ĝi estas la vivo, kiu kreis la tempon kaj la spacan en la subjektivo de l' vivulo kaj nur tie ; la vivulo estas limigita, la tempo kaj spaco, kiuj estiĝas en ĝi, estas limigitaj, ni ne povas imagi la senfinecon, sed ni inventis vorton por diri : "tio, kio ne estas finita, **tio, kio ne estas kiel la aferoj, kiujn ni imagas**", kaj ni pene cerbumadas pro tiu vorto, kiu, laŭdifine, reprezentas tion, kio estas ekster la animala komprenpovo, ekster la

subjektiva sintezo !

"Kiu volas pensi pri la senfineco, tiu celas eliri el sia homa naturo, tiu volas esti mevo aŭ pliguste giganto, kiu mem ne estus finita. La senfineco estas **vorto**, kiun ni kreis por nia propra sufero, sed kiom da homoj estas feliĉaj pro la ekzisto de tiu vorto, pri kiu dumvive ili diskutaco. **Vortoj ! Vortoj !**

- Kara amiko mia, serioze diris la abato, vi ĵus donis al mi mirindan pruvon pri la ekzisto de Dio !

- Kiel povas esti ? vive demandis Fabricio. Ĉu montrante al vi, ke la emblemoj, per kiuj vi ornamaĉas tiun **vorton**, estas mem nur sensencaj vortoj ? Via neŝanĝebla kaj ĉiea Dio estus nek en la tempo, ĉar li estas neŝanĝebla, nek en la spaco, ĉar li estus ĉie, kaj ke esti ĉie, tio samsignifas kiel esti nenie. La belaĵoj de l' naturo, per kiuj vi ĉiutage vidas la gloron de l' kreinto, estas ni, kiuj kreis ilin, ĉiu por si mem. Dio ne vidus ilin, ĉar li estas ĉie. Vi provizas lin per inteligento el la sama speco kiel tiu de l' homo, sed pli granda, multe pli granda, forgesante, ke la homa inteligento rezultas de l' vivo kaj de ĝia senĉesa variado ; nevariebla estulo ne povas esti naturdotita ja kapablo, kiu rezultas de l' variado. Ĉiuj viaj klarigoj pri Dio estas nur vorta ĵonglado ! Necesas esti limigita, finita, por havi nocion pri spaco, kaj vi favore atribuas ĝin al estulo, kiun vi samtempe provizas per kontraŭaj ecoj : senfineco spaca kaj senfineco tempa. Kompatinda cerbo homa !

- Dio estas nesondebla mistero por la homo ; pro nia malgravo ni ne povas imagi lian belbrilegecon, diris la abato.

- Ni ne povas imagi, ke li ekzistas, kaj ni devas kredi je li kaj lin ami ! Ĉu do vi ne komprenas, ke la esprimoj : "Mi kredas je Dio ! mi amas Dion per mia tuta koro!" estas nur vortoj ? Kiel eblas ami estulon, kiun oni ne povas imagi ? Sed tiaj formuloj plaĉas, kaj vi promesas eternajn rekompencojn al tiuj, kiuj senkomprene konsentas ripeti ilin. Kaj plej miriga estas tio, ke ili kredas kompreni tiujn kabalajn formulojn ! Dum la mezepoko, oni brulmortigis tiujn, kiuj eldiris magiajn vortojn... **Beati pauperes spiritu !** Necesas ne provi kompreni, ke oni ne komprenas !

- Via orgojlo frenezigos vin, mia kompatinda amiko, diris la abato.

- Se la rifuzo kredi la malon de tio, kio estas evidenta, konsistigas orgojlon, mi ja estas riĉa je ĝi, diris Fabricio. Se la komprenemo signifas frenezon, mi ja estas freneza ! Sed ni ne plu okupiĝu pri tiu Dio, kiun la homo kreis per vortoj, kaj ĝuste per vortoj, kiujn ĝi ne komprenas. Cetere, mi ne intencis paroli pri tio ; mi nur volis instrui al vi, kiel stari iajoje ĉe absoluta vidpunkto, ekster la antropocentrismo. La matematika lingvo estas la sola, kiu tion ebligas kaj, bedaŭrinde, vi ne lernis tiun lingvon, ekster kiu scienco ne ekzistas. Ni povas paroli nek pri la tempo, nek pri la spaco, ĉar ni estas en la tempo kaj la spaco, sed la matematiko ebligas al ni eliron, se tiel oni povas diri, el ili kaj tiam rezoni, kvazaŭ ni ne estus homoj. "En la fizikaj sciencoj troviĝas vera scienceco nur en tio, kio estas en ili matematika", diris Kant. Ekster la matematika lingvo ekzistas nur dusencaj vortoj aŭ, kio estas pli bedaŭrinda, vortoj, kiuj havas nenian sencon. Sed jam de kelka tempo filozofoj distris sin, difektante la admirindan verkaĵon de l' matematikistoj, rezonante pri ĝia mekanismo per la ordinara lingvo ; kiom abunde oni skribis pri la matematika senfineco ! Kaj kial ? Ĝuste tial, ke en matematiko neniu incita demando stariĝis pri la senfineco. Sed necesas, ke homoj malprudente parolu por pasigi la tempon. Tion ni mem faris, kaj mi eksentas kapdoloron.

- Vi almenaŭ sukcesis pruvi al mi, ke mi devas konsideri Dion kiel la idealan matematikiston. Mi ne malŝatas tian konkludon, diris la abato.

S-ro Tako gestis malespere.

- Ni iru, li aŭdigis ; estas la ĝusta tempo, por ke ni revenigu la kokinon kaj ŝian kovitaron ; en la regiono estas vulpoj, kaj la nokto estas favora por la krimuloj.

FINO

ALEN
(ALAIN)

DUBI (el "Sennaciulo", maj.1929)

LA CERBO KAJ LA STOMAKO
(el "Sennacieca Revuo", dec.1933)

LA RAJTO KAJ LA PERFORTO
(el "Sennacieca Revuo", jan.1934)

LA RAJTO (el "Sennacieca Revuo", feb.1934)

AGI LAŬPENSE, NE LAŬSTOMAKE
(el "Sennacieca Revuo", mar.1934)

NE FORGESU LA IDEON
(el "Sennacieca Revuo", apr.1934)

LA EGALO KAJ LA RAJTO
(el "Sennacieca Revuo", maj.1934)

MATERIALISMO - SPIRITUALISMO
(el "Sennacieca Revuo", jul.1934)

KIO BELIGAS LA HOMAN VIVON ?
(el "Sennacieca Revuo", aŭg.1934)

El la franca tradukis : **Herezulo**

DUBI

La intelekta libero, aŭ Saĝo, ĝi estas la dubo.

Ordinare tio ne estas bone komprenata. Sed kial ? Tial ke ni konsideras kiel dubemulojn homojn, kiuj pensas kvazaŭ ludante, sen obstino, sen sekvo ; tiaj homoj estas nur mallaboremuloj. Dubi, ĝi estas ekzameni, ĝi estas malmunti kaj remunti la ideojn, kvazaŭ ili estus radaroj, sen antaŭjuĝo, sen trorapidjuĝo, celante forigi la kredemon, kiu estas potenca en ĉiu el ni.

Oni maljuste prijuĝis Montenj (Montaigne) kaj sendube pro tio oni ne sufiĉe legas liajn verkojn. Kaj laŭ kio oni juĝas lin ? Laŭ lia "ĉu mi scias?", kiu tute ne estas lia lasta vorto, sed kiun li nur proponas al tiuj, kiuj volus dubi pri ĉio pro sofisma ludo, kiel la malplej aserta formulo. Kaj laŭ tio, ke la dubo estas ia "mola kapkuseno por bone farita kapo". Sed tiuj du formuloj tre malbone prezentas unu el la plej viglaj pensuloj, kies verkoj estas legeblaj. Pro kio ? Pro lia tuta sincero, ŝajnas. Li estas homo, kiu vere pensas, ne por aliaj, sed por si mem, kaj kiu faras la inventaron de siaj pensoj, kiu pesas ilin, kiu prilaboras ilin, kiu metas ilin en la fajron de l' kritiko, sen indulgo, sen respekto. Kiam oni atente legas ilin, oni komprenas, kiom da homa forto estas necesa por dubi. Dubi estas penega laboro, kiel forĝi.

Renuvje (Renouvier), forta pensulo ankaŭ, sed pli abstrakta, malpli natura, malpli forĝista en sia maniero, faris rimarkon tre simplan, sed tre trafan, ĝi estas, ke frenezulo neniam dubas. Frenezulo estas homo, kiu kredas ĉion, kion li imagas. Tiu stato, kiu ŝajnas al ni monstra, tiom fremda al ni, ne tiom mirigus nin, se ni pensus pri la varieco kaj nekonsekvenco de niaj revadoj kaj sonĝoj. En dorma stato ni ĉion kredas. Kion signifas vekigi kaj rekonsciiĝi ? Ĝi estas forĵeti kredojn. Ĝi estas diri : ne. Ĝi estas pensi kontraŭ la ideon, kiu sin prezentas. Ĝi estas dubi.

La timo estas animala sento tre forta. Kaj kion ĝi liveras al ni ? Tujan kredon. La timo estas tiranece

aserta. Mi timas lupon, mi ĝin vidas, mi forkuregas ; ju pli mi kuras, des pli mi kredas ; mia forkuro valoras pruvon. Ĉe ĉiu dogmemulo ekzistas io simila. Li asertas, li ekbatalas, li kuras. Li sin ĵetas sur ideojn per sia tuta pezo, kiel hundo surleporon. Tia pasio faras la oratoron ; ĝi estas danĝera speco, tro admirata. Esti emociita, kriadi, kredi, ĉio tio ĉi estas animala. Montenj kuraĝis skribi jenon : "La obstinado kaj ardo de opinio estas plej certa pruvo pri stulto. Ĉu estas io pli certa, pli decida, pli malŝata, pli meditaspekta, pli malpetolema, pli serioza ol azeno ?" Kaj ne eraru pri la rideto ; ĝi estas la rideto de atleto, kiu levas halteron.

LA CERBO KAJ LA STOMAKO

Estas dialogo de Platono, kiu nomiĝas "Gorgiaso" kaj kiun ĉiu povas legi. Oni trovas en ĝi la esencon el tio, kio troviĝas ĉe Niĉe (Nietzsche), kaj ankaŭ la rebaton de la simpla saĝo kian oni povus ĝin fari nun, se oni volus revarmigi tiujn, kiujn Niĉe frostigis. Tiuj homoj pensis kiel ni kaj pli bele parolis.

Do en tiu dialogo estas iu Kalikleo, kiu mokas la juston kaj kantas ian himnon al la perforto. Tial, li diras, ke estas la fitimemuloj, kiuj elpensis la juston, por ĝui la pacon ; kaj estas la naivuloj, kiuj adoras tiun timon kun aspekto de justo. En realo, neniu justo devigas nin al io. Nur la malkuraĝo kaj la malforto devigas nin ; tial la kuraĝulo kaj fortulo havas ankaŭ la rajton.

Kiom da Kalikleoj hodiaŭ kantas al ni la saman kanton: la laboristo havas nenian rajton, ĉar li ne havas la forton; kaj la mastro kaj liaj kunhelpantoj havas ĉiujn rajtojn tiom longe, kiom ili havas nepridubeblan forton ; kaj iu socia stato estas nek pli nek malpli bona ol alia, sed ĉiam profita por la pli fortaj, kiuj, pro tio, nomas ĝin justa, kaj ĉiam malprofita al la malfortaj, kiuj, pro sia malforto, nomas ĝin maljusta.

Tiel parolis Kalikleo ; mi apenaŭ ŝanĝas la vortojn.

Kiam li estis eldirinta tiun fulme teruran parolon, ĉiuj faris kiel vi farus nun, se tiaj interparoloj refariĝus laŭmodaj. Ĉiuj ekrigardis al Sokrato, tial ke ili supozis

sen ia dubo, ke li havis alian komprenon pri la justo ; kaj ankaŭ pro tio, sendube, ke oni vidis lin diri "ne" per kapmovo ĉe kelkaj diroj de la parolanto. Li silentis dum relative longa tempó, kaj trovis jenon por diri : "Ci forgesas unu aferon, mia kara, ĝi estas, ke la geometrio havas grandan potencon ĉe la dioj kaj la homoj".

Kaj pri tio mi diros, kiel la ŝakludantoj : "Brave! ĝi estas la ĝusta ludo".

La tuta demando kuŝas tie. Tuj kiam oni vekis la Racion, per geometrio kaj per alio el sama speco, oni ne plu povas vivi nek pensi kiel se oni ne estus ĝin vekinta. Oni devas atenti sian cerbon same kiel sian stomakon. Kaj se la stomako forprenas de la najbaro la panon, ĝin manĝas kaj kontente digestas, ne pro tio la cerbo devas esti kontenta. Eĉ, rimarkinde, kiam la stomako pleniĝis, la Racio ne dormas pro tio ; tute male, jen ĝi estas pli klarvida ol iam, kiam dormas la deziroj kuŝantaj mikse unuj sur aliaj kvazaŭ lacigita hundaro. Jen ĝi diligentas kompreni tion, kio estas la homo, kaj socion el homoj, justajn interŝanĝojn kaj maljustajn, ktp : kaj ankaŭ tion, kio estas saĝo kaj animtrankvilo kaj ĉu tio povas esti alio ol ia moderiĝo de ekvilibras deziroj, ia idealo fine, kiu ne estas alio ol la rajto kaj la justo. El tio sekvas, neeviteble, ke la rajto de la riĉuloj iras samdirekte kiel la deziro de la malriĉuloj. Tio estas eble la plej granda homa fakto.

Rilate tiujn, kiuj rebatas pri tio, ke la racio originas de la sperto, kiel la cetero, kaj de la profitemo, kiel la cetero, ili tamen ne povas ŝanĝi la fakton, ke la racio ne agas kiel la stomako. Tial ke la okulo ne estas la brako, kvankam ambaŭ estas filoj de la tero.

LA RAJTO KAJ LA PERFORTO

La Rajto kaj la Perforto ne kontraŭas unu al la alia ; ili estas du neintermikseblaj konoj. Kiam knabo pli aĝa kaj pli forta ol alia forprenas liajn ludglobetojn, ŝajne li neniigas la rajton de la pli malforta ; sed tio estas nur ŝajna ; tiu perfortaĵo ŝanĝas nenion en la rajto ; la juna perfortulo estas posedanto de la globetoj ; li ne estas ties proprietero (laŭrajta posedanto). Se nun la plejaĝa

frato prenas sur sin la defendon al sia frato kaj rehavigas al li liajn globetojn, post kiam li batpunis la ŝtelisteton, la aferoj estas remetitaj en ordon ; sed la ordo mem ne estis tuŝata ; estis ĉiam vere, ke la globetoj apartenis al la malpliforta.

La rajto estas iu opinio, iu juĝo, iu penso. La bataloj por aŭ kontraŭ iu rajto estas bataloj por tezoj kaj argumentoj, antaŭ arbitracianto, kiu decidas. Necesas pruvoj, ne pugnobatoj. Al tio oni ofte kontraŭdiras per mencio pri validlimo, laŭ kiu tridek jaroj da nepridiskutita posedado donas posedrajton. Sed vi bone rimarku, ke ne estas la perforto, kiu fondas tiun rajton ; ne temas pri posedado tenita per ĉiaj rimedoj, sed pri publika nepridiskutita posedado ; ĝi estas tiu malesto de plendoj, kiu pravigas la rajton. Oni supozas, ke se, dum tridek jaroj, neniu havis ŝajnon da motivo por kontraŭmeti al la posedanto antaŭ juĝisto, tiuj, kiuj elstarigis poste, havus postulojn, pri kiuj estas neeble kontroli. Ne estas do la pervenka posedo, kiu starigas la rajton, sed la posedo ne atakita per argumentoj kaj motivoj.

Oni diras ofte, ke la rajto de la unua okupanto rezultas de la konkero kaj de la perforto. Sed ĉi tie regas evidente konfuzo en la ideoj. La unua okupanto ja ne estas pli forta ol alia aŭ ol dek aliaj. Male, estas tute nature, ke tiu, kiu okupas kaj kulturadas, estas pli malforta ol tiu, kiu minacas lin kaj faras el la milito metion. Kaj temas pri rajto, t.e. pri opinio, pri juĝo ; sen tio la unua okupanto havus rajton nur se li povus perforte ĝin teni. Kaj, kiel diras J.J. Ruso (Rousseau), la rajto aldonus nenion, la rajto signifus nenion. La rajto de la okupanto supozas, ke arbitracianto decidis per pravigoj, ke la okupado estis reala, atestata per laboraĵoj kaj ĉirkaŭbariloj, firmigata per la kutimo kaj la moro, t.e. per jam longa praktikado ; kaj per tiuj pravigoj, post debato, estas decidite kaj deklarite, per komuna interkonsento, ke tiu posedo estas aprobita kaj denun garantiata, komprenu per tio, ke nova kontraŭstaranto devos alporti novan pravigon. Tiel, kion mi povas postuli sub la nomo rajto, tio estas lojala aprobo, konforma al promesoj. Kaj kio kontraŭas la rajton, tio estas la trompo, la malsincero, la mensogo. Oni atakas la rajton, kontraŭdirante

antaŭ arbitracianto ; oni perfortas ĝin per malsinceraj neoj, per mensogaj ĵuroj, per falsaj asertoj. Sed la forto per si mem estas nur granda aŭ malgranda ; nekontraŭstarebla, kontraŭstarata de alia, aŭ subpremata. Nenia eraro eblas. Ruliĝanta ŝtono ne eraras ; ĝi frakasas tion, kion ĝi frakasas.

LA RAJTO

La rajto havas du specojn de defendantoj, tiuj, kiuj ĝin respektas kaj tiuj, kiuj ĝin malestimas. Depost kiam ekzistas homaj socioj, ĉiam troviĝis kelkaj saĝuloj, kiuj difinis la rajton kiel idealan leĝon, kiu regus en iu civito el prudentaj homoj. Poste, ekrigardante al la reala civito kaj ĉirkaŭ si, ili malfacile povis distingi, en tiu interpuŝiĝo el deziroj kaj malamoj, ian ombron da rajto. Tial ili ĝemis. Kaj aliaj ĝemos ankoraŭ estonte.

Dume, la sangavidaj brutoj metis, pro neceso, iom da ordo en siajn batalojn ; ili formis daŭrajn aliancojn, obeis al siaj ĵuroj, por esti pli fortaj, kaj sin oferis al siaj patrioj, por konkeri la patrion de la najbaro. Tiel la virto naskiĝis tie, kie oni malplej atendis ĝin, dank'al la aksiomoj : la unuigō faras la forton ; la fidelo faras la unuigōn ; la fidelo postulas forgeson pri si.

Stranga afero, la homoj kapablis esti maljustaj kontraŭ la fremdulon, nur kondiĉe, ke ili estu justaj inter si. La Romanoj estis potencaj konkerantoj nur pro tio, ke ili sin dediĉis al la komuna afero kaj religiece obeis sian leĝon. Tial ilia perforto trenis post si la rajton ; kaj oni povas diri, ke ili alportis ian juston ĉe la pinto de siaj lancoj.

Tiel, pro la efiko de brutaj fortoj, la homoj fariĝis pli virtaj ; ili lernis la arton pri paco samtempe kiel la arton pri milito. Tiel ĉiam estis, kaj tiel estos ĉiam ; la pli justa el la popoloj, la nombro da individuoj estante la sama, estos ankaŭ la plej forta. La homoj perfortos la rajton, sed kondiĉe, ke ili unue ĝin respektu. La civitoj adoras iun brutan Saĝon, iun Minervon por milito armitan. Kaj tio estas stranga kaj necesa fenomeno, kiun mi nomas Progreso. Tial mi kredas, ke alvenos la regado de l' Rajto : la Justo kaj la Forto puŝas nin al ĝi.

AGI LAŬPENSE, NE LAŬSTOMAKE

Ĵu sofisto diris al mi : "La justo estas nur vorto. Ekzistas nur kutimoj. La kutimo de l' plejmulto estas justa tiom longe, kiom ĝi estas la kutimo. Tion vi ne povas nei ; la faktoj kontraŭdiras vin. Vi respektas viajn gepatrojn ; vi sekurigas al ili, tiom kiom vi povas, trankvilan maljunon ; vi diras, ke tio estas justa. La sovaĝulo kuiras sian patron kaj lin manĝas, por loĝigi la patran animon en pli junan korpon ; li diras, ke tio estas justa ; alia diras, ke la monarkio estas justa. Mi diras, estas justa tio, pri kio oni ĝenerale interkonsentas ; ĉia socia stato, tiom longe, kiom ĝi daŭras, estas sekve justa. Pro tio mi konsilas al vi, Alen, ne ekscitiĝu pri la principoj."

Sen ekscitiĝo ni do ekzameni tiun argumenton, kiu treniĝas ĉie, la argumenton per la sovaĝulo, kiu manĝas sian patron. Ni akceptu ĝin kiel fakton, tiun sovaĝulon, embuskintan en libroj. Kion pruvus tio ? Ke la ideo, kiun li havas pri justo, pri la virto kaj pri ĉiuj samspecaj aferoj, ne estas tiom malsama de la nia. Ĉar, tion bone rimarku, se li manĝas sian patron (kia friponeta knabo), ne estas pro plezuro ; se li manĝus lin pro plezuro, aŭ pro neceso, li ne dirus, ke li agas bone. Pro ia motivo li manĝas sian maljunan patron kaj, kiel vi diris, por doni en sia propra interno azilon al la animo de sia maljuna patro malkomforte loĝigata en kaduka korpo. Nu, mi diras, ke la tuta homa virto estas tie koncentrita. Ĉar li penas agi pro kialo, ne pro pasio ; kaj li diras, ke tio estas justa kaj laŭdinda ; ni diras same. Ni nur pensas, ke tiu sovaĝulo eraras pri tio, kio estas saĝo, kaj ke per instruado ni povus fari el li duontaŭgan civitanon, se li nur obeus la belan regulon, kiun li misaplikas : agi laŭ sia penso, ne laŭ sia stomako.

Nun, kiam la argumento falis teren, ni pripensu ankoraŭ pri tiu sovaĝulo, kiu manĝas sian patron. Ĉu ridindaj ne ŝajnas al vi tiaj argumentoj ? Kie oni trovis tiun sovaĝulon ? Ĉu ni direktos niajn morojn laŭ anekdotoj de misiisto ? Tio estas nur rakontoj laŭ rakontoj. Por bone vidi la faktojn, necesas jam havi potencan intelekton. Vidi ilin tra la okuloj de aliulo, tio estas stultaĵo ; pro tia metodo mi malfidas al pastroj ; nu, ni malfidu la pastr-ecan spiriton ĉiurilate. Mi sekve neas la fakton.

Sed eĉ se mi konsentus pri la fakto, kiu do estas sufiĉe komprenpova por reiri de la faktoj al la moroj, en lando, kie li ne naskiĝis ? Ni promenigas grasan bovidon. Ĉu la fremdulo ĝuste konkludos, dirante, ke ni ĝin adoras ? Ni havas bordelojn. Ĉu la fremdulo ĝuste konkludos, dirante, ke tiu sklaveco ŝajnas al ni natura kaj bona ? Oni duelas ĉe ni. Ĉu vi konkludos el tio, ke ni staras ankoraŭ je la juĝo de Dio* ? Ne. Mi lasas ĉiujn tiujn rakontojn pri sovaĝuloj al la historiistoj pagitaj de la riĉuloj. Kaj se ĉi tiuj lastaj ne povas trankvile veturi en siaj aŭtoj, ne estante kvazaŭ per opio dormigitaj, mi kompatas ilin. Ili pagas sian lukson pli kare ol ĝi valoras.

NE FORGESU LA IDEON

La sofisto rebate argumentis. Li diris al mi : "Kio estas, tio estas ; kio ne estas, tio ne estas. Mi pretendas direkti miajn agojn laŭ tio, kio estas, kaj ke ĉiu homo devas fari same, se li ne estas iom freneza. Kiam ĉarfaristo konstruas veturilon, li ĝin konstruas el la ligno, kiun li havas kaj el la fero, kiun li havas. Per unu vorto, estas la faktoj, kiuj decidas pri la moralo kiel pri la cetero. Tio estus evidenta por vi, se vi ne estus infektita, nekonscie, de teologio. Ĉar via Ideala Justo, ĝi estas ne alio ol ia maskita Dio. Mi do diras, ke ekzistas monarkia Justo, kiel ekzistas respublika justo."

"Kaj per tio, mi diris al li, vi pravigos ankaŭ ian ajn papon, tiom longe, kiom li estos papo, kaj an ajn punbrulejon, tiom longe, kiom tie la fajro ardas. Ĉar, tio estas rimarkinda, kiam homo ne plu kredas je la Justo, li kredas je ĉio cetera ; la Eklezio estas la rifuĝejo por la ateistoj. Sed ne skuu la kapon ; mi ne donas al vi insultojn anstataŭ pravigoj. Mi reprenas vian ekzemplon. Kiam ĉarfaristo faras radon, li ĝin faras tiom ronda, kiom li povas. Se mi demandas al li, kio estas rondo, li respondos, ke la rondo estas tio, en kio ĉiuj distancoj estas egalaj de iu centro. Kaj ke, farante sian radon, li penas fari ĝin kiom eble plej ronda, t.e. kiel eble plej simila al tiu egaldistanco de iu centro. Kaj ju pli la rado similos tiun perfektan rondon, des pli ĝi estos rado."

"Sed, diris la sofisto, tion li faras, rimarkinte, ke la plej ronda rado estas ĝuste tiu, kiu plej bone ruliĝas kaj

* Vd. piednoton de p.132.

skuas malplej la veturilon, kiu malplej eluziĝas, kiu plej bone portas la plej pezajn ŝarĝojn. Estas la sperto, kiu instruis lin."

"Nu, mi diris, kiu dubas pri tio ? Sed restas la fakto, ke li havas la ideon pri perfekta rondo kaj ke li tre bone scias, kio tio estas. Tial li ekrigardas al tiu perfekta rondo kiel al modelo, kiam li faras sian radon. Nu, tio ĝuste estas la demando, mia kara ; tiu perfekta rondo ne ekzistas kaj neniam ekzistos ; ĝi estas tio, kion mi nomas Ideo. La homoj havas Ideojn. Tiaj ili estas ; kaj oni devas konsideri tiun fakton. La ĉashundo havas longajn orelojn, kiuj pendas ; la bovo havas piedon du parte fenditan ; la ĉevalo havas senfendan piedon ; la homo havas Ideojn ; li estas eĉ, tiom, kiom oni povas pri tio scii, la sola animalo, kiu havas Ideojn. La historio de la Sciencoj estas nur la historio de Ideoj tre pene elpensitaj, de kiuj rezultas ĉiuj Inventoj, kiuj faras, ke la homo regas sur ĉi tiu planedo."

"Nu, mia kara, mi diris al la sofisto konklude, se vi esperas, ke la homo forlasos tiujn mirindajn ilojn, ĝuste kiam li celas elpensi loĝindan civiton, vi eraras. Kiel ekzistis pli malpli delikataj radoj, kiuj knaris de eksalto al eksalto, tiel same ekzistis maldelikataj justoj justaj iasence, maljustaj alisence ; kio okazigis, ke kelkaj saĝuloj serĉis, kia egalo povus igi ilin pli justaj kaj tute justaj. Kaj ekzemple, ekkonstatinte, ke iun kontrakton igas pli maljusta la malklero, aŭ la malforto de unu el la kontraktantoj, ili formis al si ideon pri justa kontrakto, difinita per la egalo de la scioj kaj de la fortoj, kaj, de post tiu tempo, ili direktas sian rigardon al tiu perfekta kontrakto, kiu ne ekzistas, kiu neniam ekzistos ; kaj ili prenas ĝin kiel modelon, maltime dirante : la sklaveco estis maljusta, la servuteco estis maljusta kaj simile pri aliaj aferoj. Mia kara, vi, kiu ŝatas bone priskribi, kiam vi priskribos la homan animalon, ne forgesu la Ideon. Jen ĝi estas la unego de l' homo kaj lia bleko."

* En Francio de la X-a ĝis la XII-a jarcentoj la liberaj homoj kaj nobeloj havis la rajton decidi per duelo pri malkonsentoj inter si.

LA EGALO KAJ LA RAJTO

Pri la egalo inter la homoj, mi vidas, ke oni sufiĉe konfuze disertas, eble pro tio, ke oni ne bone distingas inter la fakto kaj la rajto. Ekzemple, kiam mi vidas, ke por malkonsenti pri la respublika egalo oni kontraŭmetas la tro realan malegalon, ekzistantan inter la viroj, la virinoj, la infanoj, rilate al la potenco, al la sano, al la memoro, al la scienco, mi diras al mi, ke tiaj argumentoj estas sufiĉe senutilaj ; ĉar mi ne kredas, ke iam troviĝis leĝodonanto, kiu volus dekreti, ke dujara infano portos surdorse sakon da tritiko, tute same facile kiel tion povas fari portisto.

Ni diru, ke ekzistas natura aŭ fakta malegalo, sufiĉe videbla, sufiĉe konata, kaj kiu montriĝas en ĉiuj konfliktoj, en kiuj nur la forto ludas rolon. Rilate tion la leĝo ne tre efikas ; aŭ, pli bone dirite, ĝi neniel efikas ; ĉar ĉiu havas je ĉiu momento la forton, kiun li havas, ĉu ĝi konsistu el memoro, ruzo aŭ el alianco kun aliaj. Kaj nenia dekreto en la mondo povas fari, ke la pli forta ne estu la pli forta.

Tial la egalo sin bazas sur la rajto, ne sur la fakto. Ĝi kontraŭas al la malegalo, baziĝanta sur fakto, ne sur rajto. Ekzemple, ekzistas inter la homoj rajta malegalo, se reĝido, riĉulido estas sendevige salutata de la civitanoj, aŭ se generalo estas akklamata de tuta armeo, aŭ se pastro surgenuigas kredulojn. Oni diros : sed tiaokaze ĝi estas fakta malegalo. Jes, se ili sentas sin devigataj. Ne, se ili opinias, ke tio estas saĝa. La rajto, ĝi estas tio, kion mi nomas saĝa.

Kaj, tiusence, kiam mi diras, ke ĉiuj homoj estas egalaj, tio samsignifas kiel se mi dirus : estas saĝe agi pace kun ĉiuj, t.e. ne ordigi siajn agojn per la forto, aŭ per la inteligento, aŭ per la scienco, aŭ per la riĉo. Kaj unuvorte mi decidus, kiam mi diras, ke ili estas egalaj, ne rompi la pacon, ne praktiki la regulojn de l' milito. Ekzemple, jen infano, kiu portas rozon ; mi deziras havi tiun rozon. Laŭ la reguloj de l' milito, mi nur bezonas ĝin preni ; se male la infano estas ĉirkaŭita de gardistoj, necesas nur, ke mi rezignu. Sed se mi agas laŭ la rajto, tio signifas, ke mi atentus nek lian forton, nek la

mian kaj ke mi ne agos aliel por akiri tiun rozon ol se la infano estus iu Goljato. Tiele, la egalo estas nedisigebla de la rajto kaj de la paco, kaj ĝi estas perfekta inter la homoj, tiom longe, kiom oni atentis la rajton ; kaj ke tuj kiam la malegalo inter la homoj fundamentas iliajn interrilatojn, oni falas en militan staton. Kaj ĉu la infano estas du- aŭ dekjara, ĉu la fortoj proksimas aŭ ne la ekvilibron, la malegalo ĉiam difinas la maljuston.

MATERIALISMO - SPIRITUALISMO

La Kongreso de l' Religioj senhonorigis la materialismon. Bona difino estus preferinda. Ĉar ekzistas sendisciplina spiritualismo, kiu ankaŭ ne estas bona. "Ĉio estas plena de dioj", diris antikvulo. Kiam Paskal skribas : "La eterna silento de tiuj senfinaj spacoj timigas min", ĝi estas tute la sama penso, ĉar tio signifas : "la Dioj ne respondas."

Lukrecio laŭdis sian majstron Epikuro, pro tio ke li alportis al la homoj tiun liberigan ideon, ke ne estas Voloj kaŝitaj en la uragano aŭ en la fulmo, kaj ke ne estas pli da mistero en eklipso ol en mia ombro sur la tero. Klara, vireca, bonfara ideo pri la meĥanismo de l' fenomenoj, ĉar ĉiuj Dioj estas makulitaj per homa sango ; kaj ili estis nur la plej timindaj pasioj, sovaĝe adorataj.

La timo naskis la sorĉistojn kaj poste brulmortigis ilin. La kolero elpensis ian venĝeman dion, kaj poste militis en lia nomo. La frenezulo estas tia ; liaj pasioj konsistigas pruvon ; li donas al ili la formon de objekto, kaj li agas laŭ tio. Ĉiam same, en tiu malhela historio pri la superstiĉoj, ĉiu naskis diojn laŭ siaj pasioj kaj gloris al si pro tio, ke li obeis ilin. Sincere, kaj tio estis la plej malbona.

Kiam niaj pasioj aspektas kiel veraĵoj, kiel realaĵoj en la mondo, kiel orakoloj kaj superhomaj volo, tiam nenio estas farebla. La fanatiko estas la plej timinda el la homaj malbonoj.

Ĝi estis do granda ideo, la plej granda kaj la plej fruktodona eble, tiu, ke dancantaj atomoj, etaj korpoj kun nenia penso, havantaj nur malmolon kaj formon, iuj rondaj, la aliaj hokformaj, konsistigas per sia meĥanismo

ĉiujn tiujn spektaklojn ĉirkaŭ ni, kaj niajn korpojn mem, kaj eĉ niajn pasiojn. Ĉar la granda Kartezio, kaj Spinoza poste kaj pli bone, alvenis al tiu decida pripenso, ke, eĉ en ni, eĉ limigitaj en ni, niaj pasioj similas al uraganoj, t.e. alfluoj, turniĝoj, atommoviĝoj, gravitantaj kaj falantaj, kio ruinigis la pruvojn pri ilia propra sistemo.

Kaj tia estas la dua etapo de l' materialisma Saĝo. Post kiam ĝi malkrede rilatis al la diro "tion volas Dio" aŭ al la antaŭsigno en la ĉielo, la koleranta homo alvenas al tio, malkrede rilati al la diro "tion mi volas", kaj li diras al si : "Estas nur febro kaj varmo de l' sango, aŭ troa abundo da energio ; mi ekkuŝu, aŭ ekzercadu per halteroj."

Kiu ne vidas en tiuj kuraĝaj supozoj kaj en tiuj klaraj perceptoj la plej belan venkon de la intelekto ? Praktike neniu dubas pri tio. Pensi, forigi la eraron, kvietigi la pasiojn, ĝuste tio estas voli, kaj venki la blindan neceson, samtempe kiel oni ĝin difinas.

Mi scias, ke tie kuŝas pli ol unu kaptilo ; okazas, ke kiu tro facile akceptis la materialisman ideon, ne kreinte ĝin per sia propra Volo, tiu estas ofte dispremata sia-vice kaj meĥanikumata per tiu alia teologio, dirante, ke oni estas senpova kontraŭ ~~reĝo~~ Dio, kaj ke ĉio estas indiferenta, se ne ekzistas bono nek malbono, sen ebla progreso. Kvazaŭ masonisto, kiu masonus pordon antaŭ ol eliri.

Sed la danĝero estas pli teoria ol reala. Fakte, mi vidas, ke la malnovmoda spiritualisto falas naŭ fojojn el dek en la adoradon al pasioj kaj en la militisman fanatikon, kio samsignifas kiel la adorado al materiaj fortoj ; male estas la kuraĝa materialisto, naŭ fojojn el dek, kiu maltime postulas la Juston kaj anoncas pri la moralaj fortoj.

KIO BELIGAS LA HOMAN VIVON ?

Neniam mankas homoj por diri, ke se oni forpelas la Diojn, oni forprenas ĉion, kio faras la homan vivon nobla kaj bela. Ofte mi respondis al tio : "Bedaŭrinde. Nenio ŝanĝebla tiurilate, se Dioj ne ekzistas kaj se ni scias, ke ili ne ekzistas." Sed, ju pli mi pensas pri tio, des pli mi ekkomprenas, ke la kredo je Dio faras la vivon ne tre interesa ; ĝi estas nur tromparanĝita spektaklo ; ni estas

nur marionetoj ; la vera aktoro estas kaŝita en la kulisoj, kaj lia potenco estas klarigo pri ĉio. Mi ne ŝatas tiujn mir-teatraĵojn, en kiuj la homoj jen estas favoritaj, jen mal-favoritaj de nevideblaj diaĵoj multe pli potencaj ol ili. Kian signifon havas tiuokaze la kuraĝo, kaj kian signifon la venko ? La nevundebla Aĥilo ne mirigos min per siaj heroaĵoj. Kial do voli kaj labori, se estas Dio, kiu volas kaj laboras ? Kaj kial fari la estonton, ĉar Dio ĝin antaŭe konas, kaj ĉar lia Providenco direktas la homan historion ?

Male, se mi pensas, ke la homa animalo naskiĝis en kavernoj, se mi pensas, ke per siaj okuloj, per siaj manoj kaj sia memoro li aliigis la tutan teron, tiam la homa historio ŝajnas al mi admirinda kaj kuraĝiga, kaj inda je kvazaŭ religia respekto. Kiel li venkis sian ripozemon kaj laboris por la morgaŭo ? Kiel, anstataŭ rutiniĝi en sia laboro, kiel la formikoj kaj la abeloj, li sukcesis prijuĝi sin mem ? Kiel, lasante flanke la unuajn ilojn, li ekkalkulis ? Kiel li inventis la radon, la levilon, la klinan ebenon, la agrikulturon, la bredadon ? Kiel li inventis la kontraktojn, la juĝistojn, kaj eĉ la Diojn ? Kiel, post kiam li elpensis la Diojn, li liberiĝis de ili ? Kiel refalante al la seksperforto, al la murdado, al la milito, kiel timigite de la fulmo, de la kometoj kaj de la tertremoj, kiel li revenis al la scivolo kaj al la sereno ? Kiel povis estiĝi Arĥimedo ? Kartezio ? Kiajn malrapidajn penadojn maturigis tra la centjaroj tiuj fruktoj el la virino, potencaj kontraŭ la timo, kontraŭ la amo, kontraŭ la malhumilo, kontraŭ la flatemo ? Kiel la atenta spirito sin levis de la ventro ĝis la okuloj ? Kial tiuj rigardoj al la steloj, nun ? Kial tiuj miloj da herooj, kiujn oni vidas en la stratoj, estroj super siaj deziroj kaj koleroj, atentaj pri vojeraranta infano, pri plorbojanta hundo, pri maljuna blindulo, kiu almoze prezentas sian ĉapelon ?

Mi ŝatas vidi tiujn homajn okulojn, ĉiam altiregataj de ia spektaklo. Mi ŝatas vidi la homan animalon streĉegi la atenton, tuj kiam oni klarigas plej malgrandan aferon.

Amiko, se tio ŝajnas al ci iom pene lernadi legi, pensu pri cia praulo, kiu elpensis la skribon.